Pan-Romance languages exist as well. Relevant examples are: *Neolatino* (Schild 1947), *Internacional* (Campos Lima 1948), *Romanid* (Magyar 1956), *Romanova*

¹ On the specifics of the three newest pan-Slavic creations see Meyer 2014.

(Crandall c.s. 1999), *Interlingua Romanica* (Lavin 2001), *Neolatino* (Cassany Bates 2006), *Interromanico* (Zacharias 2017). This group, however, is not always easy to distinguish from global auxiliary languages, because many of the latter are entirely based on the Romance languages as well. C. George Boeree's *Lingua Franca Nova* (1965-98), for example, bases its lexicon on five major Romance languages (French, Italian, Portuguese, Spanish, Catalan) and its grammar on Romance creole languages such as Papiamentu. Despite this, however, it explicitly claims to be a language for global use. Likewise, *Interlingua* (IALA, 1951) is essentially a kind of modernized Latin and could easily be used as a zonal language for Romance speakers, as well; and in fact has been proposed as one.

Another problematic category are zonal auxiliary languages created for much broader language families, such as the Pan-Uralic language *Budinos* (Arzamotov 2009). Uralic languages like Finnish, Udmurt and Hungarian are so different from each other that creating a language that is even remotely understandable to speakers of all them is, essentially, an impossible task. The same goes for Pan-Turkic language projects such as *Jalpi Türk tili* and *Turan tili*.

Often listed among zonal auxiliary languages are the Pan-African language *Afrihili* (Kumi Attobrah 1970), which is mostly based on Akan and Swahili, and the Pan-Nigerian language *Guosa* (Igbinéwéká 1965), which is mostly based on Yoruba, Igbo and Hausa. There is, however, a critical difference with other zonal languages: their input languages are (practically) unrelated, and the choice for the latter is based on geographical rather than linguistic proximity. Because of the heterogeneous nature of their source material, languages of this type should be called “regional” rather than “zonal” IALs; some sources call them “compromise languages” or “hybrid languages” instead. Similar hybrids, such as *Anglo-Franca* (Henderson 1889), mixing English with French, or Pan-European languages such as *Europanto* (Marani 1996) and *Eurolang* (Hunt 1995) are rarely distinguished from the global IALs.

Classification

Constructed languages can be classified in several ways, but the most commonly used and most practical classification scheme is based on purpose. Since international auxiliary languages constitute one of its primary categories, it would be logical if further subcategorization were purpose-based as well, dividing them, for example, into global, regional and zonal auxiliary languages. It is, however, not always easy to tell which subcategory a language belongs to. Authors tend to be unclear about the precise target group of their projects, and languages do not automatically speak for themselves either. Many global IALs are entirely based on a single language family or even on a single language, others could equally well have been Pan-European languages (*Esperanto*, *Ido*, *Novial*), and a language like *Interlingua* might easily serve as a Pan-Romance language. *Slovio* claims to be a global and a zonal IAL at the same

time, without specifying which element is strongest. This leads to the conclusion that no matter how logical a solution purpose-based subcategorization may be, it is clearly not a very practical one.

The most widespread classification scheme before the 1990s was based on the origin of the linguistic material and reflected a scale of artificiality, expressed in a basic subdivision into *a priori* languages (consisting of invented material, without reference to natural languages), *a posteriori* languages (based on pre-existing linguistic material) and *mixed-type* languages (Couturat & Leau 1903). Later, authors such as Sergey Nikolayevich Kuznetsov (1976) and Pierre Janton (1993), refined this system by subdividing a posteriori languages into schematically derived languages (using internal methods), naturalistic languages (mirroring their source languages) and mixed schematic/naturalistic languages. Applying this method could result in the following classification scheme (cf. Schubert 2018):

1. A posteriori, based on a single natural language (*Latino Sine Flexione, Basic English*)
2. A posteriori, based on a homogeneous group of languages (*Inter斯拉vic, Folkspraak, Lingua Franca Nova*)
3. A posteriori, based on a heterogenous group of languages, with naturalistic derivation (*Interlingue, Budinos, Afrihili*)
4. A posteriori, based on a heterogenous group of languages, with hyposchematic derivation (*Novial, Idiom Neutral, Slovio*)
5. A posteriori, based on a heterogenous group of languages, with hyperschematic derivation (*Esperanto, Ido*)
6. Mixed a posteriori/a priori (*Volapük*)
7. A priori, non-taxonomic (*Kotava*)
8. A priori, taxonomic (*Ro*)

Here, a language's classification is no longer dependent on what its author says about its purpose, it merely depends on the linguistic material it is made of. Global auxiliary languages can belong to any of the eight categories, but zonal auxiliary languages will typically belong to the second category, rarely to the first, and the third category would mostly include regional auxiliary languages.

An entirely different approach is not impossible either. It is often assumed that languages are either natural (the result of gradual evolution due to constant social interaction between its speakers against the background of a culture) or constructed, but the truth is that both are just extremes on a broad scale of artificiality, with a large grey area of borderline cases in the middle that would merit the name “semi-constructed languages” (see discussion in Stria 2016). For example, the standardization of a natural language often involves a fair amount of top-down engineering by a regulating body, known as “language planning”, and especially projects for reviving extinct languages such as *Modern Hebrew* or *Revived Cornish* are the result of extensive linguistic engineering

and even invention. A zonal auxiliary language like *InterSlavic*, on the other hand, is usually considered artificial, but its design mechanisms are similar, if not identical, to those of standardized codification proposals for dialect groups (such as *Nynorsk* or *Rumantsch Grischun*) or projects for reviving and/or modernizing extinct languages (such as *Modern Hebrew* or, to some degree, *Katharevousa Greek*). Although the latter are usually considered natural, they meet the definition of constructed languages as well: they can even be attributed to a single author. Ultimately, acceptance as a natural language is often determined by non-linguistic factors, such as political recognition and the question of whether it catches on.

From a functional point of view, zonal constructed languages are close relatives of language types such as macrolanguage, *Dachsprache* and *koinè*. Nevertheless, there is one critical difference between zonal languages and semi-constructed languages such as those mentioned above: semi-constructed languages are usually meant to be adopted as a standard by native speakers, whereas zonal languages are intended to serve as additional languages in international communication, in other words, to serve as localized “esperantos”.

Prospects

During the late 20th century, creators of international auxiliary languages have gradually moved away from the traditional concept of a global language based mostly on Latin or Romance material. Instead, newly created languages either tend to be more inclusive towards non-European languages, or to focus on the speakers of a single language family, in other words, to create languages for zonal use. Especially the latter have become more numerous, more vital, and more visible in recent years.

Nowadays, few people would seriously believe that a constructed language can dislodge English as the world’s primary *lingua franca*. Even Esperanto, still the undisputed leader in the world of IALs, is the language of a community of Esperanto speakers rather than the universal second language envisioned by its creator. Unlike Esperanto, a zonal language has the advantage that it can be used for one-way communication with people who have never learned it.

This feature, intelligibility without prior study, can be a huge asset in parts of the world where a *lingua franca* is lacking. In the Slavic-speaking world, for example, knowledge of English is generally low, whereas Russian has failed as a *lingua franca* from the beginning. Since *InterSlavic* (or *Medžuslovjansky*) is much easier to understand for Slavic speakers than either of them, it can be used for several practical purposes: during international events, in tourism (tour guides, brochures and leaflets in museums, churches, hotels, restaurants, etc.), in user manuals, on websites, as a pivot language in computer translation, etc. – a solution much cheaper than providing translations into at least five other languages (Steenbergen 2019).

One other factor that greatly contributes to the success of a language is the “fun factor”. This could explain the success of a language like *Toki Pona* (inspired by Taoism and consisting of about 120 words) but also of *InterSlavic*, which saw its community grow considerably after the premiere of the critically acclaimed movie *The Painted Bird* (2019), in which it was featured. With 11,000 members in November 2020, *InterSlavic* is not only the most successful example of a zonal language in history, but also the constructed language with the largest user community after *Esperanto*.

For a long time, many people, including professional linguists, have considered language creation a silly, banal, or outright offensive activity. However, the Internet has contributed greatly to its destigmatization and reification (Steenbergen 2018). Languages created for films and tv series have gained popularity among fans, and a growing academic interest in auxiliary languages has resulted in numerous articles, monographs, and dissertations. It remains to be seen if this will open the gates for other applications, for example in the field education. What should be clear, though, is that in a rapidly changing, globalized world, international communication is more important than ever before, and that zonal auxiliary languages can provide a useful and user-friendly tool to facilitate this.

Bibliography

- Couturat, Louis & Léau, Leopold 1903: *Histoire de la langue universelle ‘History of the universal language’*. Paris: Librairie Hachette et cie.
- Dulichenko, Aleksandr [Дуличенко, А.] 1983: *Международные вспомогательные языки ‘International auxiliary languages’*. Tallin: Valgus.
- Janton, Pierre 1993: *Esperanto: Language, Literature, and Community*. Ed. Humphrey Tonkin. Albany N.Y.: State University of New York Press.
- Kocór, Maria & Yordanova, Lina & Steenbergen, Jan van & Merunka, Vojtěch 2017: Zonal Constructed Language and Education Support of e-Democracy – The InterSlavic Experience. In: Katsikas S.K., Zorkadis V. (eds.): *E-Democracy – Privacy-Preserving, Secure, Intelligent E-Government Services*. 7th International Conference, E-Democracy 2017, Athens, Greece, December 14–15, 2017, Proceedings. Communications in Computer and Information Science no. 792. Springer International Publishing. 15–30.
- Kuznetsov, Sergey N. [Кузнецов, С. Н.] 1976: К вопросу о типологической классификации международных искусственных языков ‘On the question of the classification of international artificial languages’. In: *Проблемы интерлингвистики: Типология и эволюция международных искусственных языков* ‘Problems of interlinguistics: The typology and evolution of international artificial languages’. Moscow: Наука. 60–70.
- Meyer, Anna-Maria 2014: *Wiederbelebung einer Utopie. Probleme und Perspektiven slavischer Plansprachen im Zeitalter des Internets ‘The revival of a utopia. Problems of and prospects for Slavic planned Languages in the age of the Internet’*. Bamberger Beiträge zur Linguistik 6. Bamberg: Univ. of Bamberg Press.

- Schubert, Klaus 2018: Apriorische und aposteriorische Plansprachen – eine Quellenrecherche ‘A priori and a posteriori planned languages – source-based research’. In: Cyril Brosch, Sabine Fiedler (eds.): *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik 2018* ‘Yearbook of the Society for Interlinguistics 2018’. Leipzig: Leipziger Universitätsverlag. 105–132.
- Steenbergen, Jan van 2018: A new era in the history of language invention. In: *Linguapax Review* 6, 101–182.
- 2019. Język międzysłowiański jako lingua franca dla Europy Środkowej ‘Interslavic as lingua franca for Central-Europe’ *Język. Komunikacja. Informacja* ‘Language. Communication. Information.’. (13), 47–61.
- Stria, Ida 2016: *Inventing languages, inventing worlds. Towards a linguistic worldview for artificial languages*. Poznań: Wydział Neofilologii UAM.

Pri *lingua franca*

Abstract. On the *Lingua Franca*

The term *lingua franca* usually refers to a tool of communication between different cultures. This is completely true of the first *Lingua Franca of the Levant* (or of the Mediterranean), usually described as a pidgin, but one which functioned for an incredibly long period of time. It's first function was oral communication between Italians, Spaniards, Portuguese, the French, Arabs, Turks, Greeks, Jews and other nationalities as the language of sailors, traders, pirates, slaves, servants, travelers, priests, soldiers etc. as attested by many people. Written documents are few and diverse, which leads to the assumption of various versions or even dialects. It's basis however is doubtless Romance, so the first modern specialist in it was the famous scholar of Romance studies and the "father of creole studies" Hugo Schuchardt. His article "Die Lingua Franca" from 1909 remains a foundational document which his followers have used to develop a number of diverse theories on the name, character, type and evolution of this beautiful sounding language. After the conquest of its last important center, Algiers in 1830, it more and more gave way to French. Schuchardt himself could no longer find it alive in the Levant. My point of departure will be his article and I will endeavor to present interesting theories and facts about the original *lingua franca*.

Resumo. La termino *lingua franca* (Esperante: lingvafrankao) kutime indikas perilon por interkomunikado inter diversaj kulturoj. Tio perfekte validas por la historie unua Lingua Franca del Levante (aŭ: de Mediteraneo), plej ofte karakterizata kiel piĝino, kiu tamen mire funkciis nekredinde longe. Ĝia unua funkcio estis buŝa interkompreniĝo inter italoj, hispanoj, portugaloj, francoj, araboj, turkoj, grekoj, judoj kaj alinacianoj, kiel lingvo de maristoj, komercistoj, piratoj, sklavoj, servistoj, vojaĝantoj, pastroj, soldatoj ktp., kiel atestas multaj personoj. Skribaj dokumentoj estas malmultaj kaj diversaj, kio supozigas ekziston de pluraj variaĵoj aŭ eĉ dialektoj. Ĝia bazo tamen estas sendube Romana, tial la unua moderna specialisto pri ĝi estis la fama romanisto kaj „patro de kreolistiko” Hugo Schuchardt. Lia artikolo „Die Lingua Franca” el la jaro 1909 restas baza dokumento, kiun liaj posteuloj uzis por evoluigi aron da diversaj teorioj pri la nomo, karaktero, tipo kaj evoluo de tiu belsona lingvo. Post la konkero de sia lasta grava centro, Alĝero, en 1830, ĝi pli kaj pli cedadis al la franca lingvo. Schuchardt mem ne plu trovis ĝin vivanta en Levantenio. Mi eliras el lia artikolo kaj klopodas kolekti interesajn teoriojn kaj faktojn pri la originala lingvafrankao.

1. Terminokonfuzo

La termino *lingua franca* (en Esperanto: lingvafrankao) estas hodiaŭ komprenata preskaŭ nur kiel sinonimo de interlingvo, t.e. lingvo uzata por interkompreniĝo de homoj kun reciproke nekompreneblaj denaskaj lingvoj. Tute normale oni asertas, ke

la angla lingvo estas la plej disvastiĝinta lingvafrankao en la mondo, aliaj lingvafrankaoj estas ekzemple la araba, la mandarena ktp., eĉ Esperanto estas foje nomata tiel.

Komence, lingua franca (prononcata „franka”), langue franque, estis lingvo de romanigitaj frankoj, origine ĝermana tribo vivinta ĉe Rejno en la tempoj de Romia Imperio. En la 5-a jarcento, la frankoj konkeris iaman Romanan provincon Gaŭlion kaj fondis Frankan Imperion, kiu sub Karolo la Granda ampleksis grandan parton de Eŭropo. En 843 ĝi dividiĝis: la orienta parto restis germana (inkludante germanajn frankojn), sed la okcidenta gaŭlia parto, nun nomata Francio, konservis sian Romanan lingvon (devene unu el la dialektoj de la vulgara latina lingvo). Tieaj reĝoj nomis sin „reĝoj de frankoj” ĝis la 13-a jc.

Por ne konfuzi la lingvon de frankoj kun la piĝino lingua franca, oni uzis pli-precizigon „del Levante” aŭ „de Mediteraneo”. La vorto *Levante* (en Esperanto: Levantenio) venas de latina absoluta ablativo „sole levante”, t.e. [ĉe/dum] leviĝanta suno, sinonimo por oriento. La regiono de Levantenio entenis ĉiujn landojn, kiuj troviĝis ĉirkaŭ Mediteraneo oriente de Italio, do Grekion, insulojn en la Egea maro, marbordojn de Turkio, Libano, Palestino, Sirio kaj Egipto. Tiu ĉi regiono spertis fortajn influojn de okcidenta kulturo kaj civilizo ĉefe dum la tempo de krucmilitoj ekde la 11-a ĝis la 15-a jarcento. La unuan krucmiliton organizis francoj, kiuj fondis en Levantenio graflandojn Edesso kaj Tripolo, princlandon Antioĥio kaj en 1099 la reĝlandon Jeruzalemo, kies oficiala lingvo do iĝis la franca.

Pro historiaj kialoj ŝajnas esti konvinka la teorio, ke la francoj estis la unuaj eŭropanoj, kiujn Araboj en Levantenio renkontis, tial ili nomis ĉiujn eŭropanojn *farangĥi* „frankoj”, kaj la jam uzata kontaktlingvo *lisān-al-farangĥi* („lingvo de eŭropanoj”) ricevis nomon *Lingua Franca*, poste nomata ankaŭ „ferenghi”, „sabir” (laŭ la verbo „scii”) aŭ „petit mauresque” („eta maŭreca”).

Schuchardt (1909:449) tamen rimarkas, ke la unuaj eŭropanoj, kiuj estis komercantaj kun Levantenio jam pli frue, estis ne francoj, sed italoj el Ĝenovo kaj Venecio. Eŭropanoj aplikis la nomon lingua franca unue al la konkreta lingvo uzata en kontakto kun Levantenio, poste la termino ĝeneraliĝis kaj signifis „komerca kontaktlingvo” kun aludo al „porto franco”, t.e. (liber-)komerca haveno. La francoj, kiuj nomis la lingvon „la langue sabir”, diradis ke „elle jouait *franchise* dans les ports”, do ĝuste liberan komercon. Tial, klarigas Schuchardt, oni nomis la malajan lingvafrankao de Indonezio, la svahilan lingvafrankao de Orienta Afriko kaj la italan lingvafrankao de Adriatiko. Modernaj esploristoj venas kun pluaj aliaj teorioj, sed fine konkludiĝas, ke la veran devenon de la termino oni ne plu povas malkovri kun certeco (vidu ekz. Nolan 2015:101).

2. Historio

Same kiel la origino de la nomo, ankaŭ la historia komenco de lingvafrankao ne estas klara. Mediteraneo estis grava komerca centro jam en antikvaj tempoj, kiam oni vaste uzis la latinan. Necesas mencii, ke la okcidentaj latinidaj lingvoj estis en

mezepoko ankoraŭ tre similaj kaj certe reciproke kompreneblaj. Krom la itala, la hispana, la franca kaj la portugala, al la kategorio de grandaj kulturaj lingvoj apartenis la okcitana. Krome, la kataluna, la sicilia kaj pluraj malgrandaj latinidaj lingvoj estis parolataj ĉirkaŭ Mediteraneo. Tio pravigas nin supozi, ke iu praorigine latindevena lingvafrankao estis en tiu regiono uzata jam frue (kp. ekz. Corré 2005:3). Ĉar ĝi servis preskaŭ ekskluzive al praktika buŝa komunikado, ni ne povas prijuĝi ĝian aspekton. En la komercaj kaj aliaj kontaktoj estis krome envolvitaj araboj, grekoj, turkoj, armenoj, judoj kaj aliaj nacioj, el kies lingvoj venis la piĝina subtavolo.

La unua rekonata specialisto pri lingua franca estis Hugo Schuchardt (1842–1927), eminenta romanisto kaj fondinto de kreolistiko. Laŭ lia monogeneza teorio, ĉiuj piĝinoj kaj sekve kreoloj originas de portugaleca pra-formo ekestinta dum la koloniigo de okcidenta Afriko, de kie maristoj pluportis ĝin tra la mondo. Lingua franca estas tamen nomata „la prapatrino” de piĝinoj. Lia difino (Schuchardt 1909:441):

„Die Lingua Franca ist die aus romanischem Werkstoff gebildete Vermittlungssprache, die im Mittelalter zwischen Romanen und Arabern, dann auch Türken aufkam und längst in der ganzen Süd- und Ostküste des Mittelmeers verbreitet gewesen zu sein scheint. Zu unserer Zeit weiß man in der Levante nichts mehr von ihr; sie ist auf die Berberei beschränkt.”

(La lingvafrankao estas el latinida materialo konstruita perad-lingvo, kiu estis uzata en la mezepoko de Romanoj kaj araboj, poste ankaŭ de turkoj, kaj ŝajnas esti delonge disvastiĝinta sur la tuta suda kaj orienta bordo de Mediteraneo. En la nuna tempo oni nenion plu scias pri ĝi en Levantenio, ĝi estas limigita al Berberio).

Berberio estis en la 16-a ĝis 19-a jc. nomataj la landoj de berberoj ĉe nordafrika marbordo okcidente de Levantenio, do la sultanlando Maroko kaj osmanaj regentejoj Alĝerio, Tunizio kaj Tripolio/Libio. (La arabdevena termino *Magrebio* estas nun pli konata.) Loĝis tie ĉefe maŭroj (islamigitaj berberoj) kaj moriskoj (kristanigitaj islamanoj forpelitaj el Hispanio). Ili prosperis pro piratado, kaperado, elpremo de mono kaj pleje pro sklavkomerco. Sklavigitoj estis milionoj da kristanoj, forrabitaj precipe el Italio, Hispanio kaj Portugalio. Ekzemple post la batalo ĉe Ksar-el-Kebir en 1578, en kiu Portugalio malvenkis kaj la reĝo Sebastiano eĉ senspure malaperis, aperis tiom granda kvanto da sklavigitaj portugalaj kaptitoj, ke ilia lingvo forte influis la lingvafrankaon de Alĝero. Tion diras ekz. Pierre Dan (Dan 1646), franca pastro kiu veturis al Alĝero por elaĉeti kelkajn francojn kaptitajn de piratoj. Estis ankaŭ konate, ke metiistoj kaj artistoj scipovantaj paroli lingvafrankaon estis pli bone pagataj.

Diversaj atestantoj priskribas lingvafrankaon kiel *miksaĵon* de lingvoj hispana, itala, portugala, okcitana kaj franca, do pure latinidan lingvon, aliaj karakterizas ĝin kiel italan lingvon el Malto kun arabaj elementoj. Ĝi estis parolata en ĉiuj havenoj de Mediteraneo, uzata same en Konstantinoplo kiel en Gibraltaro, en Marsejlo kiel en Alĝero, Tripolo kaj Aleksandrio, en Levantenio kaj eĉ en oazoj de suda Alĝerio. Estas klare, ke ĝi ekzistis en lokaj variantoj, kiuj sin povis reciproke influi. La vortaro

de Lingua Franca del Levante krome liveris materialon por eŭropecaj esprimoj ligitaj kun mediteraneaj navigado kaj komerco (vd. Schuchardt 1909:441).

En la 16-a jc. la plej granda geografia centro de lingvafrankao iĝis Alĝero, bastiono de korsaroj. Male al kutimaj piĝinoj kaj kreolaj lingvoj, lingvafrankao estis tie piĝino de blankuloj, nome de kristanaj sklavoj, kies lingvoj ne formis subtavolon, sed supertavolon (lexifier).

Hispana verkisto *Miguel de Cervantes Saavedra* (1547–1616) estis sklavo en Alĝero en la jaroj 1575–580. Li verkis pri tio teatraĵon „Los tratos de Argel”, la lingvafrankao aperas en lia romano „La primera parte de la Galatea”, kaj en la fama romano pri Don Kihoto (Cervantes 1605, ĉap. 41) oni asertas, ke la lingvo, per kiu oni interkompreniĝas en la tuta Berberio kaj eĉ en Konstantinoplo, estas nek maŭra, nek kastilia, nek ajna nacia, sed miksaĵo de ĉio: „*Lengua que en toda la Barberia y en aun Contantinople se halla entra cautivos y moros, que ni es morisco ni castellano ni de otra nación alguna, sino una mexcla de todas las lenguas, con la qual todos nos entendemos*” (vd. ankaŭ Nolan 2015:100).

En la libro „Topografía e historia general de Argel”, benediktana monaĥo Diego de Haedo (1612, XXIX: 23–24) diras, ke la lingvafrankao estis post la araba kaj la turka la tria lingvo de Alĝero, nome tiu de la sklavigita „kristana nacio” konsistanta ĉefe el hispanoj, italoj kaj portugaloj. Por interkompreniĝi kun la sklavoj uzadis ĝin maŭroj, turkoj kaj judoj, renegatoj kaj iliaj infanoj. Ekzemple, al malsana sklavo („kristana hundo”), kiu ne povis labori, oni diris, batante lin per klabo: „*Assi, assi, hora estar bueno, mira cane como hazer malato*” (tiel, tiel nun estas bone, rigardu, hundo, kiel vi faras [pretendas] malsanon), kaj poste ĵetis lin en la fajron, el kiu li kompreneble klopodis saviĝi: „*Acosi, acosi, como mi estar barbero bono. Y saber curar, si estar malato, y ora correr bono. Si cane dezir dole cabeza, tener febre no poder trabajar, mi saber como curar, a fê de dio abrustar vivo. Trabajar, no hablar que estar malato.*” (Kaj tiel, kaj tiel, kiom bona kuracisto mi estas. Mi ja scipovas kuraci, se vi estis malsana, kaj nun vi kuras bone. Se vi, hundo, diras, ke doloras kapo, havas febron kaj ne povas labori, mi scias kiel kuraci, por fido de dio mi bruligos vin vivantan. Laboru, ne diru ke vi estas malsana.) Eisenberg (1993) asertas, ke la vera aŭtoro de tiu libro estis Cervantes, kaj De Haedo nur eldonis ĝin.

La ora epoko de la alĝera lingvafrankao estis la 17-a jarcento, sed ankoraŭ poste eĉ regantoj („Dey”) scipovis ĝin, kiel ekzemple Dey Muhammad Ben Osman, kiu tamen ne parolis en ĝi kun liberaj kristanoj (tio do estus sub ilia nivelo), nur kun sklavoj. Interesaĵo el tiu epoko estas ekz. nomoj de oficoj, kiel *aga di baston* (unua ministro de reganto), *hodgi di cavallos* (intendant-kavaliro), *cusinero grande* (inspektoro de kuirejoj), *scrivano grande* (ministra sekretario), *patrono grande* (la reganto mem). Sub lia regado (1766–1791), la lando akiris stabilecon kaj respekton: multaj eŭropaj landoj, inklude de Britio devis pagi al ĝi maran imposton (kp. ekz. Julien 1994).

La lingvafrankao de Alĝerio estis evidente vaste uzata, ankoraŭ en 1830, kiam Francoj okupis Alĝerion, Tunizion kaj Marokon, kaj eldonis vortaron „*Dictionnaire de la Langue Franque ou Petit Mauresque*” (Marseille, 1830, aŭtoro ne indikita) por

ebligi la komunikadon de soldatoj kun la okupatoj. La „malgranda maŭreca” estas primoka esprimo analogia al „petit noir”, malgranda nigra, uzata por francecaj kreoloj. La vortaro enhavas ĉ. 2100 vortojn kaj aron da dialogoj, do certaspecan konversacian lernolibreton. La ortografio estas adaptita por la prononcmankiero de francoj, kvankam la plej multaj vortoj estas klare italdevenaj (ekz.: *ouno, doué, tré...*). La anonima(j) aŭtoro(j) mencias, ke la lingvafrankao de Tunizio estas pli italeca, dum tiu de Alĝerio pli hispaneca, enhavante vortojn kiel: *adios, aki, bentana, cortar, gerba, germana, loco(u), ombre* (= ĝis revido, ĉi tie, fenestro, tranĉi, herbo, fratino, stulta, homo). Ekzistas eĉ sinonimoj hispan- kaj italdevenaj: *ablar = parlar; basio = vuoto, cabessa = testa, mouchou = molto, palabra = parola*. Sudfrancan originon havas ekz. *cadéira* (seĝo), *scolier* (lernanto), *scarfar* (forviŝi). Miksaĵoj estas ekz. *méfidar* (malfidi, de franca *méfier* kaj itala *fidare*), *gribouilla* (tumulto/bruaĉo, france *grabuge*, itale *garbuglio*). Ekzemploj:

- | | |
|---|--------------------------------|
| – <i>Mi star contento mirar per ti.</i> | – Mi ĝojas vidi vin. |
| – <i>Mi poudir servir per ti qualké cosa?</i> | – Ĉu mi povas helpi vin en io? |
| – <i>Mi non star bounou.</i> | – Mi ne fartas bone. |
| – <i>Cosa ténir?</i> | – Kion vi havas? |
| – <i>Fazir caldo mouchou.</i> | – Estas tre varme. |
| – <i>Dispiacher mouchou per mi.</i> | – Mi multe bedaŭras. |
| – <i>Que hablar in chitâ?</i> | – Kion oni diras en la urbo? |

Post la franca konkero estis la lingvafrankao de Alĝerio pli kaj pli francigata. Oni daŭre opiniis ĝin malmulte valora (kio estis ĝenerala opinio pri piĝinoj kaj kreoloj) kaj ne ĉesis ĝin primoki. En 1852 aperis en la ĵurnalo *L'Algérien* artikolo pri „*la langue sabir*” (alia nomo uzata de francoj alude al la komedio de Molière kun la vortoj „se ti sabir”, vidu sube), nun la primoka nomo estis „*petit sabir*” kompare al „*grand sabir*” de Alĝerio, do la franca lingvo. La historio de Alĝerio estas ridindigata jene: „*Spagnoli venir ... boum boum ... andar. Ingles venir ... boum boum bezef ... andar. Francés venir ... tru tru ... chapar.*” (Hispanoj venis, kanonpafis, foriris. Angloj venis, ankaŭ kanonpafis, foriris. Francoj venis, trumpetis, restis.) Tiel estas resumata la konkero de Alĝero en 1541 de hispana reĝo Karlo la Kvina, en 1670 de la angla lordo Exmouth kaj en 1830 de la franca marŝalo Bourmont, klarigas Schuchardt (1909) kaj aldonas, ke ekzistis multaj francaj fontoj pri lingvafrankao ĝis 1884. Krome li priskribas pozicion kaj lingvaĵon de alĝeriaj *sefardaj judoj*, kiuj kiel komercistoj estis la plej oftaj parolantoj de lingvafrankao (ekz. la portugaloj jam tre frue vendis al ili licencojn pri sklavmerkato). Post la franca konkero ili tamen klopodis lerni la francan. El la miksaĵo de ambaŭ ekestis nova juda sabiro, aktive uzata ĝis 1870. Tiam komencis antisemitisma movado, kiu ridindigis ĝin same kiel la antaŭan malgrandan sabiron (interalie aperis en ĝi la „*Bible comique*”), tiel ke oni hontis paroli ĝin kaj fine uzis nur la francan lingvon. Raportoj pri lingvafrankao oftis en la 19-a jc.; en la 20-a jc. raportis pri ĝi, krom Schuchardt, ankaŭ lingvisto Marcel Cohen en 1912.

Same kiel la komenco de lingvafrankao, nek ties fino estas klara. Supozeble ĝi dissolviĝis en la kolonia franca kaj postlasis nur kelkajn spurojn en la alĝeria franca lingvaĵo. Laŭ aliaj teorioj ekzistis eĉ la dua periodo (sen ligo al la unua), kies reliktoj vivas en Proksima Oriento ĝis nun en esprimoj kiel: *gué fatu* (kio okazas), *iu sdai qua* (mi atendos ĉi tie), *vadu dal bosta* (mi ricevis poŝton), *banadora* (tomato), *slata* (laktuko). Pri tio raportas Rossetti (1999, en la reto ĝisdatigite 2003) kaj aldonas, ke li mem trovis klare identigeblajn spurojn de lingvafrankao en malgrandaj levantenaj komunumoj de Kipro ĝis Jerusalemo, kaj ankaŭ en Tunizio, dum siaj vojaĝoj en la jaroj 1970–1978. Aliaj esprimoj el lingvafrankao postvivis en la palestina piĝino kaj kreoloj de Dodekaneso, kiel li dokumentis. En lia eseo troviĝas kelkaj ekzemploj de vortoj, esprimoj kaj mallongaj tekstoj kun etimologia klarigo.

3. Gramatiko

Ĝenerale, piĝinoj posedas nur minimuman gramatikon. Ankaŭ tiu de lingvafrankao estis reduktita kaj simpligita, ĝia bazo estis analiza, do ekz. sen specialaj finaĵoj por pluralo kaj tempoj de verboj, kiuj estis formataj pere de partikuloj. Ekz. *elu star bona genti* (li/ŝi estas brava homo). Perfekto esprimiĝis per adverbo „ja” (jam): *elu ja sabito* (li/ŝi sciis). Infinitivo estis uzata senŝanĝe kun personaj pronomoj por esprimi prezencon kaj imperativon, ekz. *mi avir; ti avir* (mi havas, vi havas), *dar!* (donu!), kaj la sola finaĵo estis la participsimila *-to*, kiun oni aldonis al la infinitivo (sen *-r*) por formi la pasintajn tempojn: *voi amato* (vi amis). La futuro formiĝis per aldono de vorto *bisognio* „bezono”: *bisognio mi andar* (mi devas iri = mi iros). La objekto (rekta kaj nereakta) de verbo estis indikata helpe de la prepozicio „per”: *mi mirato per ti* (mi vidis vin), *mi ablar per ti* (mi parolas al vi); kaj la posedaj adjektivoj estis anstataŭigitaj per *di* antaŭ la pronomo: *il paisi di noi* (nia lando). Same ne ekzistis akordo de substantivoj kun adjektivoj en nombro kaj kazo. Ĝeneralaj verboj estis *star* (esti, troviĝi, ekzisti): *questo star falso, non star tardi* (tio estas malĝusta, ne estas malfrue) kaj *cunciar* (fari): *cosa cunciar? Cunciar pace.* (kion mi/vi/li... faru? Faru pacon). Tre probable ekzistis lokaj/ tempaj variantoj ankaŭ en la gramatiko, ĉar en iuj dokumentoj aperas ekz. la plurala finaĵo *-s*, kutima en la franca kaj hispana lingvoj, alie gramatikaj artikoloj *li, la, el, lo*. La karaktero de la lingvo estis latinida ĉefe pro la vortprovizo. Schuchardt (1909) krome mencias kelkajn arabigitajn latinidajn vortojn, kiel: *meskin, casan, meraia, barmil, corsan, gandusa* (malriĉa, ŝranko, spegulo, barelo, korzaro, pesto).

4. Literaturaj dokumentoj

La ofta aserto, ke la tekstoj en lingvafrankao estas malmultaj, devas esti komprenata relative. Carré (2005) listigas pli ol sepdekon da specimenoj ekde 1204 ĝis 1965,

do certe pli ol posedas ekz. novepokaj Conlangs. Aliflanke, kompare kun literatura kreado en etnolingvoj, la kvanto ne ŝajnas esti impona. Ni ne forgesu, ke lingvafrankao estis precipe praktika ilo por paroli kaj ke ĝis la komenco de la 20-a jc. regis opinio pri lingva subniveleco de piĝinoj kaj kreoloj, do preskaŭ neniu degnis verki en ili aŭ/kaj eĉ lingvistike dokumenti ilin.

La unua konservita skribita teksto en lingvafrankao estas opiniata *Credo de Constantinople*, do la konata kristana preĝo, en manuskripto el 1204. La dua plej malnova konata skriba dokumento uzanta tiun ĉi lingvon estas *Compasso da Navegare* el la jaro 1296, la unua navigacia mapo priskribanta la Mediteraneon. Alia frua specimeno estas poemo *Contrasto della Zerbitana*. Giusto Grion trovis ĝin en 1891 en la t.n. „Codice Laurenziano” (XLII 38, carta 31), kolekto de manuskriptoj el la 14-a jc. Strinna (2006:119) rekonas ĝin kiel „certe de mediteranea origino” kaj datas la manuskripton „iom post 1353”. Temas pri dialogo inter kaptitino (sklavino) el Ĝerbo kaj viro, kiu perfortis ŝian filinon en ŝia domo. Ĝian skriban formon tre probable antaŭiris buŝa recitado/kantado.

Afrika insulo Ĝerbo (Zerba), konata jam ekde antikvaj tempoj kiel „insulo de Lotofagoj”, estis enloĝata de berberoj kaj judoj, en la 9-a jarcento konkerita de piratoj el Egiptujo, en la 12-a jc. de hispanoj kaj turkoj, poste kontrolis ĝin sicilia ŝip-armeo (vd. ekz. Ouezdou 2007). Ekde la jaro 1284 regis tie admiralo Ruggero di Lauria (de aragona deveno), post lia morto en 1305 sekvis liaj familianoj kaj sicilianoj ĝis 1334, kiam tunizia sultano Abu Bakr konkeris Ĝerbon kaj aliajn insulojn. Estas probable, ke la „ĝerbanino” kaj ŝia filino estis kaptitinoj, kiujn la admiralo Di Lauria (aludita en la teksto) alportis al Italio en 1284, do la balado mem ekestis inter 1284 kaj la morto de la admiralo en 1305. La teksto estas bone konata en Italio, reproduktata en krestomatiaj kaj kolektoj de popola poezio. Ĝi estas forte italeca, tamen kun arabismoj en sintakso kaj ofta uzado de infinitivo anstataŭ konjugaciaj formoj. Profesoro Roberto Rossetti tradukis ĝin en la anglan:

O la Zerbitana retica!
il parlar ch'ella mi dicia!:
„Per tutto lo mondo fendoto
e barra fuor casa mia.”

Oi Zerbitana retica
come ti voler parlare?
se per li capelli prendoto
come ti voler conciare!
cadalzi e pugne moscoto
quanti ti voler donare!
e cosi voler conciare
tutte le vostre ginoie.

O the wild Jerba maid
the way she spoke unto me:
„I'll hit you to the end of the world
and out of my house.”

O wild Jerba maid
how shall I talk to you?
If I grab you by the hair
how I shall thrash you!
kicks and blows raining
how many I shall dispense!
and thus will redress
all of your whims.

„Ardire, ardir, minacciami?
per le partu del giustiziero
va ed escimi fuor di casama
el malvagio, lo barattero!
c'alzasti la gamba a filama,
e festiglil volentero,
e non volesti guardare
alle notre cortesoie.

„You dare, you dare, you threaten me?
By the name of the executioner
get out of my house,
evil doer, cheater!
Who raised the leg to my daughter
And did as you pleased
And would not regard
Our courtesies.

„E ardire, ardir minacciami?
non aver di te paura!
e' mantenemi l'amiralia
chè me ne star ben sigura;
e ardire, ardire? tocomo
e guardar delle mal ventura;
ch'io ti farò pigliare
e metter in prigionioie.”

„You dare, you dare, you threaten me?
I do not fear you!
the Admiral keeps me
so that I am well protected.
you dare, you dare? watch out
and beware of a bad predicament;
I shall have you detained
and committed to jail.”

Fonto: <https://web.archive.org/web/20090204072651/http://www.uwm.edu/~corre/franca/edition3/texts.html#contrasto>

La ĝeneralan disvastiĝon de lingvafrankao atestas ankaŭ la teatraĵoj, kie oni uzas ĝin (ĉefe primoke) por karakterizi sklavojn, servistojn ktp., ekz. ĉe Fazio degli Uberti, Carlo Goldoni, Lope de Vega kaj Molière. En la tria akto de la komedio de Molière „La nobela burĝo” (Le bourgeois gentilhomme) el 1670, la nobeligo okazas laŭ parodie turkeca ceremonio. Ĝin gvidas muftio, kiu unue demandas la burĝon Jourdain: „*Se ti sabir, ti respondir. Se non sabir, tazir, tazir. Mi star mufti, ti qui star ti? Non intendir, tazir, tazir.*” (Se vi scias, respondu. Se vi ne scias, silentu, silentu. Mi estas muftio, kiu estas vi? Se vi ne komprenas, silentu, silentu.) Poste li preĝas al Mohamedo: „*Mahametta, per Giordina mi pregar sera é mattina. Voler far un paladina dé Giourdina, dé Giourdina. Dar turban-ta, é dar scarcina, gon galera é brigantina, per deffender Palestina.*” (Mohamedo, por Jourdain mi preĝas vespere kaj matene. Mi volas fari paladinon el Jourdain, el Jourdain. Donu turbanon kaj donu sabron, kun galero kaj brigantino, por defendi Palestinon.)

Oni povas trovi dekon da tekstoj en lingvafrankao kun angla traduko en la glosaro de Corrè (2005). Krom la menciitaj „Credo” kaj „Zerbitana” troviĝas tie:

- „Villançico contrahaziendo a los mocaros que siempre van ynpontuando a los pelegrosos con demandas” (Villançico [tipo de kanto] rebatanta friponojn, kiuj daŭre ĝenas pilgrimantojn per demandoj), kiun verkis Juan del Encinto post sia pilgrimado al Jeruzalemo ĉ. 1520;
- Du veneciaj baladoj el la 18-a jarcento, publikigitaj en la krestomatia „Il Settecento a Venezia” 1892, en forte italeca lingvafrankao;
- La kompleta teksto de la turka ceremonio el „La nobela burĝo” de Molière el 1670, vidu supre;

- Koncerna parto el „Impressario delle Smirne” de Carlo Goldoni (1707–1793), en kiu riĉa turka komercisto Ali parolas lingvafrankaon, aliaj personoj itale;
- kvar monologoj el la „Topografio” de De Haedo el 1612, vidu supre;
- ok dialogoj el la „Dictionnaire de la Langue Franque” el 1830, vidu supre;
- specimenoj el la libro „Six semaines en Afrique” de Thierry Mieg el 1861;
- specimenoj el „Les Français dans le désert” de Corneille Trumelet el 1868;
- specimenoj el „La France coloniale illustrée” de Alexis Gochet el 1888.

5. Ĉu vere piĝino?

Tiun demandon starigas al si pluraj esploristoj. Sur la retpaĝo de Corré (2005) videblas diskuto de dudeko da specialistoj. Laŭdifine temas pri piĝino, ĉar la gramatiko estas sufiĉe primitiva. Ekzistas klaraj atestoj, ke ĝi estas miksaĵo de pluraj lingvoj. Kutimaj piĝinoj havas 700–1000 vortojn, sed lingvafranka posedas eĉ vortaron kun pli ol 2100 vortoj. Ankaŭ la konservitaj tekstoj, inklude de poemoj, montras, ke ĝi estis riĉa lingvo, kvankam dum ĝia okcentjara ekzisto ne ekzistis normigita formo. Schuchardt substrekas ĝian rolon de helplingvo.

Zago (2005) mencias, ke ĝi estis dum sia ekzisto nomata „rudimenta idioma”, „komerca ĵargono”, sed ankaŭ „koineo de krucmilitistoj” k.s. Ŝi reanalizas lingvafrankaon koncedante, ke ĝi posedas fundamentajn trajtojn de piĝino, sed aliflanke ĝi ĝuis certan gradon de aŭtonomieco. La tekstoj atestas, ke ekzistis firmaj strukturoj kaj homogena substanco, do povis temi pri „vera kaj propra” lingvo, kvankam simpligita. Rossetti (1999) opinias, ke ekzistis lingvistika kontinuo ĉe diversaj formoj de lingvafranka, do ke ĝi praktike kreoliĝis. Ni konkludu per la vortoj de Mikael Parkwall, el antaŭparolo al la glosaro de Corré (2005):

„Lingua Franca must be seen as a rather good representative of the class of languages known as pidgins. Obviously, then, the study of Lingua Franca is of prime importance to pidgin and creole studies, but alas, most creolists ... only have a very superficial knowledge of the language and its fascinating history.”

Bibliografio

- Cifoletti, Guido 2011: *La lingua franca barbaresca*. Roma: Il Calamo
- Cervantes de Saavedra, Miguel 1605: *El ingenioso hidalgo Don Quijote de la Mancha*. Madrid: Francisco de Robles. <https://www.fullbooks.com/Don-Quijote1.html>
- Corré, Alan D. 2005: *A Glossary of Lingua Franca*. Fifth Edition. <https://web.archive.org/web/20090203083909/http://www.uwm.edu/~corre/franca/go.html>
- Dan, Pierre 1646: *Histoire de la Barbarie et de ses corsaires*. Seconde édition. Paris: Pierre Rocolet. <https://de.scribd.com/doc/19607674/R-P-pierre-DAN-Histoire-de-Barbarie-Et-de-Ses-Corsaires>

- De Haedo, Diego 1612: *Topografía e historia general de Argel*. Valladolid. Reeldono 1927: Topografía e historia general de Argel por Fray Diego de Haedo: La publica la Sociedad de bibliófilos españoles. Eld. Ignacio Bauer y Landauer. Madrid: Imprenteria Ramona Velasco
- Dictionnaire de la Langue Franque ou Petit Mauresque, suivi de quelques dialogues familiers et d'un vocabulaire de mots arabes les plus usuels, à l'usage des français en Afrique*. 1830. Marseille: Feissat et Demonchy
- Eisenberg, Daniel 1993: *Cervantes autor de la „Topografía e historia general de Argel” publicada por Diego de Haedo*. Biblioteca Virtual Miguel de Cervantes. http://www.cervantesvirtual.com/obra-visor/cervantes-autor-de-la-topografia-e-historia-general-de-argel-publicada-por-diego-de-haedo-0/html/ff6e2e0-82b1-11d1-acc7-002185ce6064_10.html
- Julien, Charles-André 1994: *Histoire de l'Afrique du Nord, des origines à 1830*. Paris: Payot
- Nolan, Joanna 2015: Lingua Franca – a not simple pidgin. In: *SOAS Working Papers in Linguistics* 17(2015): 99–111.
- Ouezdou, Hédi Ben 2007: *Découvrir la Tunisie du Sud. Djerba, Perle de la Méditerranée. Tunis*. Dar Ashrof
- Rossetti, Roberto 1999: An introduction to Lingua Franca. In: *Englishes, letteratura inglesi contemporanea*, 8 anno 3 (1999): 42–62. Online: <https://web.archive.org/web/20120325104348/https://pantherfile.uwm.edu/corre/www/franca/edition3/lingua5.html>
- Schuchard, Hugo 1909: Die Lingua Franca. In: *Zeitschrift für Romanische Philologie* XXXIII, 1909. Berlin: Gustav Gröber. 441–461. Niemeyer, Gallica <https://gallica.bnf.fr/ark:/12148/bpt6k158833/f451.image>
- Strinna, Giovanni 2006: Il contrasto della Zerbitana e la satira del dialetto marinaresco campano. In: *La parola del testo. Semestrare di filologie e letteratura europea dalle origini del rinascimento*. Anno X, 2006, fascicolo 1: 119–152. Roma: Zauli Editore
- Zago, Renata 2005: *A Dissertation on Lingua Franca*. <https://web.archive.org/web/20090204072435/http://www.uwm.edu/~corre/franca/edition3/lingua6.html>

Mapo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Levantenio>



Intercultural communication: practical approaches

Interkultura komunikado: praktikaj aliroj

Komunikacja międzykulturowa: aspekty praktyczne

Komunikacja interkulturowa na przykładzie polsko-niemieckiego projektu “Interkulturelle Begegnungen – Poznań – Bielefeld” („Spotkania interkulturowe – Poznań – Bielefeld”) – możliwości i ograniczenia

Abstract. Intercultural communication on the example of the Polish-German project “Interkulturelle Begegnungen – Poznań – Bielefeld” (“Intercultural meetings – Poznań – Bielefeld”) possibilities and limitations

In the modern globalized world, intercultural communication is not a rare event. In both private and professional spheres, in the real and virtual worlds representatives of different cultures and languages are in frequent contact. That is why it is essential (not only) in language education to prepare students for dialogue with members of different language and cultural communities. One way of aiding in this are international projects between institutions which allow students to see from different perspectives what is new and different but also what is known and close. This is the goal of the Polish-German project “Interkulturelle Begegnungen – Poznań – Bielefeld” (“Intercultural meetings – Poznań – Bielefeld”) which will be presented in the chapter.

Resumo. Interkultura komunikado laŭ la ekzemplo de la pola-germana projekto „Interkulturaj renkontiĝoj – Poznan – Bielefeld”: eblecoj kaj limigoj

En la moderna, tutterigita mondo interkultura komunikado ne estas malofta fenomeno. En privataj kaj fakaj terenoj, en la reala kaj virtuala mondo ĉiam renkontiĝas reprezentantoj de diversaj kulturoj kaj lingvoj. Pro tio estas tre grava en la lingvoinstruado (kaj ne nur) la preĝigo de la lernantoj por dialogi kun membroj de diverslingvaj kaj -kulturaj komunumoj. Unu el la eblecoj estas internaciaj projektoj interuniversitataj kiuj ebligas al la studentoj rigardi el diversaj perspektivoj kio estas nova kaj alia, sed ankaŭ al tio kio estas konata kaj proksima. Ĝuste tion entreprenas la projekto „Interkulturelle Begegnungen – Poznan – Bielefeld” kiu estos prezentata.

1. Wstęp

We współczesnym, zglobalizowanym świecie komunikacja interkulturowa nie jest zjawiskiem rzadkim. Na płaszczyźnie prywatnej i zawodowej, w świecie realnym i wirtualnym wciąż spotykają się przedstawiciele różnych kultur i języków. Dlatego tak bardzo istotne jest (nie tylko) w kształceniu językowym przygotowanie uczących się do dialogu z członkami różnych wspólnot językowych i kulturowych. Jedną z możliwości stanowią międzynarodowe projekty międzyuczelniane, które

pozwalają studiującym spojrzeć z różnych perspektyw na to, co nowe i inne, ale też na to, co znane i bliskie. Tę właśnie próbę podjęto w polsko-niemieckim projekcie „Interkulturelle Begegnungen – Poznań – Bielefeld” („Spotkania interkulturowe – Poznań – Bielefeld”), który zostanie zaprezentowany w poniższym rozdziale.

2. Komunikacja interkulturowa¹ – perspektywa teoretyczna

Znajomość leksyki i gramatyki czy poprawna wymowa są niekwestionowanym warunkiem powodzenia komunikacji językowej z przedstawicielami innych wspólnot językowych i kulturowych, ale z pewnością nie jedynym. Według Europejskiego Systemu Opisu Kształcenia Językowego (ESOKJ 2003: 96) istotną rolę odgrywają także „[...] umiejętność dostrzegania związku między kulturą własną a obcą, wrażliwość kulturowa oraz umiejętność dokonywania właściwych wyborów strategii i ich odpowiedniego użycia w kontakcie z osobami z innych kultur, umiejętność pośredniczenia między kulturą własną a kulturą obcą oraz radzenia sobie z interkulturowymi nieporozumieniami i wynikającymi stąd sytuacjami konfliktowymi, umiejętność przewycięzania stereotypów” (ESOKJ 2003: 96).

W Europejskim Systemie Opisu Kształcenia Językowego (ESOKJ 2003: 15) wielokrotnie podkreśla się również potrzebę czy wręcz konieczność „[...] propagowania wzajemnego zrozumienia i tolerancji, szacunku dla tożsamości i różnorodności kulturowej przez skuteczną komunikację między narodami”. Nie jest to oczywiście postulat nowy ani tym bardziej zaskakujący, choć dla społeczeństw XXI wieku zyskuje on niewątpliwie szczególne znaczenie z uwagi na ogromną mobilność jednostek w przestrzeni realnej i wirtualnej. Aby jednakże lepiej zrozumieć jego istotę należy wpiery przyjrzeć się bliżej pojęciu *komunikacji interkulturowej*², które doczekało się szeregu definicji sformułowanych z różnych perspektyw.

Termin *komunikacja międzykulturowa* (engl. *intercultural communication*) pojawił się po raz pierwszy w publikacji „The Silent Language” (1959) autorstwa amerykańskiego etnologa i badacza zachowań E. T. Halla. Mimo iż wspomniane pojęcie ukute zostało już ponad pół wieku temu definiuje się je – jak zauważa Lüsebrink (2008: 7) – w bardzo różny sposób, w zależności od dyscypliny czy obszaru kulturowego. W wąskim znaczeniu określa ono interpersonalną komunikację *face to face* pomiędzy przedstawicielami różnych kultur (Lüsebrink 2008: 7). Podobnie pojęcie to rozumiane jest przez Erll & Gymnich (2007: 77), dla których oznacza ono bezpośrednią komu-

¹ Z uwagi na ograniczenia objętościowe w niniejszym tekście świadomie zrezygnowano z omówienia pojęć *kompetencji międzykulturowej* oraz *interkulturowej kompetencji komunikacyjnej* (por. m.in. Błazek (2008), Błazek (2018), Byram (1997), Decke-Cornill & Küster (2015), Erll & Gymnich (2007), Hiller (2007), Jaroszewska (2015), Miłułka (2014), Pawłowska (2015), Sercu (2004), Thomas (2003)). Punkt ciężkości tekstu stanowi analiza ściśle powiązanej z nimi zagadnienia *komunikacji międzykulturowej*.

² Por. także Pawłowska-Balcerska (2017).

nikację (non-)werbalną dwóch lub więcej osób o różnym pochodzeniu kulturowym. W przytoczonych definicjach komunikacji interkulturowej jej istotnym komponentem – czy wręcz warunkiem – jest bezpośredniość. Czymże zatem jest rozmowa na chacie czy wymiana maili prowadzona dla przykładu pomiędzy Polakiem i Francuzem czy Japończykiem i Peruwiańczykiem? Lüsebrink (2008: 8) słusznie przeciwstawia wąskie znaczenie terminu jego znaczeniu szerszemu, gdzie komunikacja interkulturowa odbywa się także w mediach jak np. film, telewizja, radio czy wreszcie Internet. Tym samym badacz dokonuje swoistej aktualizacji wykładni pojęcia komunikacji interkulturowej, uwzględniając w niej tzw. Nowe Media³.

W kontekście powyższych rozważań nasuwa się jednakże kolejne pytanie: Czy różnorodność językowa stanowi *Conditio sine qua non* komunikacji interkulturowej? W literaturze przedmiotu podkreśla się często, iż różnorodność językowa może, ale wcale nie musi być cechą komunikacji interkulturowej. Do jej nieodzownych wyznaczników należy jednakże różnorodność kulturowa. Erll & Gymnich (2007: 79) jako przykład podają komunikację pomiędzy Australijczykiem i Jamajczykiem (język pierwszy: angielski) czy Portugalczykiem i Brazylijczykiem (język pierwszy: portugalski). Podobnymi przykładami operuje Broszinsky-Schwabe (2011: 38), która z kolei pisze o Brytyjczykach i Amerykanach (język pierwszy: angielski), Mozambijczykach i Brazylijczykach (język pierwszy: portugalski) czy państwach niemieckiego obszaru językowego.

Komunikacja interkulturowa nierzadko wiąże się z nieporozumieniami, które wynikają z bazowania na szeroko pojętej wiedzy, głęboko zakorzenionej we własnej kulturze⁴:

Alia motivo por lingvomiksado en Esperanto estas la deziro esti preciza. Ekzemplo (29) estas intervjuo inter du germanaj parolantoj. Parolanto B uzas la terminon “Sprachenzentrum” (lingva centro) en la originalo, ĉar tiu pli bone klarigas la institucion ol la traduko. Temas pri la departamentoj en germanaj universitatoj, kiuj respondecas pri la instruado de fremdlingvoj por studentoj el ĉiuj fakoj krom la filologiaj.

(29) A: *Mi instruas Esperanton ĉe la universitato. [...] La Universitato de <urbonomo> havas kurson de Esperanto por komencantoj [...]*

B: *En kiu kadro, en kiu fakultato?*

A: *Estas tiu **Sprachenzentrum**. [...] Do estis amuza historio [...]*[63 (germana-germana; intervjuo) 9:27–57]

(30) (...) *estas multaj galaksioj en grupo. Tiu grupo kiu nomiĝas eh grapolo de galaksioj, **cluster** en la angla, povas kurbigi sunradiojn en tre interesaj manieroj.* [82 (hebrea; prelego; Lille 2015) 0:02:00]

Kiel (30) montras, en faka komunikado povas helpi mencii la terminon aldone en alia lingvo, precipe en la angla. La funkcio de tiu tipo de lingvomiksado estas trovi la plej ĝustan vorton (*mot juste switching* laŭ Gardner-Chloros 2013: 196).

Rilate al lingvoalternado kaj -miksado Esperanto-komunikado diferencas de komunikado per la angla kiel lingvafrankao. Unue laŭkvante, kiel tabelo 2 montras, kaj due kaj kunligite kun tio laŭ la funkcia amplekseco. Studoj pri la angla substrekas la

motivon, ke uzantoj de tiu lingvo intence praktikas lingvoalternadon kaj -miksadon por emfazi sian identecon kaj la propran kulturon (vd. Klimpfinger 2009; Pölzl 2003). Ni ne trovis ekzemplojn en nia datumaro, kiujn oni povus klarigi per tiu motivo. Tia konduto estus kontraŭproduktiva en Esperanto-kunvenoj, en kiuj ja la identeco kiel Esperanto-parolanto pli gravas ol la nacia. Laŭ la konata moto “Ne krokodilu!” la parolantoj havas la celon evidentigi, ke la planlingvo taŭgas en la plej diversaj situacioj kaj ke ĉio esprimeblas per ĝi.

2.5. Skriba kaj parola komunikado

La diferenco inter tiuj du formoj de komunikado ne estas tiom klara kiel oni pensas je unua vido. Buŝe prezentata prelego, kiu baziĝas sur antaŭe zorge verkita teksto verŝajne pli similas al skriba teksto ol al spontanea interparolado en kafopaŭzo. Ĉi-rilate Koch & Oesterreicher (1985/2012) faras diferencon inter la medio (la sona kaj grafika realigadoj) kaj la koncepto de lingvaĵo kiel skriba aŭ parola, kiu estas laŭgrada fenomeno. La aŭtoroj uzas la terminojn “laŭkoncepta paroleco” kaj “laŭkoncepta skribeco”. Por klarigi tion per ekzemploj: scienca artikolo estas laŭkoncepte kaj laŭmedie skriba, scienca prelego laŭkoncepte skriba, sed laŭmedie parola. Spontanea konversacio estas laŭkoncepte kaj laŭmedie parola, kaj reta babilado estas laŭkoncepte parola, sed laŭmedie skriba.

Kompreneble ankaŭ en Esperanto ni spertas la diferencon inter skribaj kaj parolaj tekstoj. Oni nur pensu pri la uzo de gestoj en buŝa komunikado. Ili akompanas la paroladon kaj povas ankaŭ subteni la komprenon de la aŭskultantoj. Bildo 1 prezentas ekzemplon. Dum faka prelego pri astronomio la preleganto menciante la vortojn “bloki la lumon” per sia mano geste esprimas la enhavon.



Bildo 1: “Sciencistoj ankaŭ disvolvis koronografojn kiuj helpas bloki la lumon el la stelo por pli bone vidi tiun el la planedo.” [189 (itala; prelego; Lisboa] 52:11-22)⁷

⁷ Ni dankas al profesoro Rossi pro la permeso uzi tiun ĉi foton.

Ekzistas do ecoj, kiuj klare distingas paroladon de skribado ankaŭ en Esperanto. Karakterizaĵoj tipaj por parolado kiel interagado, konkreteco, situacidependeco kaj baziĝo sur komuna scio ankaŭ pruveblas en la planlingvo. Tamen, se temas pri la lingvaĵo mem, do ekzemple la uzo de konjunkcioj, pasivoj, pronomoj, participoj aŭ kunmetitaj tempoj, la diferencoj inter skribaj kaj parolaj tekstoj en Esperanto ne estas tiom grandaj kiel en etnaj lingvoj. Ne ekzistas gramatikaj strukturoj kaj vortoj, kiuj nur uzeblas en parolado (kiel ekzemple en la germana aŭ pola).

Interesa esplorprojekto ĉi-rilate estas la komputile realigita komunikado. En retaj babilejoj komunikantoj devas trovi grafikajn elementojn por esprimi intencojn kaj reagojn kiel ekzemple mallongigojn („mdr“ = multe da ridoj = angle *LOL*) aŭ mienosimbolojn (☺ ☹). Laŭ niaj rezultoj tiuj rimedoj tamen estas ŝpareme uzataj tiel ke la lingvaĵo ankaŭ en la reto ĝenerale komformas al la normo de Esperanto (kvankam eraroj kompreneble okazas kiel kutime). Menciindas, ke eĉ en la reto parolantoj singarde uzas la lingvon kaj korektas sian propran lingvouzon (ekz. 31). Kelkfoje ili eĉ reagis al la vortuzo de aliaj forumopartoprenantoj kiel en ekz. 32, kie parolanto faras la demandon ĉu la vorto „maleolmordanto“ (verŝajne paŭzaĵo de la angla “ankle-biter”) estas komprenebla al ĉina esperantisto.⁸

(31) *DinahMP4/5/19 14:07*

Ege bona artikolo pri tre grava temo, dankon.

En la franca ekzistas libro iom malnova titolita „Maljuneco ne ekzistas“.

Mi konsilas ĝin.

Kiel vi diras, estas timo pro alvenanta morto. Tiu temo estas gravega. Scii ke nur la korpo mortas, ke la animo plu vivas, tio tute ŝanĝas la vidon al la vivo kaj al maljuniĝado. Estas tre bedaŭrinde ke tiu temo tro ofte esta tabua.

DinahMP4/5/19 14:09

Mi rekomendas la libron, ne konsilas ĝin, stulta mi ...

(32) *A: Poento al la maleolmordanto <nomo> por tiu manovro en tiel simbola momento. [...]*

B: [...] r a [=rilate al] ‘Maleolmordanto’ kiu estas vorto pli amuza ol insulta, aparte pro tio ke vi samfraze konsideras <nomo> mem brilulo. Sed eble tiu esprimo ne estas tute internacia? Ĉu ĉinaj esperantistoj ekzemple [sic!] komprenas vian celon. Mi volas renkonti tiajn brilulojn.

[(<http://www.liberafolio.org/2016/12/26/tejo-ekamikas-kun-la-civito/>)]

Tiel komunikado en Esperanto, ĉu parola, skriba aŭ reta, povas esti priskribata kiel sufiĉe homogena. La kaŭzoj por tio povus esti, ke la parolantoj lernis la lingvon en la skriba formo kaj ke malgraŭ la kreskantaj eblecoj por interparolado en Esperanto verŝajne la skriba uzo ankaŭ hodiaŭ estas la ĉefa. Krome, la plejmulto da Esperanto-parolantoj posedas alte evoluintan lingvokonscion kaj la komprenon, ke internacia normo ekzistu kiel bazo por klara interkompreniĝo per la lingvo.

⁸ Ĉi-kuntekste kelkaj parolas pri la leĝo de Tonjo laŭ la hispana esperantisto Toño del Barrio, kiu kreis tiun leĝon en 2008: *Ju pli reta diskuto en Esperanto longas, la probableco ke ĝi deflankiĝos al diskuto pri gramatikaj aŭ pri la uzata vortigo des pli (asimptote) proksimiĝas al 1.*

2.6. Sinteno pri akĉentoj

La elirpunkto por trakti tiun temon estis la situacio en etnaj lingvoj. Studoj pri la angla kiel lingvafrankao evidentigas, ke negepatralingvaj parolantoj ofte estas malakceptataj (Jenkins 2007). Akĉentoj estas ne nur asociataj kun stereotipo, parolantoj kun fremda elparolado estas ankaŭ rigardataj kiel malpli edukitaj ol gepatra parolanto (Beinhoff, 2013, p. 31; Fraser & Kelly, 2012). Inter la diversaj grupoj de parolantoj certaj akĉentoj renkontas diversajn gradojn de malakcepto. Kiel Jenkins (2007: 81f.) priskribas, ekzemple aziaj parolantoj de la angla spertas problemojn en la labormerkato pro siaj akĉentoj, kio apenaŭ okazas por parolantoj el Skandinavio.

Lastatempe la demando pri akĉentoj vekis esplorinteresojn ankaŭ en la kunteksto de minoritataj lingvoj. Kvankam estas konata fakto, ke lingvoj kiel la soraba aŭ kimra kapablas pluvivi nur helpe de la t.n. novaj parolantoj, do de homoj, kiuj lernas tiujn lingvojn ne de siaj familioj, sed en lernejoj aŭ kiel plenkreskuloj en kluboj pro intereso pri ili, tiuj parolantoj ofte ne estas konsiderataj “legitimaj parolantoj” (Bourdieu 1991) pro siaj neaŭtentikaj akĉentoj. “Vi ne elparolas la lingvon kiel ni faras tion” estas ofta reago de la parolantoj en la tradiciaj regionoj de tiuj lingvoj (kp. ekzemple Costa 2015 pri okcitanaj parolantoj, Ratajczak 2011 kaj Dołowy-Rybińska 2018 pri parolantoj de la soraba, MacCaluim 2007 kaj McEwan-Fujita 2010 pri lernantoj de la gaela en Skotlando, O’Rourke 2015 pri la irlanda).

Konsiderante tiun fonon ni volis ekscii pri la akceptado de akĉentoj en Esperanto, ĉefe per la metodo de intervjuoj. La esploro kondukis al tri ĉefaj rezultoj. La unua estas, ke, kvankam negativaj komentoj kaj iam kaj iam eĉ mokado pri fortaj akĉentoj aŭdeblis, akĉento estas rigardata kiel io normala en Esperanto; „ĉiu ja havas akĉenton“ estis ofta respondo. Due, montriĝis, ke Esperanto-parolantoj konscias pri norma elparolado. Bona prononcado estas por ili elparolo sur kies bazo oni ne ekkonas la gepatran lingvon de la parolanto.⁹ Per la tria rezulto ni revenas al la supre menciitaj elirpunkto por tiu studo: Kontraŭe al la situacio en etnolingvoj, la gepatraj parolantoj de Esperanto, do la denaskuloj, ne ĝuas specialan prestiĝon en la komunumo. Tiu ĉi lasta ekkono konfirmas antaŭajn esplorojn pri tiu temo (ekz. Bourkina 2009, Fiedler 2012, Lindstedt 2010; vd. ankaŭ Kimura en tiu ĉi volumo).

3. Resumo

Niaj analizoj priskribis Esperanto-komunikadon surbaze de ampleksa datumaro, kiu reprezentas tipajn ĝenrojn de la nuna uzado de la lingvo. Evidentiĝis kelkaj strategioj, kiujn Esperanto-parolantoj uzas por fari la interparoladon en la internacia planlingva komunumo sukcesplena. Inter tiuj estas metakomunikaj signaloj subtenantaj la komprenon kaj diversaj formoj de riparoj, kiuj abundas, ĉar ĝusta lingvouzo gravas

⁹ Tio estas rezulto de niaj intervjuoj kaj same de esploroj de Lloancy (1995).

al la parolantoj. Troveblas ĉefe metaforoj, kiuj rilatas al la spertoj de la parolantaro (el terenoj kiel naturo, homa korpo, konduto de bestoj kaj tekniko). La uzantoj de Esperanto montras altajn gradojn de lingvolojaleco. Ili ne ŝatas enmeti alilingvan materialon en sian lingvaĵon. La limigitaj funkcioj, en kiuj observeblas lingvoalternado kaj -miksado, estas esprimo de ĝentileco kaj precizeco kaj helpo en okazoj de leksikaj mankoj. La lingvouzo en Esperanto estas relative homogena en skribaj, parolaj kaj retaj tekstoj. La plejmulto pretas akcepti akĉentojn en Esperanto, kvankam samtempe la parolantoj havas klaran konscion pri la ekzisto de fonetika normo. “Bona” elparolado estas por ili “internacia” prononcado, kiu ne malkaŝas la gepatran lingvon de la parolanto. La rezultoj de la analizo montras kaj paralelojn al komunikado per aliaj lingvafrankaĵoj kaj diferencojn. La specifaj (kiel propraj metakomunikaj konvencioj, fremdaj riparoj, malalta nombro de lingvoalternado, toleremo pri akĉento, statuso de denaskuloj, la inklino diskuti pri lingvaj temoj kaj la alludoj al karakterizaĵoj de la kunvivo en la komunumo – vd. ekz. 4, 12 kaj 13) estas indikiloj pri propraj kulturaj trajtoj de Esperanto kaj la parolantaro, kiuj montras, ke Esperanto-komunikado estas kaj interkultura kaj intrakultura fenomeno.

Bibliografio

- Beinhoff, Bettina 2013: *Perceiving Identity through Accent. Attitudes towards Non-Native Speakers and their Accents in English*. Frankfurt/Main: Peter Lang
- Blanke, Detlev 2010: Sprachwandel im Esperanto – gezeigt an Beispielen aus der Lexik. En: K. Reinke & C. Sinner (red.): *Sprache als Spiegel der Gesellschaft. Festschrift für Johannes Klare zum 80. Geburtstag*. München: peniopo. 51–77.
- Bourdieu, Pierre 1991: *Language and Symbolic Power* (edited and introduced by J.B. Thompson, translated by G. Raymonds & M. Adamson). Cambridge University Press
- Bourkina, Oksana V. 2009: *Произносительная норма в Эсперанто*. PhD thesis. Saint Petersburg
- Bublitz, Wolfram & Hübler, Axel (red.) 2007: *Metapragmatics in Use*. Amsterdam: John Benjamins
- Costa, James 2015: New speakers, new language: On being a legitimate speaker of a minority language in Provence. *International Journal for the Sociology of Language* 231: 129–145.
- Dołowy-Rybińska, Nicole 2018: Learning Upper Sorbian. The problems with minority language education for non-native pupils in the Upper Sorbian Grammar School in Bautzen/Budyšin. En: *International Journal of Bilingual Education and Bilingualism* June 2018: 1–15.
- Fandrych, Christian 2014: Metakommentierungen in wissenschaftlichen Vorträgen. En: C. Fandrych, C. Meißner & A. Slavcheva (red.): *Gesprochene Wissenschaftssprache: Korpusmethodische Fragen und empirische Analysen*. Heidelberg: Synchron. 95–111.
- Fandrych, Christian & Graefen, Gabriele 2002: Text-commenting devices in German and English academic articles. En: *Multilingua* 21:17–43.
- Fiedler, Sabine 1998: Zu Merkmalen der Esperanto-Sprachgemeinschaft (Ergebnisse einer Probandenbefragung). En: U. Becker (red.): *Soziokulturelle Aspekte von Plansprachen. Beiträge gehalten auf der 7. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 7. –9.*

- November 1997 in Berlin* (Interlinguistische Informationen, Beiheft 4). Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik. 22–29.
- 2001: „Die b/Blanke Wissenschaft“ – luda komunikado en Esperanto [ludic communication in Esperanto]. En: S. Fiedler & Liu Haitao (red.), *Studien zur Interlinguistik. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag/Studoj pri Interlingvistiko. Festlibro omaĝe al la 60 jariĝo de Detlev Blanke*. Dobřichovice (Prag): Kava Pech. 585–602.
- 2002: *Esperanta Frazologio*. Rotterdam: UEA
- 2012: The Esperanto denaskulo: The status of the native speaker of Esperanto within and beyond the planned language community. En: *Language Problems & Language Planning*, 36(1): 69–84.
- 2018: Esperanto el frazeologia vidpunkto. En: Christer Kiselman (red.): *Aliroj al Esperanto*. Dobřichovice (Prag): Kava Pech. 79–101.
- 2016: ‘(...) a slim core of Esperanto roots (...) and a huge periphery of (English) borrowings’? – Kommt es zu einer Anglisierung des Esperanto? En: C.R. Brosch & S. Fiedler (red.): *Plansprachen – Aspekte ihrer praktischen Anwendung* (Beiträge der 25. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 13.–15. November 2015 in Berlin, (Interlinguistische Informationen. Beiheft 23). Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik. 49–67.
- 2020: Zum Sprachwandel im Esperanto. En: *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik 2020*: 23–43.
- Firth, Alan 1996: The discursive accomplishment of normality: On ‘lingua franca’ English and conversation analysis. En: *Journal of Pragmatics* 26: 237–159.
- Fraser, Catriona & Kelly, Barbara F. (2012). Listening between the lines: social assumptions around foreign accents. En: *Australian Review of Applied Linguistics* 35(1): 74–93.
- Gardner-Chloros, Penelope 2013: Contact and Code code-switching. En: R. Hickey (red.): *The Handbook of Language Contact*. Blackwell-Wiley. 188–207.
- House, Juliane 2003: English as a lingua franca: A threat to multilingualism? En: *Journal of Sociolinguistics* 7(4): 556–578.
- 2012: Teaching oral skills in English as a lingua franca. En L. Alsagoff, S. L. McKay, Hu, G. & Renandya, W. A. (red.): *Principles and Practices for Teaching English as an International Language*. Abingdon: Routledge. 186–205.
- Jenkins, Jennifer 2007: *English as a lingua franca: Attitude and identity*. Oxford University Press.
- Jordan, David K. 1988: *Esperanto: the international language of humor; or, What’s funny about Esperanto?* En: *Humor 1–2*: 143–157.
- Kimura, Goro C. 2015: Grundzüge interlingualer Kommunikationsstrategien – dargestellt am Beispiel der deutsch-polnischen Grenzregion. En: *Sophia Journal of European Studies* 7: 59–88. <http://repository.cc.sophia.ac.jp/dspace/handle/123456789/36456>.
- Klimpfinger, Theresa 2009: “She’s mixing the two languages together” – Forms and functions of code-switching in English as a lingua franca. En: A. Mauranen & E. Ranta (red.): *English as a Lingua Franca: Studies and Findings*. Cambridge Scholars Publishing. 348–370.
- Lakoff, George & Johnson, Mark 1980: *Metaphors We Live By*. University of Chicago Press.
- Lindstedt, Jouko 2010: Esperanto as a family language. En: F. Dervin (red.): *Lingua francas. La vehicularite linguistique pour vivre, travailler et etudier*. Paris: L’Harmattan. 69–80.
- Lo Jacomo, François 1981: *Liberté ou autorité dans l’évolution de l’espéranto*. Pisa: edistudio (doktoriga disertacio).

- Lloancy, Marie-Thérèse 1995. *Esperantistoj kaj normo. Socilingvistika enketo pri parola Esperanto-normo 1992–1995*. Pau (aŭtoro eldono).
- MacCaluim, Alasdair 2007: *Reversing Language Shift: The Social Identity and Role of Scottish Gaelic Learners*. Belfast: Cló Ollscoil na Banriona.
- Mauranen, Anna 1993: Contrastive ESP Rhetoric: Metatext in Finnish English economics texts. En: *English for Specific Purposes* 12(1): 3–22.
- Mauranen, Anna 2006: Signaling and preventing misunderstanding in English as a lingua franca communication. En: *International Journal of the Sociology of Language* 177: 123–150.
- 2010: Discourse reflexivity: a discourse universal? The case of ELF. In: *Nordic Journal of English Studies* 9(2): 13–40.
- McEwan-Fujita, Emily 2010: Ideology, affect and socialization in language shift and revitalization: The experiences of adults learning Gaelic in the Western isles of Scotland. En: *Language in Society* 39(1): 27–64.
- Mel’nikov, Aleksandr S. 2008: *Vortludoj kaj luda komunikado en Esperanto*. San Marino et al.: aŭtoro eldono.
- O’Rourke, Bernadette et al. 2015: New speakers of minority languages: The challenging opportunity – Foreword. En: *International Journal for the Sociology of Language* 231: 1–20.
- Philippe, Benoît 1991: *Sprachwandel bei einer Plansprache am Beispiel des Esperanto*. Konstanz: Hartung-Gorre
- Piron, Claude 1989: A few notes on the evolution of Esperanto. En: K. Schubert (red.): *Interlinguistics. Aspects of the science of planned languages*. Berlin: Mouton de Gruyter. 129–142.
- Pözl, Ulrike 2003: Signalling cultural identity: The use of L1/Ln in ELF. En: *Vienna English Working Papers*, 12(2), 3–23. http://www.univie.ac.at/Anglistik/views/03_2/POEL_SGL.PDF.
- Ratajczak, Cordula 2011: Vom Image einer Minderheitensprache. En: *Lëtopis* (Special Issue). Bautzen: Domowina-Verlag.
- Reershemius, Gertrud & Lange, Daisy 2014: Sprachkontakt in der mündlichen Wissenschaftskommunikation. En: C. Fandrych, Meißner, C. & Slavcheva, A. (red.): *Gesprochene Wissenschaftssprache: Korpusmethodische Fragen und empirische Analysen*. Heidelberg: Synchron-Verlag. 57–74.
- Schegloff, Emanuel A. 2000: When ‘Others’ initiate repair. En: *Applied Linguistics* 21(2): 205–243.
- Seidlhofer, Barbara 2011: *Understanding English as a Lingua Franca*. Oxford University Press
- Techtmeier, Bärbel 1984: *Das Gespräch. Funktionen, Normen und Strukturen*. Berlin: Akademie-Verlag

Ĉu komunikado bezonas internacian lingvon aŭ interkulturan?

Abstract. Does communication need an international or an intercultural language?

As a current discipline, intercultural communication shares many characteristics with other fields of science. Precisely for this reason, this discipline is weak compared to the same points that weaken the rest. The most interesting issue is that this weakness has a cultural origin. The main objective of this work is to present a general description of how science has taken shape, in a way that it is not as universal as usually supposed. As part of the problem comes from the attitudes that accompany English as a supposed international language, this work adds the results of an empirical investigation that aimed to study whether Esperanto can function as an intercultural language. Interviews were used to ascertain (1) what objectives the interviewees seek to achieve when they choose to use a particular language (2) what emotions accompany the communication experience according to the language used (3) if more than one international language is mastered, which is chosen based on what objectives and (4) whether communication in Esperanto gives the impression of being monocultural international communication.

Resumo. Kiel nuntempa fako la interkultura komunikado kunhavas plurajn karakterojn, kiuj similas al tiuj de la aliaj kampoj de la scienco. Precize pro tio, tiu disciplino malfortas pri la samaj punktoj kiel la ceteraj. La afero plej interesa estas, ke tia malforteco havas kulturen devenon. Ĉi tiu laboraĵo celas prezenti ĉefe ĝeneralan priskribon pri tio, kiel la scienco iĝas ne tiom interkultura ol oni emas supozi. Ĉar parto el la problemo devenas de la sintenoj, kiuj akompanas la anglan kvazaŭ internacian lingvon, ĉi tiu laboraĵo aldonas rezultojn de empiria esplorado, kiu celis studi, ĉu Esperanto povas roli kiel interkultura lingvo. La intervjuoj celis atingi scion pri (1) kiujn celojn serĉas la parolantoj, kiam ili elektas unu el la lingvoj, kiujn ili regas? (2) Kiaj emocioj akompanas la komunikadan sperton laŭ la lingvo uzata? (3) Se regas pli ol unu internacia lingvo, kiun oni elektas serĉante kion? Kaj (4) Ĉu la interkultura komunikado pere de Esperanto iel donas la senton de internacia samkultura komunikado?

Enkonduko

Esploroj montras, ke plejofte la scienco estas konsiderata kampo el la scio ege malproksima, malfacila kaj taŭga nur por apartaj homoj (Mauricio, 2002). Tia karaktero fortigas la nesufiĉan kontakton inter la socia realo kaj la scienca laboro en la disciplinoj, kies celo rilatas al la homa konduto, tiel ke oni emas rigardi la sciencon kiel eburan turon (Shields kaj McGinn, 2011). La afero pli gravas ekde la vidpunkto, ke la kreskema specialiĝo ne nur pligrandigas la distancon inter sciencistoj kaj publiko, sed ankaŭ inter la sciencistoj, tiel ke la eblo labori kune malfaciliĝas (Alcibar,

2000). Al tio oni aldonu, ke la scienco emas priskribi, kompreni aŭ klarigi la realon, sed ne tiom tuŝi ĝin aŭ provi en realaj kuntekstoj la teoriojn aŭ modelojn pri la homa konduto, kiujn sciencistoj realigas (Manzano-Arrondo, 2017a). Kutime la teorioj kaj modeloj pri la homa konduto alvenas de esploroj en laboratorioj aŭ en universitatoj, pluraj el ili per eksperimentoj kun studentoj, tiel ke sciencistoj emas vivi en sia propra nenatura mondo realigante scienciaĵojn, kiuj ofte ne utilas en realaj kuntekstoj (Flores, 2011; Marvakis, 2011; Pavón-Cuéllar, 2012; Vázquez, 2004). Ĉu la fako interkultura komunikado loĝas ankaŭ en tia medio?

Pro la celo kompreni la homan konduton de la sciencistoj, parto el kiuj fakas pri interkultura komunikado, la sekvantaj sekcioj klopodas priskribi tri biasojn kun kultura fono. La fina sekcio mencias rezultojn el konkludoj atingitaj per empiria esplorado, kiuj utilos por la celo prezenti Esperanton kiel unu el la eroj de ebla solvo rilate al la interkultureco de la komunikado.

La tri biasoj kaj la fina rezulto ricevos nomojn, kiuj sekvas la principojn pri la sciencaj metaforoj, kiujn priskribas Alcíbar (2000). Aldone, tiuj nomoj estas proponitaj laŭ la celo mallonge priskribi la intencon kaj la rolon, ne atendante laŭliteran akcepton.

La nigra truo de la sciencista konduto

La analizado de la kutima konduto de la esploristoj pri sociaj sciencoj faciligas rimarki, ke ekzistas cirkla komuna rezulto, kies mallonga priskribo povas esti *nigra truo de la sciencista konduto*. La nigra truo estas metafora titolo uzata por la celo priskribi la konduton de konkreta ero de la spaco: kelkaj stelaj korpoj havas tiom da maso, ke ili altiras ĉion, kio alproksimiĝas, eĉ la lumon. Rezulte, la maŝinoj aŭ organoj, kiuj bezonas lumon por scii pri la estaĵoj, ne havas kapablon atingi konon pri la ekzisto de la nigraj truoj, krom uzante specifajn teknikojn kaj algoritmojn. Nigra truo ĉion cirkle manĝas laŭ la jena logiko

1. Ju pli da maso des pli da kapablo altiri.
2. Ju pli da kapablo altiri des pli granda estas la areo de ĝia influo.
3. Ju pli granda estas tiu areo des pli da estaĵoj ĝi enirigas.
4. Ju pli da estaĵoj eniras des pli da maso la nigra truo atingas.
5. Revenu al la 1-a punkto.

En la celo kompreni, kial mi uzas tiun metaforon por paroli pri la sciencista konduto kaj kial ĝi ligas la kulturon al la scienco, mi proponas supreniri tri ŝtupojn, kiuj rilatas al tri biasoj: la kultura deveno de la scienco, la kulture scienca produkteĝemo kaj la spiralo de la malheliga lumo.

Biaso 1. La kulturdeveno de la scienco

Malgraŭ la kutima maniero prezenti la sciencan kiel precizan manieron atingi scion pri la mondo sekvante la principojn de neŭtraleco, universaleco kaj unueco, pli kaj pli la propra scienco akceptas, ke la scio atingita estas influita de pluraj flankoj, kiuj ne sekvas tiajn principojn. Unu el la disciplinoj, kiuj defendas tiun aserton, estas la *kultura historio de la scienco* (Pimentel 2010). Laŭ tiu esplora kampo, la scienco estas produktata de la kulturo de la produktantoj, tiel ke oni malfacile komprenos la rezultojn se oni ne scias pri la kultura kunteksto, kie la rezultoj formiĝis. Por mi, pli interesa ol tiu defendo de la kulturdeveno de la sciencaj produktaĵoj, estas la fakto, ke eĉ la kultura historio de la scienco estas kampo ege influata de la kulturo de ĝiaj produktantoj. Ni ekzemple prenu la menciitan tekston de Pimentel, elŝutita de la revua retpaĝo milojn da fojoj. La aŭtoro selektas 17 referencojn, kiuj bone reprezentas la staton de la disciplino. La aŭtoro estas hispano, kiu publikigas hispane la artikolon en hispana revuo (kiu ankaŭ akceptas anglajn artikolojn). Nur 1 el tiuj 17 selektitaj referencoj estas hispana, sed traduko de origine angla verko. La ceteraj estas anglaj, publikigitaj de anglodevenaj aŭtoroj, ĉefe usonanoj.

En alia publikigaĵo mi okupiĝis pri la analizado de la homa konduto laŭ kelkaj kulturoj, tiel ke oni povas kompreni, kiel la esploristoj, fakuloj pri homa konduto, produktas sciencan (Manzano-Arrondo 2017a). La konkludoj povas esti sinteze montrita ĉi tiel:

1. Kvankam ĉiu homo kondutas laŭ pluraj variabloj, la komuna kulturdeveno klarigas pri kelkaj flankoj de la rezulto.
2. Kulturoj devenintaj de la plej riĉaj landoj el Okcidento pli emigas rimarkigi oportunojn rilate al la individua profito, la kvanta mezuro kaj la interpreto de la naturo kiel ĥaoso, kiu bezonas esti tradukata en ordon.
3. Kulturoj kiel pluraj el latinamerikaj indiĝenaj kaj suda Eŭropo pli emigas ĝui la medion kaj interpreti la naturon kiel ekvilibron, kie la homaro ne estas pli ol unu ero.
4. Kulturoj kiel pluraj el Azio kaj el Afriko interpretas la socion kiel ekvilibron inter familioj ene de socia hierarkio, ne estas individuemaj kaj interpretas la naturon kiel kompleksan vivaĵon, kiu meritas respekton.

Malgraŭ la troa simpligo de la sinteza aliro, tiu rapida superrigardo helpas kompreni, ke tia aro de la homa konduto, kiun ni nomas scienco, naskiĝis en la centra kaj norda parto de Eŭropo. La nasko alvenis de la forta emo mezuri la ĉirkaŭaĵon rigardatan kiel meĥanisman, naski teoriojn kiel rezulton de la organizado de tia konduto, kaj serĉi individuan prestiĝon subskribante publikigaĵojn. Pro tio vasta latinamerika produktado plendas pri la maniero akcepti la okcidentan sciencan, ĉefe rilate al la sociaj disciplinoj, asertante ekzemple, ke „oni bezonas alian socian sciencan, kiu ne disigu la cerbon de la korpo, la etikon de la politiko, la agadon de la pensado” (Rivera,

Domingues, Escobar kaj Leff 2016: 3). Sekvante tian pensigan fadenon, oni povas rimarki malsanan heziton, kiu unuflanke agnoskas la valoron de la scienco deveninta de okcidento, sed aliflanke rimarkas ke la obeema akcepto de tia fabriko sufokas la eblon pensi per si mem, ekde la propra historio, etno, medio, socio, bezonaro. La science koloniataj komunumoj klopodas imiti modelojn agi, kiuj estas importitaj kaj rezultas malnaturaj. Tiel la rezulto estas facile antaŭvidebla: tiuj regionoj estas kondamnataj sekvi, sed neniam venki, imiti supreniri, sed neniam atingi la supran parton, ĝis ĝi komunumoj, kiuj sin sentas nature subaj.

Biaso 2. La kulture scienca produktegemo

La scienco, laŭ la versio de okcidenta invento, atingis sian nuntempan statuson dum peniga laboro realigita ĉefe dum la lasta duono de la 19a jarcento kaj unua duono de la 20a. Lafuente kaj Ortega (1992) priskribas, ke tiam la scienco estis prezentita kiel supera modelo por la homa konduto laŭ la principoj de komuna neprofitema laboro, bazita sur pura metodo kaj ekzemplinda individua konduto. Malgraŭ la fakto, ke ĉiuj ekzemploj de bona konduto prenitaj estis okcidentodevenaj kaj ke ankaŭ devenis de okcidento la uzata sistemo de valoroj, kiuj taksis tiujn ekzemplojn, la rezulto atingis la kvaliton de universala, netempa, valida en iu ajn kulturo.

Parto el la karakteroj de tia admirinda konduto rilatas al la produktado: tiu scienco, nome *la* scienco, kondutas kvazaŭ fabriko de konceptoj, teorioj, modeloj kaj plurspecaj esploroj, parto el kiuj eĉ utiladis en la tiam jam kreskema kapitalisma socio por la celo atingi profitojn.

De tiam ĝis nun multaj okazaĵoj kapablis ŝanĝi tian kvaliton de preskaŭ netuŝebla religio. Ekzemple, la scienco torturis judojn dum la naziismo aŭ malliberigitajn en Gŭantanamo (Miles, 2007), inventis la atoman bombon, aŭ vendiĝas al la bezonoj de la tutmonda merkato (Arboledas-Lérida, 2018). Malgraŭ tia ŝanĝo de bildo, rimarkindas, ke la maŝinoj de la fabriko ne nur restas en la samaj loko, sed fartas bone. La okcidenta (lastajn jardekojn ĉefe usona) fabriko de konceptoj, modeloj, teorioj kaj sciencaj vidpunktoj daŭre plenigas la referencokadron de la sociaj sciencoj. Unu ekzemplo sufiĉe klarigas pri tia konduto. Laŭ Cabo kaj Enrique (2004), danke al la kreska konscio pri la kultura enhavo de la sciencoj, stariĝas konkreta disciplino, kies nomo sufiĉe klarigas tion: la interkultura scienco. Oni antaŭvidus, ke ne nur la rezulto estas sufiĉe vasta pri la kultura deveno, sed tia deveno rimarkeblas ankaŭ pro ĝia produktado. La samaj aŭtoroj respondas tiun scivolemon. Ilia laboro celas montri, kia estas la situacio de la nuntempa produktado rilate al la interkultura scienco. Pro tio, ili serĉas la plej gravajn publikigaĵojn kaj analizojn. Kio estas la rezulto? Ambaŭ aŭtoroj estas hispanoj, kiuj laboras en hispana scienca institucio, verkas hispane sian sciencon artikolon kaj substrekas la naturan kulturan diversecon de la hispanparolantaj landoj. Malgraŭ tio, el la 81 selektitaj publikigaĵoj, 83% estas anglodevenaj. Do, ĉu interkulturas la interkultura scienco? Tion denuncas

Nieto (1995) kiam li asertas, ke ne nur la historio de la scienco ŝajnas laŭdado de la okcidentaj sukcesoj, sed ke eĉ la voĉoj, kiuj science kritikis la okcidentecon, ĉefe devenas de la sama loko, plej ofte de la angle skribantaj aŭtoroj, kiuj finfine dominas kaj la problemojn kaj la solvojn.

Serĉante provi tian vidpunkton, mi kolektis la ĉefajn teoriojn konatajn en psikologio. La rezulto estis ŝokiga. Ne nur pli ol 90% alvenis de angle parolantaj landoj, sed pli ol la duono el la selekto de la plej konataj estis teorioj realigitaj en la Universitato de Novjorko (Manzano-Arrondo, 2017a). Ion similan mi klopodis rilate al la disciplino de la lingvistikan pragmatikon, uzante specifan manlibron, kiu donis 46 nomojn, kiuj estis traktitaj en la teksto akompanataj de teorio aŭ kritiko al teorio. De tiuj 46 aŭtoroj, 94% estas viroj. La duono (47%) estas usonanoj, dum 26% estas britoj. Do tri kvaronoj havas la anglan kiel gepatran. De la ceteraj, 21% estas nebritaj eŭropanoj. Nur restas du menciitaj aŭtoroj ekster Eŭropo kaj Usono. Unu estas el Israelo, sed spertis sian karieron en usona universitato. La alia, kvankam li naskiĝis en Brazilo, de longe laboras en israela universitato. Ŝajnas, ke pragmatiko estas kulturhomogena produktado. Same okazas rilate al pluraj disciplinoj, kies analizadojn atingis mi. Ekzemple, Garcia-Ramon (2012) asertas, ke „Dum la lasta jardeko kaj en kelkaj internaciaj forumoj pri kritika geografio, oni diskutas pri la brita-usona hegemonio rilate al la produktado de scio en geografio kaj pri la rango de la angla kiel la *lingua franca* de la universitata komunikado”¹ (Garcia-Ramon, 2012:307).

En la celo tuŝi la terenon rilate la interkulturan komunikadon, mi serĉis la plej ofte menciitajn nomojn en artikoloj, blogoj kaj aliaj publikigaĵoj rilate al tiu sciencokampo. Tiu ripetado okazis nur pri malmulte da verkoj, kerne temis pri ses aliroj:

- *Interkultura kompetento* de Guo-Ming Chen kaj William J. Starosta
- *Konstruo de la Tria Kulturo* de Fred Casmir
- *Kunteksta Modelo* de Edward T. Hall
- *Simbola Interagado* de Herbert Blumer
- *Teorio de la ansio kaj la necerteco* de William Gudykunst
- *Transkultura Adaptiĝo* de Young Yun Kim

Hall, Gudykunst, Blumer kaj Starosta estas usonanoj. La ceteraj, nome Kim, Casmir kaj Chen, publikigis siajn proponojn en usonaj universitatoj. Ĉiuj publikigis angle.

Biaso 3. La spiralo de malheliga lumo

Rapide priskribita, ĉi tiu biaso konsistas en la malapero de la kapablo rimarki aliajn vidpunktojn, ĉefe produktitajn en nehegemoniaj landoj per nehegemonia lingvo. Tia

¹ De la hispana „Durante la última década, y en algunos foros internacionales de geografía crítica, se ha debatido sobre la hegemonía angloamericana respecto a la producción del conocimiento en geografía y el estatus del inglés como *lingua franca* de la comunicación académica.”

funkciado havas klaran konsekvencon fortigante la enan koloniismon. Laŭ tia modelo, la maniero pensi pri la mondo, kiu alvenas de la landoj kaj kulturoj plej potenĉavaj, daŭre ekzistas post la koloniisma epoko (González, 2003). Ĝi eniras en la kapon kaj individuan kaj kolektivan, tiel ke la koloniitoj reproduktas la saman pensadon per siaj propraj rimedoj dum sia ĉiutageco.

Krom tiu psikopolitika klarigado, ĉefe fortas alia, kiu baziĝas sur teknika super-rigardo, kaj pri kiu mi jam okupiĝis antaŭe (Manzano-Arrondo, 2010). Tamen, ĉi tie indas sinteze prezenti ĝian ostaron:

1. La afero komenciĝas en la fino de la antaŭa biaso, tio estas ni havas centran produktadon, ĉirkaŭatan de produktetoj.
2. Alvenas momento, kiam la nombro da publikigaĵoj estas jam tiom granda, ke oni dankas la ekziston de datenbankoj, serĉiloj, organiziloj.
3. Tamen okazas, ke tiuj iloj ankaŭ estas produktitaj per la samaj biasoj, ĉar estas tie, kie oni havas sufiĉe da rimedoj kaj saman aŭ koheran sintenon.
4. Ni imagu nun esploriston, kiu deziras scii pri tio, kion la scienco faris. Li aŭ ŝi emos uzi la serĉilojn anstataŭ suferi longan procezon.
5. Rezulte, tiu homo nur vidos la realon laŭ la vidpunkto de tiu fabriko, uzos ĝiajn konceptojn, klopodos publikigi en la samaj revuoj kaj kunlaboros en la fortigo kaj de la fabriko kaj de ĝiaj aŭtoroj. Nerekte, tio signifas la mallumigon de la ceteraj.
6. Finfine, la centro de la centro sukcese ne nur manĝos la kapablon vidi, sed atingos, ke la realo adaptiĝos al tiuj ununuraj vidpunktoj.

Konklude, tio, kiun ni nomas scienco, naskiĝis en Eŭropo, kie restis ĝis la forta alveno de Usono. De tie, unue Usono kaj due la angle parolanta Eŭropo havas la ĉefajn rimedojn produkti sciencaĵojn, nome teoriojn, modelojn kaj konceptojn, kiuj siavice implicas konkretajn manierojn pensi pri la mondo. La ceteraj, kaj pro deziro sperti tian videblecon kaj pro la malheligado de la ceteraj aliroj, partoprenas la funkciadon de la okcidenta ĉefroluleco per siaj propraj rimedoj, serĉante nur en la hegemoniaj kanaloj la fonton de scio. Rezulte, la necentraj regionoj plistarigas la gravecon de la centro, fermante cirklon, kiu kondukas kvazaŭ nigra truon.

La ebla rolo de Esperanto

Ĉefa parto el la sukceso de la produktemaj landoj, rilate al tiu nigra truon de la scienco, baziĝas sur la angla lingvo (Ammon, 2006; Hamel, 2007). Pro tio logikas kaj koheras la emo studi lingvan solvon. En tia tavolo Esperanto povas ludi gravan rolon. Serĉante konkretan manieron realigi la solvon, en Manzano-Arrondo (2017b) mi proponis la sekvantan skizon:

1. Elstarigi ĉiujn gepatrajn skribajn lingvojn kiel taŭgajn por okupiĝo pri la tipaj sciencaj aferoj.
2. Substreki la gravecon esplori kaj instrui pri konkretaj problemoj en lokaj medioj, kie sendube la loka lingvo estas la plej taŭga.
3. Faciligigi la scian uzadon de Esperanto, kiam la internacia medio gravas.
4. Aranĝi efektivajn solvojn por tiaj situacioj, kiam sciencistoj sentas bezonon komuniki internacie, sen nepre uzi internacian lingvon.

Sciante pri la kerna kultura enhavo de la sciencaj aliroj, pensi nur pri lingvo ne ŝajnas sufiĉa kiel solvo. Tamen, Esperanto estas pli ol lingvo, ĉar ĝi reprezentas racian kaj emocian proponon partopreni plurajn flankojn el la plibonigo de la monda justeco per la protektado de minoritatoj, de kulturoj kaj de lingvoj nehegemoniaj (Pietiläinen, 2010; Vergara, 2011). Pro tio, ĉi tiu laboro klopodis esplori, kiel Esperanto povas helpi atingi ekvilibron pri la kultura kompetento rilate al la internaciaj aŭ interkulturaj komunikadoj. Alivorte estis celo iel provi ĉu tiu lingvo utilas laŭ la 3-a punkto de la supra sinteza propono.

Empiria sperto per analizado de intervjuoj

Por atingi respondojn, la esploroj realiĝis per 10 intervjuoj po pli ol unu horo. La partoprenantoj alvenis de malsamaj landoj: Kanado, Meksiko, Rumanio, Hispanio, Benino, DR Kongo, Tanzanio, Madagaskaro, Irano kaj Suda Koreio. Ĉiuj regis plurajn lingvojn, inter ili estis la angla kaj Esperanto. Ĉiuj havis internaciajn spertojn kaj internaciajn rilatojn.

Kvankam ĉiu intervjuo fluis laŭ la deziroj de la intervjuatoj, mi aranĝos kelkajn el la rezultoj per imagitaj demandoj: bezono de internacia lingvo en la ĉiutageco, rolo de internacia lingvo kaj rolo de Esperanto. Kompreneble, ĉirkaŭ 15 horoj de intervjuoj, kie la homoj libere kaj komforte parolis, faciligas atingi altnivelan riĉecon pri informoj. La celo ĉi tie ne estas reprezenti tian riĉecon, sed mallonge apogi la konkludojn per rektaj esprimoj de la intervjuitoj. Precize vi trovos du laŭliterajn tekstojn de malsamaj partoprenantoj en ĉiuj el la tri sekcioj de ĉi tiu empiria sekcio.

1. Ĉu via ĉiutageco bezonas internacian aŭ interkulturan lingvon?

Tute klare la respondo estas: Ne en ĉiuj kazoj. En la ĉiutageco, homoj nur uzas sian gepatran aŭ lokan lingvon. Tamen ekzistas forta premo, kiun mi nomas „Dua Realto”, per kiu oni havas devigon lerni hegemonian lingvon, kvankam poste ne estas reala bezono uzi ĝin. Ekzemple:

Eĉ se iu havas konon en agrikultura kampo kaj oni volas homon por gvidi agrikulturajn aferojn, vidu, en la reguloj por elekti, oni diras „vi devas havi bonan konon pri la franca” Sed praktike oni ne bezonas konon pri la franca. La loka

lingvo estas tre grava, ĉar tiu homo devas labori kun lokanoj, kiuj grandparte parolas la lokan lingvon. Vidu, se oni elektas homon, kiu bone parolas la francan, sed ne la lokan lingvon, kiel tiu homo povos paroli kun la lokanoj? Estas fiasko!

En Korea socio angla lingvo estas tre grava studobjekto. (...) Dum mia vivo mi estis en kontakto kun la angla, ĉar mi studis ĝin ekde la infaneco ĝis la universitato kaj en privataj lernejoj. Poste mi trovis laboron danke al mia scio pri la angla. (...) Dum 2 aŭ 3 jaroj mi instruis la anglan (...) Krom tio, en mia ĉiutageco mi ne uzas ĝin. En mia ĉirkaŭaĵo ĉio estas la korea ĝis mia renkontiĝo kun Esperanto. (...) Krom en la lernejoj mi ne havis kontakton kun la angla.

2. *Kia estas la rolo de koloniaj aŭ internaciaj lingvoj en via vivo?*

Ĝenerale intervjuitoj priskribis nur teknikan aŭ profitan flankon pri tia lingvo. Ekzemple, estas la lingvo per kiu ili havas postenon, ĉar ili instruas ĝin en la edukada sistemo. Sed ne okazis en la dek intervjuoj, ke iu el ili defendis la utilecon de la angla, la franca aŭ la hispana kiel lingvoj kiuj malfermas pordojn en interkultura komunikado. Ili donis rolon ĉefe lokan kaj rilate al la menciita Dua Realo. Eĉ en kelkaj momentoj, intervjuitoj rakontis malbonajn spertojn rilate al la uzo de tia lingvo en medio, kie la lokanoj havas ĝin kiel gepatran.

Tamen pri la angla, kvankam mi eĉ tiom bone parolas ĝin, mi neniam havis tian memfidon. Kvankam mi ricevis tiom da spertoj en Anglio, mi neniam atingis tian komforton, mi ĉiam havis lingvajn problemojn. Eĉ nun kiam mi esploras kaj sendas artikolon al iu ĵurnalo, mi ĉiam devas peti korektadon al iu angla amiko. Mi neniam havas sekurecon ke mia lingvo ĝustas.

Estas iom terure, ĉar estas britoj, kaj vi aŭskultas kaj vi ne povas esprimi vin same kiel ili, mi ne kapablas havi la saman nivelon kiel ili. (...) Kiam mi estis en Francio mi konstatis, ke mi ne parolas bone nek la francan nek la germanan, sed miaj kolegoj estis francoj aŭ germanoj. Por mi estis ia sento de maljusteco, kiam ni ĉiuj tradukis. Iamaniere mi sentis min iom malbone traktata.

3. *Ĉu Esperanto povas realigi la celon de interkultura komunikado?*

Ĉiuj intervjuitoj konfesis, ke Esperanto havas ĉefan rolon rilate al komunikado internacia. Malgraŭ la alta regado pri la angla, la franca aŭ la hispana, ili ne dubis elekti Esperanton kiel la plej taŭgan lingvon, kiam alvenas la eblo babili aŭ iel komuniki kun fremduloj.

Verdire mi konis miajn amikojn ekster Tanzanio pere de Esperanto. Mi havas geamikojn en Hispanio, Ameriko, Togolando, Kongolando, Burundo ktp. Esperanto, mi povas diri, ke estas la ponto por komuniki kun eksterlandanoj.

Mi pensas, ke la plejmulto de la nunaj geamikoj estas danke al Esperanto. (...) Mi ŝatas Esperanton, ĉar mi translokiĝas, kaj Esperanto helpas min havi

amikojn en multaj lokoj, ne senti min sola kaj scii, ke se mi enuiĝas mi povas iri al Esperanta renkontiĝo kaj trovi homojn.

La kapablo esti altnivela komunikilo atingas la kvaliton de pordo inter kulturoj. Komforte la intervjuitoj priskribis spertojn, situaciojn kaj emojn rilate al la pozitiva sento uzi Esperanton ĉiam kiam alvenas la eblo. Eĉ tiu lingvo faciligis, laŭ iliaj priskriboj, pli bone kompreni la mondon.

Tiu lingvo malfermis al mi multajn pordojn. Mi ne scias, kiel diri. Por mi estis tiu, kiu alportis pli da riĉeco. Mi malkovris aliajn kulturaĵojn aŭ pensmanierojn. Mi malkovris, kia estis la mondo laŭ la unugrada informo, ne kiel turisto vivas la landojn. (...) Estas la lingvo de lingvanoj, kiuj havas konscion al lingva egaleco, ekologio ktp. Estas multe pli homa ol aliaj.

Kiam mi renkontis Esperanton mia vivo tute ŝanĝiĝis. Ekde tiam mi pli profunde kaj pli ofte serĉas esperantistojn. (...) En mia socio angla lingvo estas pli altranga. Sed mi elektas Esperanton, ĉar Esperanto donas al mi pli da frateco kaj amikoj, kiel familianoj. Mi sentas, ke esperantistoj estas miaj familianoj. Tia sento mi tute ne povas senti per angla lingvo.

Konkludoj

Ĉi tiu laboro celis cerbumigi eblajn legontojn pri la historiaj biasoj de la scienco rilate al ĝia forta ĉeesta kultura deveno, kaj la fakto ke tia deveno ankaŭ priskribas la realiĝojn de la disciplinoj ligitaj al interkultura komunikado, kiel okazas pri ĝi mem, la psikologio, la pragmatiko aŭ la interkultura scienco.

Tiuj biasoj implicas la hegemonion de la okcidentaj pensmanieroj kaj la plenumo de la videbla scienca rezultaro per neimitebla kapablo produkti. Rezulte kaj okcidento kaj ceteraj regionoj emas scii kaj kondukti science nur laŭ la hegemonia rimedaro kaj referencaro. Alia konsekvenco (kaj origino) estas la fortigo de la angla kiel referenca lingvo por la scienco. La interkultura komunikado ne estas escepto.

En la klopodo ne restigi ĉi tiun laboron nur kiel teorion pripensadon, aldoniĝis empiria studo per dek intervjuoj al poliglotoj el kvar kontinentoj, ĉiuj el kiuj regas almenaŭ kaj la anglan kaj Esperanton. Pluraj ankaŭ la francan aŭ la hispanan. La konkludoj klare montras, ke (1) la ĉiutageco nur bezonas lokan lingvon; (2) tamen kunekzistas fenomeno, kiun mi nomas Dua Realo, laŭ kiu lokanoj havas devigon montri scion pri hegemonia lingvo, kvankam poste ili ne bezonos ĝin; (3) la hegemoniaj, koloniaj aŭ ankaŭ konataj kiel internaciaj lingvoj ne bone taŭgas kiel interkultura komunikilo, ĉefe ĉar ne bone kontentigas la deziron sperti komfortan ekvilibrantan komunikadon; kaj (4) male, Esperanto ŝajnas esti bona ilo en tia celo, nome ĝi faciligas bonajn interkulturajn kaj internaciajn spertojn, kaj restas kiel kerna ilo en la sociaj rilatoj de ĝiaj parolantoj.

Restas la bezono esplori plu pri la problemo, videbligi, ke lingvo parolata en multaj landoj ne estas garantio de bona internacia, nek interkultura komunikada sperto.

Bibliografio

- Alcíbar, M. 2000: De agujeros, espirales inmortales y guerreros: Una aproximación al estudio de la metáfora en ciencia y divulgación científica ‘Pri truoj, nemorteblaj spiraloj kaj militistoj: Aliro al la studo de la metaforo en scienco kaj diskonigo de la scienco’. En: *Cauce*, 22–23, 453–468.
- Ammon, U. 2006: Language conflicts in the European Union. En: *International Journal of Applied Linguistics* 163: 319–338.
- Arboledas-Lérida, L. 2018: ¿‘Mercantilización’, ‘comercialización’ o ‘privatización’? Economía política de la Ciencia para comprender los cambios en la Financiación de la actividad científica ‘Enmerkatiĝo, komercado kaj privatigo. Politika ekonomio de la scienco por kompreni la ŝanĝojn en la monhelpado de la scienca agado’. En: *Revista de Economía Crítica* 26: 66–81.
- Cabo, J.M. kaj Enrique, C. 2004: Hacia un concepto de ciencia intercultural ‘Ĝis koncepto pri interkultura scienco’. En: *Enseñanza de las ciencias* 221: 137–146.
- Flores, J.M. 2011: Interpelación al discurso psicologicista hegemónico ‘Esplorante la psikologian diskurson hegemonian’. En: *Teoría y crítica de la psicología* 1: 111–121.
- García-Ramón, M.D. 2012: Las diferencias que crea el lugar. Una mirada crítica a la hegemonía angloamericana en geografía ‘La malsamecoj, kiuj kreas lokojn. Kritika rigardado de la angla hegemonio en geografio’. En: *Documents d’Anàlisi Geogràfica* 582: 307–319.
- González, P. 2003: Colonialismo Interno (una redefinición) ‘Ena koloniismo, redifino’. En: *Rebeldía* 12: 1–30.
- Hamel, R.E. 2007: The dominance of English in the international scientific periodical literature and the future of language use in science. En: *AILA Review* 20: 53–71.
- Lafuente, A. & Ortega, M.L. 1992: Modelos de mundialización de la ciencia ‘Modeloj pri la tutmodiĝo de la scienco’. En: *Arbor* 117-560: 93–117.
- Manzano-Arrondo, V. 2017a: ¿Quién explica el comportamiento? ‘Kiu klarigas la konduton?’ En: *Crítica. Revista de Psicología* 21: 35–46.
- 2017b: Lingva subpremanta diskurso kaj nuntempa universitato. En: *JKI Language Communication Information* 12: 121–135.
- Marvakis, A. 2011: La psicología crítica permanentemente en la encrucijada: sirvientes del poder y herramientas para la emancipación ‘La kritika psikologio daŭre restanta en la enkruciĝo: servantoj de la povo kaj liberigiloj’. En: *Teoría y crítica de la psicología* 1: 122–130.
- Mauricio, N. 2002: El público y las políticas de ciencia y tecnología ‘La homoj kaj la politikoj pri scienco kaj teknologio’. En: *Interciencia* 272: 80–83.
- Miles, S.H. 2007: Medical Ethics and the Interrogation of Guantanamo 063. En: *The American Journal of Bioethics* 74: 5–11.
- Nieto, M. 1995: Poder y conocimiento científico: Nuevas tendencias en historiografía de la ciencia ‘Povo kaj scienca kono: novaj emoj en la historio de la scienco’. En: *Historia Crítica* 10: 3–15.

- Pavón-Cuéllar, D. 2012: Nuestra psicología y su indignante complicidad con el sistema: doce motivos de indignación. En: *Teoría y crítica de la psicología* 2: 202–209.
- Pietiläinen, J. 2010: Plurlingvismo kaj Esperanto: Ideologia ŝanĝiĝo en la Esperanto-movado. En: D. Blanke & U. Lins (red.): *La arto labori kune: Festlibro por Humphrey Tonkin*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. 781–792.
- Pimentel, J. (2010): ¿Qué es la historia cultural de la ciencia? ‘Kio estas la kultura historio de la scienco?’ En: *Arbor* 186 (743): 417–424.
- Rivera, S., Domingues, J.M., Escobar, A. & Leff, E. 2016: Debate sobre el colonialismo intelectual y los dilemas de la teoría social latinoamericana ‘Diskuto pri la intelekta koloniismo kaj la dilemoj pri la socia teorio latinamerika’. En: *Cuestiones de Sociología* 14(9): 1–22.
- Shields, C. & McGinn, M. 2011: The erosion of academic truth: disengagement and loss. En: *Teaching Higher Education* 16: 471–482.
- Vázquez, C. 2004: Refortalecimiento: un debate con el empowerment ‘Plifortigo: diskuto kun la empowerment’. En: *Revista Interamericana de Psicología* 38: 41–51.
- Vergara, J.A. 2011: Esperanto estas multe pli valora ol speco de malangla aŭ identecofonto de supozata “popolo”. En: *La Ondo de Esperanto* 12: 206.

3

Language policy

Lingvopolitiko

Polityka językowa

Normigo kaj normaligo de ne plenrajta lingvo: la kazo de la kataluna

Abstract. Language standardization and normalization: the case of Catalan

It is a well-known fact that out of Andorra, Catalan is not a fully-fledged official language in its own speaking areas. Everywhere it shares its territory with a language imposed onto its speakers as compulsory. As a result, monolinguals in Catalan do not exist anymore, even if most of Catalan-speakers have Catalan as their first language and it remains their family language. Most Catalan-speaking areas are nowadays under Spanish administration, and, except for the Spanish state, they share no political frame to rule the whole of the language's territory. State and regional borders keep speakers apart while language naturally evolves. In such a situation, the challenges on standardisation are serious in fields such as terminology and fulfilling mass media's needs. The Catalan case shows the conflict between dialects, standard language and the other languages imposed in the same territory. I propose to analyse those forces of strain on Catalan as a case study of standardisation aiming to language normalisation, both processes, standardisation and normalisation, mutually dependent.

Resumo. Oni bone scias, ke ekster Andoro la kataluna ne estas plenrajta en sia propra teritorio. Ĉie ĝi kunvivas kun lingvoj altruditaj kiel devigaj. Tiu situacio senigis la katalunan je unulingvuloj, eĉ se ankoraŭ la plejparto de ĝiaj parolantoj lernis ĝin kiel sian unuan lingvon kaj ĝi estas ilia ununura familia lingvo. La plej granda parto de la teritorio de la kataluna estas nuntempe sub hispana administrado, kaj krom tio, ne ekzistas komuna politika instanco por regi la tutan lingvan teritorion. Regionaj kaj landaj limoj dividas la parolantaron dume la lingvo nature evoluas. La defioj pri lingva normigado estas gravaj kaj temas ekzemple pri terminologio kaj adaptiĝo al bezonoj de amaskomunikiloj. La kazo pri la kataluna bone montras streĉojn inter dialektoj, norma lingvo kaj la influoj de aliaj lingvoj, altruditaj sur la sama teritorio. Mi proponas analizi tiajn fortostreĉojn kiel studkazon de lingva normigo celligata al lingvo-normaligo, du procezoj samtempe necesaj.

Enkonduko

Lingvaj kontaktoj ne estas maloftaj en historio. Male, diverseco estas ena trajto ne nur de homaro, sed de ĉiu homa komunumo. Kontaktoj inter lingvoj estas analizeblaj de la vidpunkto de strukturaj influoj, sed ankaŭ de funkciaj. Finfine, rilatoj inter lingvoj estas rilatoj inter popoloj, kiuj ofte kundividas la saman teritorion. Tavoloj de rilatoj intermiksiĝas. En ĉi tiu artikolo mi intencas analizi la kazon pri la kataluna de la vidpunkto kaj de normaligo kaj de normigo. Mi apartigos sube unu koncepton de la alia kaj klarigos la rilaton inter ambaŭ per la ekzemplo de la pristudata lingvo.

Delonge la koncepto “minoritata lingvo” cedis lokon al la koncepto “minorigita lingvo” (ekz. Alòs i Font 2010; angle “minoritized language”, ekz. Lewis & Trudell 2010; katalune “llengua minoritzada”, ekz. Pueyo 1993) por nomi tiujn lingvojn kies nombro da parolantoj eble ne estas pli malgranda ol tiu de iu plenfunkcia, plenrajta lingvo, malgraŭ ilia submeto al alia lingvo. Do per tiu koncepto ne la kvanto da parolantoj fokusiĝas kompare al aliaj lingvoj, sed la rajto uzi tiujn lingvojn por ĉiuj funkcioj de vivo. Certe ĉio dependas de la perspektivo. Kompreneble, minorigitaj lingvoj estas enhavataj de pli granda politika strukturo, kaj kadre de tiu strukturo oni iam nomas ilin “minoritataj”. La biaso ŝtata tute klaras, kun ofta preteratento al historiaj faktoj per kiuj iu lingva komunumo iĝis subaro de alia. Oni tro ofte enkadrigas minorigitajn lingvojn en la kategorion de minoritataj aferoj kaj permesas kompari ilin nur al aliaj “minoritataj lingvoj”, subkomprenante ke komparo al plenaj oficialaj, ŝtataj lingvoj nek inda, nek eblas.

Ni pritraktos ĉi tie lingvon kies parolantaro ne pli malgrandas ol kelkaj plenrajtaj, ŝtataj lingvoj eŭropaj, kaj ĝuste pro tio, nomi ĝin “minoritata” montras al biaso ŝtata. Sen tia biaso politika oni trovas komunumon kun dek milionoj da parolantoj (el kiuj preskaŭ la duono parolas ĝin kiel sian unuan lingvon). Tamen tiuj parolantoj laŭleĝe devas uzi alian lingvon (ne sian unuan) por korespondi kun sia ŝtato aŭ, ekzemple, por deklari antaŭ kelkaj justicaj instancoj, eĉ se ili decidas resti en sia denaska teritorio. Eĉ en tiu teritorio, ili kunvivas kun homoj al kiuj la leĝo rajtigas resti unulingvaj kondiĉe ke ili estas parolantoj de la ŝtata lingvo. Oni ne devas esti spertulo priroteorio por kompreni ke tia situacio igas minorigitajn lingvojn ekstreme feblaj, eĉ se nur pro la fakto ke senigo je lingvaj funkcioj finfine kaŭzas malkreskon de parolantaro.

Lingva formo ligiĝas al lingvaj funkcioj, kaj lingvaj funkcioj ligiĝas al lingva uzado. Tiuj tri elementoj gravas en procezo de lingva anstataŭo. Ni prezentos unue kiel ili kombiniĝas kaj poste kiel ili funkcias en la kazo pri la kataluna.


1. Paŝoj al lingva anstataŭo

Kiam oni lernas fremdan lingvon en lernejo aŭ en regula kurso, oni ne lernas kompreneble la plej malaltan slangon de ĝi. Male, kutime la lingvotavolo lernata estas tute neŭtra kaj ne ofta en ordinara vivo, krom akademio, administrado aŭ amaskomunikiloj. Nun imagu ke la lingvo de iu teritorio estas anstataŭita de alia lingvo pro konkero aŭ pro iu ajn alia kialo. La konkerinta lingvo iĝas la ununura oficiala de la lando. Dum generacioj, la origina lingvo de la teritorio plu daŭras kiel ĉiutaga lingvo de familio, surstrate kaj ĝenerale, en ne oficiala buŝa komunikado. Samtempe, la nova lingvo eniras en la lernejojn kaj iĝas la ununura instruata lingvo. Restas ankoraŭ amaso da unulingvuloj de la teritoria lingvo, ĉefe tiuj kiuj pro aĝaj kialoj ne frekventas lernejon. Universaligo de instruado (la edukstelsistemo atingas la tutan loĝantaron) igas la novajn generaciojn lingvokapablaj en la nova lingvo, sed ne zorgas pri instruado de la


teritoria lingvo, nun limigita al hejma transdono. Iom post iom la solaj unulingvuloj en la teritorio estas tiuj kiuj parolas la novan, altruditan lingvon. Dum longa tempo, lingvo A, apartenanta al la teritorio estas nur parolata kaj nur ne formale skribata, sed ĝi ankoraŭ estas la plej uzata en ordinara vivo. Lingvo B, la nova, estas skribata, formale uzata, kaj ĝi estas ankaŭ la ordinara lingvo de civitanoj enmigrintaj el la konkerinta potenco. Ni havas nun du malekvilibrojn:

- (1) Parolantoj: Dulingvuloj (A+B), Unulingvuloj (B)
- (2) Funkcioj: Ne formalaj lingvotavoloj (A+B), Formalaj (A)

Se oni intencas vivi la tutan vivon en tiu teritorio parolante nur la teritorian lingvon, tio ne eblas, pro tio ke la lingvo A ne plu havas oficialajn funkciojn kaj parolantoj ne plu kapablas skribi ĝin aŭ formale paroli ĝin. Krome, alvenas momento kiam parto de la loĝantaro ne posedas lingvon A, sed ĉiuj posedas lingvon B. Parolantoj de A estas subaro de parolantoj de B, kaj funkcioj de A estas subaro de funkcioj de B.



(1) Parolantoj (lingvo A / lingvo B)



(2) Lingvaj funkcioj (Formalaj /neFormalaj)


Se tiuj du malekvilibroj daŭras, la anstataŭo de lingvo A estas neevitebla. La kialo de tiu ŝanĝiĝo estas evidenta. Coulmas klare vortumas ĝin:

the reasons for language shift and the worldwide reduction of linguistic diversity it brings about are many. One sticks out, however, which warrants further discussion. Language shift is always in the direction of the language of greater utility (Coulmas 2005: 164).


Dulingveco kiel paŝo al lingvoanstataŭo estas delonge konata en sociolingvistiko. Tsunoda (2004:73) listigas studojn pri la temo. La sento ke dulingveco estas nur provizora ekvilibro en pli longa procezo finiĝonta per venko de unu el la du lingvoj ne malhelpas la paradoksan elekton de adjektivo “sustainable” ‘daŭripova’ fare de Borbély por nomi tiun paŝon ĝuste antaŭ lingvoanstataŭo:

Sustainable bilingualism is the type of bilingualism which demonstrates that it is not simply a long-term stationary phenomenon involving two languages, but rather a diverse, continuously and dynamically changing process in which Language A or Language B prevails and which can occur only under specific circumstances before the completion of the language shift both at an individual and a community level. Thus, by sustainable bilingualism I refer to the various modes of bilingualism before the completion of the language shift process (Borbély 2016: 29).

Nur se la tuta loĝantaro iĝas dulingva (C) kaj funkcioj estas klare apartigitaj inter la du lingvoj (D), la situacio povas iĝi daŭra, kaj temas pri la ofte misuzata koncepto diglosio¹:



(C) La tuta loĝantaro estas dulingva



(D) Funkcioj estas klare apartigitaj

2. Lingva normigo kiel parto de lingva normaligo

En Dols (2015) mi jam pritraktis normigadon de Esperanto, kaj tiam mi parolis pri simileco kaj malsimileco inter normigado de planlingvoj kaj tiu de naturaj lingvoj. Aliaj jam analizis la temon antaŭe (Gobbo, 2014). La nuntempa jam tradicia koncepto “lingva planado” (angle “Language planning”) temas pri normigado de lingvoj, kiel klare asertis Haugen:

By language planning I understand the activity of preparing a normative orthography, grammar, and dictionary for the guidance of writers and speakers in a non-homogeneous speech community. In this practical application of linguistic knowledge we are proceeding beyond descriptive linguistics into an area where judgment must be exercised in the form of choices among available linguistic forms. Planning implies an attempt to guide the development of a language in

¹ “it must be pointed out that diglossia is not assumed to be a stage which occurs always and only at a certain point in some kind of evolution, e.g. in the standardization process” Ferguson (1959: 326–327).

a direction desired by the planners. It means not only predicting the future on the basis of available knowledge concerning the past, but a deliberate effort to influence it (Haugen 1959: 8),

kvankam la akiro de norma (angle “standard”) lingvo bezonas kroman strebon en socia agadkampo kaj, pli precize, engaĝadon de la lingva komunumo en la procezo. Tiusence,

Language standardisation is not just a matter of language planning, the Orwellian term of “common sense” can be applied as a countermeasure for diversification, resulting in unconscious moves towards language unification. Evidence of this can be found at least in the areas of syntax and lexical morphology (Dols 2015: 52).

Oni devas krei strategion por disvastigi tiun novan aŭ refaritan lingvotavolon. Haugen (1972) jam montris ke la procezo normigi lingvon ne estas limigita al lingvistiko, sed apartenas ankaŭ al socia transformado:

	Formo	Funkcio
Socio	Selektado	Akceptado
Lingvo	Kodigado	Ellaborado

(Haugen 1972: 110).

Por ĉi tiu okazaĵo mi volas koncentriĝi pri la unua paŝo de tiu procezo: normigi la lingvon por normaligi ĝin, kaj mi tuj klarigas ke normigado temas pri la kreado de norma lingvo, do pri strukturo gramatika kaj leksika de la lingvo kiu estas regula kaj precipe utila al formala komunikado, kaj normaligado estas la ago igi la lingvon normala, do ordinara tra la tuta socio. Oni rajtas diri

normigi → krei formon por akiri (formalajn) funkciojn por lingvo

normaligi → akiri parolantojn por lingvo

Ĉu normigo egalas al korpusplanado, kaj normaligo al statusplanado? La rilato ne estas tute kompleta, almenaŭ inter normaligo kaj statusplanado. Oni uzas normaligon kiel unu el la du eblaj solvoj de lingva konflikto: anstataŭo aŭ reveno al la antaŭkonflikta situacio, kiam lingvo A estis la ĉefa lingvo de socio (Nelge 2017: angle “normalization” kaj “substitution”). Oni sendube povas plani tiun revenon per statusplanado, kaj tamen tiun revenon povas okazigi aliaj cirkonstancoj, ekzemple politika, sen konscia lingvoplanado.

Normigo gravas por akiri novajn funkciojn por la lingvo. Se pro iu kialo la parolantaro de malaperanta lingvo pro anstataŭo reagis kaj volas daŭrigi ĝin, la celo estas igi ĝin necesa kaj ne nur ornamaĵo folkloro. Krome, la lingvo riskas allogi nur

antropologojn. Kompreneble, la procezo reakiri lingvajn funkciojn dependas de la eblo politike decidi ĝiajn starton. La rilatojn inter formo kaj funkcioj, kaj inter funkcioj kaj daŭripovo de lingvoj, Weinreich jam montris en alia klasikaĵo de sociolingvistiko:

From the special point of view of interference, the various functions of languages can be significantly graded according to the conservatory effect which they produce on speech behavior. In some functions, obviously, language usage is more subject than in others to corrective forces that counteract the habitualization of interference phenomena. [...]. For the purpose of understanding and predicting language influences, the fact that one of the languages is used in the educational system (if any) is therefore of great importance (Weinreich 1953=1979: 87–88).

Nekvapil (2011) montras kiel la modelon “Reversing Language Shift” de Fishman (1991) (pri la ebleco kombini strebojn por eviti morton de lingvoj) la modelo “Catherine Wheel” de Strubell (2001) anstataŭis, kun pli granda atento al la disponigo de sufiĉaj ebloj uzi la lingvon por igi ĝin alloga al individuoj kaj, ĝuste pro tio, al la uzebleco de tiu lingvo en ĉiaj cirkonstancoj.

3. La kazo pri la kataluna. Historiaj notoj

Nun ni turniĝu al la kataluna por apliki la ĵus eksponitajn teoriajn konceptojn al ĝia situacio. Inter la deksepa kaj la dekoka jarcentoj, la kataluna landaro² perdis sian kapablon politike decidi pri sia estonto ĝenerale kaj kompreneble, ankaŭ pri lingvo. Tio okazis en 1659 por la Norda Katalunio, nuntempe en Francio ekde la Traktato de Pireneoj post la Tridekjara Milito, kaj en 1707 por Valencilando, en 1714 por Katalunio, kaj en 1715 por la Baleara Insularo post la Sukceda Milito inter Habsburgoj kaj Burbonoj. Post la venko, Burbonoj, sekvante la francan ŝtatmodelon, altrudis la kastilian hispanan kaj forpelis la katalunan el la oficialaj uzoj, eduksistemo, ktp. Tamen, ekde 1833, kaj ligata al la Romantikismo, forta movado literatura naskiĝis defendante la katalunan kiel esprimlingvon. Fine de la deknaŭa jarcento, la forta krizo kiu sekvis hispanajn malvenkojn en koloniaj militoj, kune kun la industria povo de Katalunio, okazigis ligan inter la ĝis tiam nur kultura renaskiĝo de la lingvo kaj la defendo de la interesoj de kataluna burĝaro. Iom post iom aliaj tavoloj de socio aliĝis al la movado, kaj precipe post la tiel nomata Tragika Semajno de Barcelono okazis en 1909, kiam laboristoj oponis decidon de la hispana registaro daŭrigi kolonian militon en Maroko, kaj fortaj tumultoj estis kruele sufokitaj de armeo, ĝuste antaŭ la 5a Universala Kongreso de Esperanto tie (Poblet i Feijoo 2008).

Ekde tiu tempo, la fino de la deknaŭa jarcento kaj la komenco de la dudeka, ne nur la socia rolo de la lingvo estas grava diskuttemo inter katalunparolantoj, sed ankaŭ lingvaj formoj: kio estas ĝusta kaj malĝusta, kaj kio estas konvena aŭ malkonvena

² Tiel oni nomas kutime la aron de teritorioj kie la kataluna estas parolata.

kiam temas pri norma lingvo en amaskomunikiloj aŭ por aliaj formalaj funkcioj. Jen grava simileco inter katalunparolantoj kaj esperantistoj: la lingvo mem, ne kiel ilo, sed kiel temo. Tiu diskuttemo ne estas nur anekdota, sed kiel la ĉefa identiga trajto de katalunoj, ĝi ĉiam estas la ĉefa celo de sociaj gvidantoj kaj politikistoj ĉiam kiam iugrada memregado eblas.

4. Aspektoj de lingva preskribado

Anstataŭ historie kaj laŭtempe rakonti faktojn pri la normigo de la nuntempa kataluna, mi preferas surbordigi teorion pri lingva preskribado kaj komenti la situacion de la kataluna ekde tiu perspektivo. Laŭ Myhill (2004) estas tri decidaj faktoroj pri lingva preskribo, kiuj, kompreneble, povas laŭgrade intermiksiĝi.

- a) kolekto da malnovaj tekstoj, rigardataj kiel tradiciaj fontoj de lingva ĝusteco, kiel en la hebrea, la araba, la islanda aŭ la sinhala.
- b) centra aŭtoritato kiu decidas pri la lingvo, kiel en la franca, la hispana aŭ la itala.
- c) elito kies lingvo kompetenteco estas elektita kiel imitinda, kiel en la angla.

Krom tiu konstato de Myhill, gravas ankaŭ la forto de preskribo, aŭ alivorte, kiel oni plenumas la rolon preskribi. La du bildoj ekstremaj pri preskribado estas absoluta antaŭvido de ĉiu ebla strukturo de lingvo kaj aserto pri ĝia ĝusteco, laŭ la tipa maniero de “fotelaj gramatikistoj”, laŭ esprimo de Prčić (2010) por bildigi tiujn gramatikistojn kiuj ne aŭskultas, ne esploras kaj konceptas gramatikon kiel kodon de krimleĝo:

In the past, well into the second half of the 20th century, prescriptivism was authoritarian and subjective, with armchair grammarians pronouncing their dictums, or dicta, on what is correct and what is not, in order to preserve the purity, beauty and literary excellence of the language. [...]. This inhibitive ideology, essentially philological in nature, was understandably and rightfully frowned on and revolted against by modern theoretical and general linguists for the most part of the 20th century (Prčić 2010: 213).

En la alia ekstremaĵo, lingvoj kies normigo ankoraŭ ne komenciĝis havas nur tradicion kaj kompetentecon de parolantoj kiel modelon, do mankas malimplica lingva preskribo de ili. Meze de la eblaro kuŝas moderna preskribo (Prčić 2010) kiu esploras gramatikon kaj certiĝas pri cirkulado de novaj strukturoj kaj taŭgeco de ili, kaj finfine deklaras priskribon preskribo.

Milroy (2012) avertas pri la naiva koncepto de lingvoj kiel artefaktoj kreitaj de gramatikistoj:

The ideology requires us to accept that language (or a language) is not the possession of the native speakers: they are not pre-programmed with a language

faculty that enables them to acquire (or develop) ‘competence’ in language without being formally taught [...]. What they do acquire in an informal way before school age is not reliable and not yet fully correct. In this general context ‘native speaker intuition’ means nothing, and grammatical sequences are not products of the native speaker’s mind. They are defined externally — in grammar books, and school is the place where the real language learning takes place. It is common sense that children must be taught the canonical forms of their own native language, mainly at school [...] by those who know the rules of ‘grammar’, correct meanings of words and correct pronunciation, and these rules and norms all exist outside the speaker. The (usually unnamed) authorities on whom speakers (and their teachers) depend have privileged access to the mysteries of language and have something of the status of high priests (Milroy 2001: 537).

Do nuntempa koncepto pri lingva preskribo baziĝas ne sur libervola decido de planistoj, sed pli for el tiu komenca paŝo kiu estas korpusa planado, sur agnosko de tradicio kaj sur rikoltado de tiuj solvoj kiuj koheras kun ĝi kaj povas ricevi sufiĉe da interkonsento de la parolantaro. Ĉiuj naturaj lingvoj, se vivantaj, konservas formojn pli prestiĝajn ol aliaj, kaj tiujn devas disponigi unuavice preskribaj gramatikistoj.

5. La preskribado de la kataluna

Se ni denove rigardas la katalunan, ni trovos taŭgan terenon por analizi ĉiujn tiajn koncepton: lingvo sen ŝtato, sed kun grava mezepoka kaj moderna literatura tradicio, kun diversaj dialektoj unu el kiuj plej elstaras en amaskomunikiloj, kaj kun centra lingva aŭtoritato ekde 1911. La paraleligo de tiu situacio kun la faktoroj de Myhill estas la sekva:

Tradiciaj tekstoj	Mezepoka literaturo
Centra aŭtoritato	Institut d’Estudis Catalans (ekde 1911)
Elito	Verkistoj. Centra dialekto

La diskutojn okazigis diferencoj pri la kvanto de ĉiu ingredienco de la miksaĵo. La du plej grandaj agantoj en kodigado de nuntempa kataluna estas Antoni M. Alcover i Sureda (1862–1932), el Majorco, iniciatinto de la enorma (10 volumoj) *Diccionari Català-Valencià-Balear*, leksikologia juvelo de latinidaj lingvoj kun semantika, dialektologia, fonetika kaj etimologia enhavo, unua prezidanto de Filologia Sekcio de Institut d’Estudis Catalans, kaj Pompeu Fabra i Poch (1868–1948), el Gràcia, nuntempe kvartalo de Barcelono, gramatikisto kaj vortaristo, ankaŭ prezidanto de Filologia Sekcio de IEC. La diferenco inter tiuj du lingvistoj estas analizebla laŭ la faktoroj de Myhill.

Tre simpligite oni diru ke Fabra proponis solvojn ekde profunda kono de la lingvo de elito, laŭ li verkistoj de la centra (Barcelona) dialekto, sed evitante influon de la

hispana per rimedoj ĉerpitaj de mezepoka tradicio kaj aliaj dialektoj (precipe sintaksaj kaj leksikaj elementoj). Alcover, tradicia dialektologo kun profunda kono de la tuta teritorio ne nur pro komunikado kun helpantoj de sia vortaro, sed ankaŭ per sekvaj kaj oftaj sciencaj ekspedicioj, kaj ankaŭ kun solida scienca fundamento pri latinidaj lingvoj laŭ la skolo novgramatika, celis eviti reduktadon de preskriba gramatiko al la centra elito. Pro tio, li ofte defendis la rajton de ĉiuj dialektoj iĝi “literatura lingvo”, tio kion ni hodiaŭ nomas “norma lingvo”. Por tion fari, li multe ĉerpis el mezepoka lingvo, pro tio ke dum tiu epoko, norma lingvo uzata oficiale kaj literature estis forte nevaria (Fabra 1918b=2013: 260).

La diferencoj inter la du proponoj fontis de kiom da forto oni donu al ĉiu dialekto. Post granda krizo inter ili du, kiu finiĝis per politika malvenko de Alcover, li retiriĝis en 1918 el Institut d’Estudis Catalans, kaj perdis fidon de katalunaj politikistoj (Moll 1962). Post tiam Fabra iom mildigis sian proprajn proponojn kaj restis pli atenta al la aliaj dialektoj (Fabra 1918c), sed ĉiam nur komplemente, sen gravaj devojiĝoj el sia komencaj planoj.

La unuaj modernaj oficialaj preskribaj verkoj pri la kataluna estas ortografio (1913), gramatiko (1918) kaj vortaro (1932), ĉiuj aprobatas de Institut d’Estudis Catalans, krom la gramatiko, verkita de Fabra, kaj ĉiam proponita kaj uzata de IEC, precipe laŭ ĝia eldono de 1918, sed neniam formale oficialigita. En 1932, la valenciaj verkistoj kaj intelektuloj akceptis kaj adaptis la normojn (Pitarch 2002), kaj en 1937 Francesc de B. Moll, disĉiplo de Alcover, publikigis adaptaĵon de ili por Balearaj verkistoj. Ekde tiam la unueco daŭras, kaj eĉ se politika grupo, precipe en Valencilando, iam-tiam proponas la valencian kiel sendependan lingvon, la konsento inter universitatoj, verkistoj, kaj oficialaj instancoj validas.

La streboj dum la 20a jarcento por normigi la lingvon sukcesis iĝi ĝin taŭga por ĉiaspeca uzado, kaj helpis ĝin reakiri formalajn funkciojn (administran, akademian, sciencon, ktp.). Revenante al la skemo de Haugen, daŭra ellaborado (ekzemple pri novaj sciencaj aŭ sociaj fenomenoj) estas tasko de la akademio (Institut d’Estudis Catalans) kun la helpo de TERMCAT kiam temas pri terminologio. TERMCAT (<https://www.termcat.cat>) estas la oficejo kiu unue reagis al novaj terminologiaj defioj. Fondita en 1985 de la Aŭtonoma Registaro de Katalunio kune kun Institut d’Estudis Catalans, TERMCAT estas nuntempe prestiĝa institucio kies tehnikaj proponoj kutime atingas vortaran statuson.

6. Teritoria kaj socia aksoj de lingva aŭtoritato

La rolo de lingva aŭtoritato gradiĝas sur du aksoj: teritoria kaj socia. La Filologia Sekcio de Institut d’Estudis Catalans ekde la komenco (1911) celis normigi la lingvon en la tuta teritorio kaj ĉiam serĉis membrojn ĉie. Reĝa dekreto de 1976 sankciis ĝian aŭtoritaton pri ĉiuj aspektoj pri kulturo kaj lingvo katalunaj en ĉiuj katalunparolantaj teritorioj. Tamen en 1998 fondiĝis Valencian Akademio pri Lingvo (Acadèmia Valenci-

ana de la Llengua), kiu estas deklarita en regiona konstitucio kiel oficiala akademio pri la lingvo de Valencilando. Ĉi tiu akademio deklaris en 2005 ke, kvankam oni nomas ĝin “valencia”, tiu lingvo estas la sama ol tiu parolata en Katalunio, la Baleara insularo, Andoro kaj aliaj teritorioj. La regiona konstitucio de la Baleara insularo deklaras ke la lingvo de la insuloj estas la kataluna, do ne ekzistas problemo pri nomo. Oni ne deklaras en ĝi oficialan akademion aŭ lingvan aŭtoritaton, nur diras ke Universitato de Balearaj Insuloj estas la plej alta konsila organo en la insularo pri la kataluna. Tiun deklaron, Universitato de Balearaj Insuloj ĉiam komprenis kiel ĝi estas kaj neniam arogis al si la rajton krei regulojn, kaj nur aplikas en siaj informoj regulojn de Institut d’Estudis Catalans.

Ĉi tiu estas la teritoria akso de lingva aŭtoritato pri la kataluna, kiu lastatempe fortiĝis per interkonsento subskribita de la tri institucioj, Institut d’Estudis Catalans, Acadèmia Valenciana de la Llengua kaj Universitat de les Illes Balears. La interkonsento, subskribita la 7an de Julio 2020, asertas ke la tri institucioj celas ununuran preskriban kodon por la lingvo. Tio estas historia okazaĵo kiu venas nelonge post la aperigo de nova oficiala ortografio kaj gramatiko publikigitaj de Institut d’Estudis Catalans (2016). Interparoloj inter IEC kaj AVL por eviti havi du lingvajn kodojn ja okazis post publikigo de novaĵoj, kaj AVL ĝis nun akceptis ŝanĝojn pri ortografio. La interkonsento de la 7a de Julio ja montras ke la akcepto de gramatikaj ŝanĝoj sekvos.

Ni pritraktis ĝis nun la teritorian akson de lingva konflikto pri normigo. Ekzistas alia, vertikala akso, pri ĝi. Se ni revenas nun al tiu ideo pri “fotelaj gramatikistoj” de Prčić, ni povas kompreni komentojn starigitajn de kritikistoj kiam ĵusan renovigon de lingva preskribo okazigis Institut d’Estudis Catalans. Ni diru unue ke la nova gramatiko estas pli fleksebla, malfermata al la dialekta diverseco kaj atenta al lingvotavoloj, kaj, en la senco celata de Prčić, ĝi ofte taksas gramatikajn strukturojn pli taŭgaj aŭ malpli taŭgaj al iu aŭ alia tavolo. Verŝajne tiu maniero preskribi multe ĝenis tiujn kiuj devis lerni gramatikon ekster la lernejo dum la diktaturo de Franco. Anstataŭ lerni ĝin per pli malpli natura maniero en la klasĉambro, ili devis, jam plenkreskaj, pene kaj strebe akiri ĝin. Nun strukturoj sintaksaj, dirmanieroj kiujn ili ĉiam taksis eraraj aŭ hispandevenaj, aperas en gramatiko. Certe ili aperas en gramatiko kiel apartenantaj al ne formala lingvo. Sed tio estas eble tro por ilia konservema maniero koncepti lingvon kaj ĝian preskribon. Oni devas kompreni ke en socio kie subpremo realiĝis per persekuto de teritoria lingvo, parolantoj de tiu lingvo estas tre sentemaj pri io ajn kion oni povas interpreti kiel minacon kontraŭ la lingvo, kaj tia estas laŭ multaj katalunparolantoj la rolo de hispanaj barbarismoj en la kataluna.

La vertikala akso pri regado de lingvo temas pri kiom forta devas esti preskribo. Ĉu ĝi spegulu priskribon? Certe tio estas kion pensas nuntempaj gramatikistoj ĉie, sed kiam temas pri minorigitaj lingvoj, la afero multe pli komplikiĝas. Ni vidu unu el la multaj komentoj kiuj dum pli ol tri jaroj (ankoraŭ nun) aperis en socia polemiko kiu ankoraŭ hodiaŭ daŭras:

Kvankam false optimismaj enketoj montras ke la uzado de la kataluna altiĝas, aliflanke facile videblas kiel ĝia kvalito rapide malboniĝas. Iu ajn civitano pli ol kvardekjara tuj konstatas tion. Male, junuloj, kiuj jam lernis difektiĝintan lingvon, simple ne konscias ke ili malbone parolas kaj skribas. La paradokso estas ke la plej aĝuloj, kiuj ankoraŭ parolas la originalan katalunan, penas plibonigi ĝin pli ol la plejparto de la junularo, kiuj parolas senkvalitan katalunan, for de la plej baza ĝusteco (Cercle Vallcorba, 2017)³.

Tion skribis aro da katalunaj lingvistoj, certe la plej konservemaj, kaj tiu skribaĵo eble montras konstantan opinion de la plej aĝaj generacioj en ĉiuj socioj de la mondo pri ĉiuj temoj kiam oni intencas ŝanĝi aferojn, sed ĝi montras ankaŭ kiom altvaloraj oni taksas la gramatikajn agojn de Fabra. La vera paradokso ĉi tie estas ke Fabra mem ĉiam estis fleksebla kaj laboris dialogante kun la lingvouzantoj de sia tempo. Oni scias ke antaŭ ol sankcii novajn gramatikajn preskribaĵojn, Fabra provis ilin, ofte per helpo de verkistoj. Nur post cirkulado de tiuj aĵoj li proponis ilin kiel preskribajn. Li nomis tion “demokratia teorio de normo”, kaj li asertis ke lia idealo estas lingvo sen bezono de akademio, kiel la angla⁴. Ne nur tion li pensis, sed ankaŭ ke preskriba gramatiko ne povas forgesi priskribon de reala lingvo. Tion li skribis, hispane, en 1892 pri sia gramatika skizo de la kataluna publikigita en 1891:

francaj gramatikoj montris al mi la lingvon parolatan de francoj; mia gramatiko ne montris la lingvon parolatan de katalunoj. Kaj iom post iom mi anstataŭigis ĝiajn arbitrajn regulojn per tiuj de la elparolata lingvo, akceptante ĉiujn formojn kaj partojn de ĝi, kaj tiel mi formis mian gramatikon⁵ (Fabra 1892: 4).

³ [Originale:] “Si per una banda hi ha enquestes falsament optimistes que indiquen que l’ús del català creix, per una altra és fàcil d’observar com se’n va malmetent ràpidament la qualitat. Un ciutadà que tingui de quaranta anys en amunt se n’adonarà per mica que hi pensi. En canvi, els més joves, que ja han après una llengua degradada, van perdre la consciència de parlar i escriure malament. La paradoxa d’avui és que, per un seguit, la gent gran, que encara fa servir un català força genuí, posa molt més interès a millorar-lo que no pas una gran part del jovent, que té un català deixat i allunyat d’una mínima correcció.”

⁴ “Mi mem ne scius kiel konstrui normon antaŭ submeti ĝin al tiu efikeca provo. Mi ĉiam lasas niajn verkistojn eksperimenti kaj decidi, finfine, pri ĝia taŭgeco. [...]. Mia idealo estus ke, danke al tiu meĥanismo, ni alvenu tien kien alvenis, sen akademio, Anglijo. Almenaŭ tiel ni evitus sensencaĵojn de iu ajn gramatikisto” [Originale: “Jo mateix no sabia establir una norma abans de sotmetre-la a aquella prova d’eficàcia. Deixo sempre que els nostres escriptors l’experimentin i decideixin, en definitiva, la seva viabilitat. [...] El meu ideal fóra que, gràcies a aquest mecanisme, arribéssim on ha arribat, sense Acadèmia, Anglaterra. Si més no, ens estalviariem, immunes, les atzagaiades de qualsevol gramàtic”] (Fabra en “Conversa amb Pompeu Fabra” [“Konversacio kun Pompeu Fabra”], de Tomàs Garcés, 1926).

⁵ [Originale:] “las gramáticas francesas me enseñaban el idioma que hablan los franceses; mi gramática no enseñaba el idioma que hablan los catalanes. Y poco a poco fui sustituyendo sus reglas arbitrarias por las del lenguaje hablado, aceptando todas las formas y partículas de éste, acabando por formar la gramática del mismo” (Fabra, 1892: 4).

Ne tro for de tio estas la deklaro de Filologia Sekcio de Institut d’Estudis Catalans pri sia gramatiko oficiala (2016): *en ĉi tiu gramatiko normo disvolviĝas laŭ priskribo de gramatika funkciado de la lingvo: normo kaj priskribo ne povas malligiĝi unu el la alia*⁶.

7. Resume kaj konklude

La kataluna spertis historian anstataŭan procezon per kiu la loĝantaro de la lingva teritorio laŭgrade iĝis dulingva per altrudo de ŝtataj lingvoj post perdo de politika sendependeco. En la plej vasta parto de la teritorio de la kataluna tiu nova lingvo estis la hispana. Senigita je aliro al formala uzado, unuavice la kataluna restis lingvo taŭga nur por neformalaj aferoj ĝis unue kultura kaj poste politika reago vekis la emon reakiri ĉiaspecajn funkciojn por ĝi.

Lingva planado komenciĝas per korpusa planado, kies finaj produktaĵoj ankorau bezonas perfektigon kaj disvastigon. El la tri elementoj kombineblaj en lingva preskribado, nome tradiciaj tekstoj, centra aŭtoritato kaj elitaj variantoj, la moderna preskribado de la kataluna unuagrade baziĝas sur elitaj uzmanieroj, kun aldono de solvoj elvenintaj el mezepoka literaturo. Tia kombinaĵo, sur kiu Pompeu Fabra fundamentis la normigon de la kataluna dum la unua duono de la dudeka jarcento, restis kiel la agmaniero de la centra aŭtoritato de la kataluna, ĝia akademio Institut d’Estudis Catalans, fondita en 1911. La preskriba formo de la lingvo, dezajnita dialektike per konstanta interparolo kun elitaj uzantoj, t. e. verkistoj, montriĝis taŭga por reakirado de formalaj funkcioj: aŭtonoma administrado, edukado kaj amaskomunikiloj povas nuntempe funkcii per ĝi.

Tamen la du diktaturoj spertitaj en Hispanio dum la dudeka jarcento (1923–1930 kaj 1936/39–1975/78) denove apartigis la katalunan de formalaj funkcioj kaj pligrandigis fendojn kaj inter kleraj kaj popolaj formoj kaj inter la diversaj teritorioj de la lingvo. Nuntempe la kataluna ofertas gravan studkampon por analizi “vertikalan” akson de fortostreĉoj (pri kioma grado la lingva aŭtoritato devas rekte interveni en formo de la lingvo), kaj ankaŭ “horizontalan” akson (pri kiel harmoniigi teritoriajn variantojn).

Bibliografio

- Aguilar-Amat, Anna & Laura Santamaria 1999: Terminologia i llengües minoritzades ‘Terminologio kaj minorigitaj lingvoj’. En: *Quaderns. Revista de traducció* 3: 101–112.
- Alòs i Font, Hèctor 2010: La katalunaj esperantistoj. Socilingvistika trarigardo. En: Blanke, Detlev & Lins, Ulrich (red.): *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. 558–573.

⁶ “en aquesta obra s’estableix la norma a mesura que es descriu el funcionament gramatical de la llengua: norma i descripció no es poden deslligar l’una de l’altra” (Institut d’Estudis Catalans, 2016: xxi).

- Borbély, Anna 2016: Sustainable bilingualism and language shift: Longitudinal research in Romanian–Hungarian bilingual Kétegyháza (Hungary). En: *Acta Linguistica Hungarica* 63(1): 23–61.
- Cercle Vallcorba-Plana. 2017: No deixem que el català se'ns desfaci 1. La realitat lingüística i la responsabilitat nacional 'Ni ne lasu nian katalunan malaperi 1. La lingva realo kaj la nacia respondec'. https://sites.google.com/site/cerclevallcorba/documents-i-articles/davantals#h.p_ID_72. [Revizitata la 18an de Novembro 2020].
- Coulmas, Florian 2005: *Sociolinguistics. The Study of Speakers' Choices*. Cambridge: Cambridge University Press
- Dols Salas, Nicolau 2015: Diversity, competence and standardisation in Esperanto: hints and questions. En: *JKI. Language, Communication, Information* 10: 63–84.
- Fabra, Pompeu 1918a: *Gramàtica catalana 'Kataluna gramatiko'*. Barcelona: Institut d'Estudis Catalans
- 1918b: La llengua nacional. Filòlegs i poetes. 'La nacia lingvo. Filologoj kaj poetoj'. En: Fabra, P.: *Obres completes*, vol. IX [2013]. Barcelona: Proa. 258–262.
- 1918c: La tasca dels escriptors valencians i balears 'La tasko de valenciaj kaj balearaj verkistoj'. En: *Nostra parla* 7: 4–5.
- Fishman, Joshua A. 1991: *Reversing language shift. Theoretical and empirical foundations of assistance to threatened languages*. Clevedon: Multilingual Matters
- Garcés, Tomàs 1926: Conversa amb Pompeu Fabra 'Konversacio kun Pompeu Fabra'. En: *Revista de Catalunya* 23: 485–494.
- Gobbo, Federico 2014: La kunfluo de lingvoplanado kaj planlingvoj. En: *Esperanto* 1283 (9): 188–189.
- Haugen, Einar I. 1959: Planning for a standard language in modern Norway. En: *Anthropological Linguistics* 1 (3): 8–21.
- 1962: *The Ecology of Language*. Stanford: Stanford University Press
- Institut d'Estudis Catalans 2016: *Gramàtica de la llengua catalana 'Gramatiko de la lingvo kataluna'*. Barcelona: Institut d'Estudis Catalans
- Lewis, M. Paul & Barbara Trudell 2008: Language Cultivation in Contexts of Multiple Community Languages. En: Spolsky, Bernard & Francis M. Hult (red.): *The Handbook of Educational Linguistics*. Malden: Blackwell. 266–279.
- Milroy, John 2001: Language ideologies and the consequences of standardization. En: *Journal of Sociolinguistics* 5/4: 530–555.
- Moll, Francesc de Borja 1937: *Rudiments de gramàtica preceptiva per a ús dels escriptors balearics 'Rudimentoj de preskriba gramatiko por balearaj verkistoj'*. Palma: Impremta de Mossèn Alcover
- Moll, Francesc de Borja 1962: *Un home de combat 'Batalemulo'*. Palma: Moll
- Myhill, John 2004: A parameterized view of the concept of 'correctness'. En: *Multilingua* 23: 389–416.
- Nekvapil, Jiří 2011: The History and Theory of Language Planning. En: Hinkel, E. (red.): *Handbook of Research in Second Language Teaching and Learning*. Abingdon: Routledge. 871–887.
- Nelde, Peter H. 2017: Language Conflict. En: F. Coulmas (red.): *The Handbook of Sociolinguistics*. <https://doi.org/10.1002/9781405166256.ch17>
- Pitarch i Almela, Vicent 2002: *Les normes de Castelló. Textos i Contextos 'La normoj de Castelló. Tekstoj kaj kuntekstoj'*. Castelló: Ajuntament de Castelló de la Plana

- Poblet i Feijoo, Francesc 2008: *El Congrés Universal d'Esperanto de 1909 a Barcelona / La Universala Kongreso de Esperanto de 1909 en Barcelono*. Sabadell: Associació Catalana d'Esperanto / Kataluna Esperanto-Asocio
- Prčić, Tvrtko 2010: Descriptivism or prescriptivism in teaching language and linguistics at university level?. En: *Annual Review of the Faculty of Philosophy, Novi Sad XXXV*: 211–218.
- Pueyo, Miquel 1992: *Tres escoles per als catalans 'Tri eduksistemoj por la katalunoj'*. Lleida: Pagès Editors
- Strubell, Miquel 2001: Catalan a decade later. En: Fishman, J. A. (red.): *Can threatened languages be saved? Reversing language shift, revisited: A 21st century perspective*. Clevedon: Multilingual Matters. 260–283.
- Tsunoda, Tasaku 2004: *Language Endangerment and Language Revitalization. An Introduction*. Berlino: Mouton de Gruyter
- Weinreich, Uriel 1953: *Languages in Contact. Findings and Problems*. Hago: Mouton Publishers [9a eldono, 1979]

Plurlingveco en Hispanio: la kazo de la andaluza, la malpli valorata lingvovarianto

Abstract. Multilingualism in Spain: The case of Andalusian, the least valued language variety

The variety of Spanish spoken in Andalusia has attracted the attention of linguists for decades due to its specific features. Nevertheless, outside the scientific environment it is often perceived through stereotypes and personal prejudices towards the inhabitants of the region. At present, after the 40th anniversary of the autonomy of Andalusia as one of the 17 autonomous communities of Spain was celebrated in February 2020, Andalusian varieties (*hablas andaluzas*) are undoubtedly a sign of regional identity. In relation to Andalusian, many stereotypes have been repeated for several years, regarding both its speakers and the language variety itself. These stereotypes cannot be justified, because the ability to communicate appropriately and being understood is not related to a specific geographical area, but to the language skills of each speaker. The stereotypes are linked, among other things, with the belief that all Andalusians are humorous and amusing; this is an exaggeration that affects the spread of unfair value judgments in relation to this linguistic variety. Among the negative attitudes, the supposed ridiculousness of Andalusian pronunciation can be mentioned, which is an important issue, as it can hide a vast phenomenon of unconscious or deliberate linguistic prejudice. The goal of this paper is a concise presentation of existing negative attitudes towards the Andalusian variety of Spanish. The main features of Andalusian will be presented, as well as points of view regarding attitudes concerning it, referring to possible roots of the stereotypes.

Resumo. La varianto de la hispana lingvo parolata en Andaluzio, pro siaj specifaj trajtoj ekde jardekoj loganta la atenton de lingvistoj, ekster la scienca medio ofte estas perceptata tra stereotipoj kaj personaj antaŭjuĝoj rilate al la loĝantoj de la regiono. Nuntempe, interalie ankaŭ kadre de la 40-jariĝo de la aŭtonomio de Andaluzio kiel unu el la 17 aŭtonomaj komunumoj de Hispanio, la andaluza(j) lingvovarianto(j) (*hablas andaluzas*) sendube estas unu el la signoj de la regiona identeco. Rilate la andaluzan, de pluraj jaroj funkcias multaj stereotipoj, kiuj ampleksas kaj ĝiajn parolantojn kaj la lingvovarianton mem. Tiuj ĉi stereotipoj ne povas esti pravigitaj, ĉar la kapablo komuniki en taŭga kaj komprenita maniero ne ŝuldiĝas al specifa geografia areo, sed al la lingvaj kapabloj de ĉiu homo. La stereotipoj ligiĝas, interalie, kun la kredo, ke ĉiuj andaluzoj estas amuzaj kaj humurplenaj; temas pri troigo, kiu influas la disvastiĝon de maljustaj valorjuĝoj rilate al ĉi tiu lingva varianto. Inter la sengativaj sintenoj oni notas la primokadon de la andaluza elparolo, kio estas grava afero, ĉar povas kaŝi vastan fenomenon de senkonscia aŭ intenca lingva rasismo. La celo de ĉi tiu studo estas konciza prezento de ekzistantaj negativaj sintenoj koncerne la andaluzan. Oni prezentos la ĉefajn trajtojn de la andaluza lingvovarianto, vidpunktojn pri sintenoj ĝin koncernantaj, referencante samtempe al eblaj radikoj de la stereotipoj.

1. Enkonduko

Lingvo, kiel grava ero de socia sistemo, estas ilo permesanta ne nur komunikadon inter ĝiaj parolantoj sed ankaŭ ebliganta distingi malsamajn parolkomunumojn. Samtempe, per ĉiu uzata lingvo oni manifestas apartenon al specifa lingva komunumo, ĉar la maniero de nia komunikado formas kernan parton de homa identeco, same individua kiel ankaŭ grupa.

La diferenco inter la hispana parolata en Andaluzio kaj la normigita varianto de longe logas la atenton de lingvistoj kaj filologoj. Sendube, ĉi tiu fakto ŝuldiĝas kaj al la fonetikaj apartaĵoj de la andaluza¹ (konsistigantaj unu el ĝiaj ĉefaj diferencigaj trajtoj) kaj al aliaj trajtoj kocerantaj la gramatikon kaj leksikon. Indas substreki, ke la diferencigaj trajtoj de la andaluza multfoje estis objekto de stigmatizado kaj misfamigo de tiu ĉi lingva varianto.

La celo de ĉi tiu studo estas konciza prezento de ekzistantaj ĝis nun negativaj sintenoj koncerne la andaluzan. Oni prezentos la ĉefajn trajtojn de la andaluza lingvovarianto, vidpunktojn pri sintenoj ĝin koncernantaj, referencante samtempe al eblaj radikoj de la stereotipoj.

2. La plurlingveco en Hispanio kaj statuso de ĝiaj regionaj lingvoj

Hispanio estas lando, en kiu la kunekzistado de malsamaj kulturoj kaj lingvoj estis iomgrade certigita je la nacia nivelo. En granda parto de la lando, t.e. en Katalunio, la Valencia Komunumo, Galegio, Eŭskio, Balearoj aŭ Navaro estas parolata kaj instruata pli ol unu lingvo. Ĉi-kaze la loĝantoj de tiuj ĉi regionoj estas klasifikitaj kiel dulingvanoj.

Simile, en multlingvaj landoj, samkiel en Hispanio, ĉiu lingvo akiras certan statuson en lingva hierarkio. Sekve, distingiĝas la majoritata kaj la minoritata lingvoj (Montrul 2013). Koncerne la majoritatan lingvon, ĝi estas lingvo ludanta pli gravan rolon en la lingva medio de lando, ŝtato aŭ nacio estante kutime oficiala lingvo. La minoritata lingvo povas okupi elstaran pozicion pro sia skriba tradicio kaj pro la ĉeesto en diversaj vivosferoj de siaj parolantoj: en la edukado, politiko aŭ personaj rilatoj.

En diversaj mondopartoj aŭ eĉ en diversaj regionoj de la sama lando, dulingveco povas akiri malsamajn konotaciojn, ĉar – ekzemple – ĝi povas havi fortan rilaton kun la politika situacio (ekzemple kaze de Katalunio). Unuflanke, dulingvaj parolantoj estas perceptataj kiel parto de multlingva socio, alportante internacian statuson al la komunumo. Aliflanke, estas regionoj, en kiuj la ĉeesto de dulingveco akiras negativan nuancon, ĝis neakceptebla ekstremo, kiam dulingvanoj suferas stigmatizadon aŭ marĝenigon (Montrul 2013).

¹ Ĉi tie mi uzos la adjektivon *andaluza* rilate al lingvovarianto parolata en Andaluzio konsiderante tiun ĉi varianton kiel proprajn kaj heredaĵojn de andaluzoj kaj ne nur geografia varianto de la hispana ligita kun konkreta regiono, nome kun Andaluzio.

Al la lingva situacio rilatas la tria artikolo de la hispana Konstitucio el la 1978-a jaro:

1. La kastilia estas la oficiala hispana lingvo de la Ŝtato. Ĉiuj hispanoj havas la devon koni ĝin kaj la rajton uzi ĝin.
2. La aliaj hispanaj lingvoj ankaŭ estos oficialaj en la respektivaj Aŭtonomaj Komunumoj laŭ iliaj Statutoj.
3. La riĉeco de la diversaj lingvaj variantoj² de Hispanio estas kultura heredaĵo, kiu estos objekto de speciala respekto kaj protekto.³

Koncerne la andaluzan varianton, en la lasta Statuto de Aŭtonomeco de Andaluzio (2007), en la artikolo 10, punkto 4, estas establita la sekva celo: “La defendo, promociado, pristudado kaj [zorgo pri] prestiĝo de la lingva varianto andaluza en ĉiuj ĝiaj tipoj”. Tiel do, akorde kun la du antaŭmenciitaj leĝaj dokumentoj, la andaluza dialekto, same kiel ĉiuj lingvaj variantoj uzataj en Hispanio, estas protektata, disvastiĝas kaj povas ĝui prestiĝon en la kultura kaj leĝdona medio de la lando.

Sekve, en Hispanio la ĉeesto de la tiel nomataj “aliaj hispanaj lingvoj”⁴ estas agnoskita kiel oficialaj lingvoj en iuj Aŭtonomaj Komunumoj. Krome, la aŭtonomecaj statutoj enhavas dispoziciojn pri la lingva situacio de la komunumo, en kiuj oni rajtas uzi la kunoficialan lingvon sen ia ajn diskriminacio (Herrerias 2010: 10). Tamen la sola lingvo, kiun hispanoj “devas koni”, estas la hispana. La ĉeesto de aŭtonomaj lingvoj kreskis kaj en la universitata medio kaj en administrataj institucioj. En la kleriga sektoro, inter aliaj, eblas kiel ekzemplon mencii Katalunion, kie en ĉiuj universitatoj fondiĝis “lingvaj normaligaj servoj”⁵, kies celo estas la organizado de la edukprocezo aŭ la instigo de diversaj disciplinaj studoj rilataj al la socilingvistika situacio de la komunumo. Krome, ĉiu universitato havas regularon determinantan la uzon de la reganta lingvo en internaj administrataj agoj, kaj parolaj kaj skribaj. En la administra sektoro de la Aŭtonomaj Komunumoj, oni rimarkis grandan progreson, ĉar ĉiuj aŭtonomaj registaroj de Hispanio uzas la aŭtonoman lingvon en siaj instancoj (Herrerias 2010: 20). Same la ĉeesto de kunoficialaj lingvoj videbliĝas en diversaj komunikiloj, ĉar la Aŭtonomaj Komunumoj disponas televidajn kaj radiajn staciojn.

En komunumo kie du lingvoj kunekzistas, la starigo de hierarkio inter ili estas neevitebla. Evidente, la majoritataj kaj minoritataj lingvoj ne havas la samajn rajtojn ene de lando aŭ regiono (Montrul 2013). Malsama percepto de lingvo speguliĝas en la sintenoj de ĝiaj parolantoj; tiuj de la minoritataj lingvoj kutimas havi malpli altan lingvan memfidon ol parolantoj de la majoritata lingvo (Herrerias 2010). Tiel,

² Hispanlingve: *modalidades lingüísticas*. Mi konstante kaj intence uzas esperante la vortumon lingva varianto aŭ lingvovarianto.

³ Ĉiuj origine hispanlingvaj citaĵoj estis traduktitaj al Esperanto fare de la aŭtoro de tiu ĉi studo.

⁴ Vidu la duan punkton de la tria artikolo de la hispana Konstitucio, hispanlingve: *las demás lenguas españolas*.

⁵ Hispanlingve: *servicios de normalización lingüística*

la uzo de la minoritata lingvo foje povas esti neevidenta komunika solvo por ĝiaj parolantoj, kiuj povas dubi pri la graveco de sia lingva varianto laŭ nacia skalo. Male, parolantoj de la majoritata lingvo ne havas la saman dilemon, dank' al alta socia valoro de sia lingvo.

La konekzisto de kelkaj lingvoj en Hispanio kreis serion da lingvaj fenomenoj depende de la lingvodistribuo jak uzoskalo. La uzo de du malsamaj lingvoj en iuj kunteksto nomigis diglosio. La termino implicas la malekvilibran konekzistadon de du lingvaj sistemoj en la sama komunumo (Fernández Pérez 1999). Rezulte, unu el la lingvoj havas pli altan socian prestiĝon, male, la alia distingiĝas per sia malalta statuso. La prestiĝa varianto aperas en formalaj kunteksto kaj oficialaj situacioj, dum la uzo de la malaltprestiĝa varianto regas en la neformala medio. Krome, koncerne la diferencon inter dulingveco kaj diglosio, oni subtreku, ke unu el la lingvoj distingiĝas per sia alta statuso. Se temas pri dulingveco, ne ekzistas evidenta diferencigo inter la pozicioj de lingvoj kaj iliaj funkcioj (Montrul 2013).

Dum la frankisma reĝimo en Hispanio (1939-1975), en la reganta en multaj partoj de la lando diglosio, oni favoris la uzon de la hispana super regionaj lingvoj, interalie la galega, la eŭska aŭ la kataluna. La hispana (kastilia) ĝuis specialan statuson kaj estis konsiderata kiel prestiĝa kaj klera lingvo. Tamen, kune kun la akiro de aŭtonomio fare de diversaj regionoj de la Ibera Duoninsulo okazis signifa ŝanĝo, ĉar nuntempe iuj regionaj lingvoj superis la kastilian (Junta de Andalucía, s.d.).

3. La andaluza kaj ĝiaj trajtoj

La klasifiko de la andaluza vekas grandan disputon inter diversaj aŭtoroj. Unuflanke, José Mondéjar (2007: 12) asertas, ke:

La “andaluza parolmaniero”, en la buŝo de kleraj parolantoj, ne konsistigas “dialekton” de la hispana, kiel oni foje diras, pro pluraj kialoj [interalie pro tio, ke] ĝi ne havas siajn proprajn fleksiajn formojn, nek siajn proprajn sintaksajn strukturojn, nek sian propran bazan vortprovizon, ĝis tioma grado, ke ili malhelpu komunikadon kun mez- aŭ altnivele kleraj loĝantoj de aliaj provincoj de Hispanio aŭ de Hispanameriko, kiuj parolas la hispanan kiel sia natura lingvo. [...] Veras, ke fonetike ekestas sonrealigoj netipaj por la norma hispana, sed en neniu kazo ili estas propraj nur por nia maniero sinesprimi parole, ĉar la plej multo el ili ekzistas ankaŭ en la suda duono de Hispanio, en Kanarioj kaj en la tiel nomata Hispanameriko; en tre maloftaj kazoj, iuj el ĉi tiuj prononcm manieroj influas la planon de la minimumaj mensaj unuoj, [nome] la fonemojn. Kaj tamen, pro rutino aŭ pro premo de scienca kutimo, oni parolas pri “andaluza dialektologio”.

Aliflanke, por aŭtoroj kiel María del Carmen Godoy Rodríguez (2008: 67), la kategoriado de la andaluza estas nediskutebla demando: “tio, ke la andaluza estas

dialekto estas senduba, la demando estas scii ĉu temas pri dialekto de la hispana, nome historia kastilia, aŭ de la mozaraba *aljamía*”.⁶

Krome, la sama aŭtorino asertas, ke la specifaj trajtoj, kiuj diferencigas la andaluzan disde la hispana, povas ankaŭ instigi nomi ĝin lingvo. Kvankam ekzistas neniu signifa malsimileco inter la du lingvoj, tio estas, inter la hispana kaj la andaluza, la vortfarada-semantika sfero de la andaluza konservas la vortprovizon de la mozaraba kaj la tipajn amerikdevenajn leksikajn elementojn de la kolonia periodo, kio signifgrade diferencigas ĝin disde la hispana (Godoy Rodríguez 2008: 71). Se temas pri alia plenumenda kriterio por ke la andaluzan oni povu nomi lingvo, nome la ekzisto de literatura tradicio, same Godoy Rodríguez (2008) Kaj Cenname (2016), reliefigas la *jarchas*. Plue, laŭ Cenname (2016):

[...] Ĉiuj datumoj, kiujn ni havas, indikas, ke la konataj aŭtoroj de la *moaxajas* kun *jarchas* estas andaluzoj, ĉar la granda plimulto de *jarchas* estis redaktitaj, transskribitaj aŭ kolektitaj en la nuna Andaluzio. Ili do estas parto de la kultura kaj literatura heredaĵo de Andaluzio.

Kvankam la andaluza ne havas sian propran gramatikon, vortaron kaj fiksitajn ortografian normon, inter la jaroj 1931 kaj 1939 dum la Dua Respubliko, kune kun la projekto de la Statuto de Aŭtonomeco, aperis la ideo prilabori la andaluzan gramatikon. Tamen la eksplodo de la hispana civila milito malebligis ties realigon (Godoy Rodríguez 2008: 72).

Aliflanke, kroma demando, kiu interesas esploristojn, koncernas la temon pri diversigo de la andaluza elparolo. Tiu ĉi aspekto ligiĝas kun la repopolado de la andaluzia teritorio dum la tiel nomata rekonkero (*reconquista*). Ĉar la procezo konsistis el pluraj etapoj kaj daŭris preskaŭ 300 jarojn, ĝi estigis la disvolviĝon de diversaj lingvovariantoj en la sudo de la lando. Mondéjar (2011) reliefigas la mankon de signifaj diferencoj inter la andaluza kaj la normigita hispana, ĉar la diferencoj kovras nur preskaŭ la fonetikan domajnon. Sekve, kaze de la andaluza temas nur pri “maniero prononci certan lingvon” (Mondéjar 2011: 36).

La andaluza estas do dialekto aŭ, pli ĝuste dirite, lingva varianto de la hispana, tamen ĝia plej rimarkinda trajto estas specifa elparolo.

Ĝuste la fonetikaj aspektoj de la andaluza konsistigas la plej unikan trajton de tiu ĉi lingvovarianto, ne nur pro la malsimileco kun la norma hispana fonetiko, sed ankaŭ pro diversigo ene de Andaluzio.

⁶ Kiel klarigas Godoy Rodríguez (2008: 67), la falo de la Romia Imperio kaŭzis la fragmentiĝon de vulgara latino. Sekve, okazis la formado de la latinidaj lingvoj derivitaj de vulgara latino, ekzemple de la franca, la itala, la rumana, reti-romanĉa aŭ la lingvoj nuntempe ekzistantaj en Hispanio: la kastilia, la galega kaj la kataluna. “Nia duoninsula latinida lingvo akiras malsamajn trajtojn depende de la regionoj, disigante en dialektojn, tiel ke en nia regiono, kvankam ne ekzistas atestoj, devis esti iu speco de latinida dialekto malsama ol en aliaj areoj, kiu kunfandiĝis kun la lingvo de la arabaj konkerintoj devenante la mozaraba, kiu ankaŭ havis malsamajn dialektajn trajtojn en ĉiu regiono. Ĉi tiun lingvon la araboj nomis *aljamía* aŭ fremda lingvo” (Godoy Rodríguez 2008: 68).

Sendube, unu el la plej pristudataj fenomenoj de la andaluza estas la tiel nomataj *seseo* kaj *ceceo*. La unua el ili karakteriziĝas per prononco de /θ/ kiel /s/. La *ceceo*, siavice estas prononco de la sono /θ/ anstataŭ /s/ kaj institucioj zorgantaj pri la norma hispana lingvo (kiel ekzemple la Reĝa Hispana Akademio)⁷ konsideras ĝin malprestiga kaj nerekomendata. La unuaj atestoj pri ĝia uzo devenas de la 15-a kaj 16-a jarcentoj kiam, en granda parto de Andaluzio kaj tuta Ameriko, sibilantoj spertis aron da malsamaj ŝanĝoj. Ĉi tiuj ŝanĝoj speguliĝas en la sudhispanaj tekstoj, kie “*ss* kaj *s* estas foje anstataŭigitaj per *ç* kaj *z* respektive (ekz. *paço* anstataŭ *passo*, *caza* anstataŭ *casa*) kaj inverse. [...] Tiaj ortografiaj eraroj estis la produkto de fonologiaj ŝanĝoj okazintaj en suda Hispanio, nome, la kunfandiĝo de alveolaj sibilantoj kun dentaj, profite al ĉi tiuj lastaj” (Penny 2006).

Aldone, menciindas ankaŭ:

1. la fakto, ke andaluzaj vokaloj havas alian tembron ol en la kastilia;
2. la fenomeno nomata *yeísmo*, nome la prononco de /ʎ/ kiel /j/
3. la aspiracio de konsonantoj:
 - a) la muta (nerepresentanta sonon) letero *h* devenanta el la *f* latina estas prononcata kiel /x/;
 - b) la /x/ ne estas tiom forta kiel en la kastilia;
 - c) la /s/, vortfine, aŭ estas aspiraciita (/x/) aŭ malaperas. Same okazas ene de la vorto, kiam la /s/ aperas antaŭ konsonanto;
4. la neŭtraligo de la opozicio /l/ : /r/;
5. la perdo de la [ð], [ɣ], /r/ intervokalaj;
6. la perdo de la finaj /l/, /r/, /n/;
7. la malstreĉiĝo de la /tʃ/, ekzemple la prononco de *muchacho* kiel /muŝaŝo/.

Kompare kun ampleksa nombro da studoj pri la andaluza fonetiko, lingvistoj multe malpli da atento donis al andaluza leksiko (Díaz Bravo 2006: 379). Rilate al ĝi, menciendas la termino andaluzismo (hispane *andalucismo*), kies difino aperas en la DRAE:⁸

1. Vorto aŭ lingva uzo de la andaluzoj
2. Amo aŭ alligiteco al la andaluza
3. Politika tendenco de naciisma naturo en Andaluzio

⁷ La Reĝa Hispana Akademio (hispane *Real Academia Española*, RAE) estas hispana institucio respondeca pri reguligo kaj disvastigado de la hispana lingvo en la mondo. Ĝi havas sidejon en Madrido. La institucio estis fondita laŭ la modelo de la itala *Akademio della Crusca* (1582) kaj de la *Franca Akademio* (1635) kaj, kiel ili, ĝi zorgas pri “la pureco kaj eleganteco de la kastilia lingvo”. Ĝin fondis Juan Manuel Fernández Pacheco en 1713 kaj la reĝo Filipo la 5-a aprobis ĝian fondiĝon la 3-an de oktobro 1714.

⁸ *Diccionario de la Real Academia Española* (Vortaro de la Reĝa Hispana Akademio) estas la oficiala, normiga vortaro de la Reĝa Hispana Akademio; ĝia unua eldono aperis en 1780 kaj la lasta (la 23-a) en 2014.

Unu el la ĉefaj malfacilaĵoj en la traktado de leksikaj andaluzismoj estas la problemo de ilia kapvortigado, nome la manko de grafika normaligo de andaluzaj terminoj. Sendube, rilate ĝian grafikan kodigon, ekestas la demando kiel transskribi la regionajn vortojn, ĉar la unua impulso de la kompilinto estas la transskribo laŭ la artikulaciaj trajtoj de la parolanto, kvankam kun partaj adaptoj al la ortografiaj normoj (Pons Rodríguez 2001: 310).

Koncerne la andaluzan leksikon, indas mencii la persiston de iuj leksikaj arkaismoj, daŭre uzataj de andaluzaj parolantoj, malgraŭ ilia malapero el la hispana (kastilia) vortprovizo. Laŭ Narbona Jiménez, Cano Aguilar kaj Morillo-Velarde Pérez (2011), la fenomeno de leksika konservativismo estas ligita al kamparana tradicio kaj al la marĝenigo de la andaluza teritorio, ĉar “en la vortprovizo de la ĉefaj agadoj de homoj, tiuj, kiuj rilatas al la tero, regas la kastilia elemento” (Cano Aguilar k. al. 2011: 88). Aldonendas, ke rilate al andaluzismoj, la DRAE enkondukas pli kaj pli karakterizajn por tiu ĉi parto de la lando terminojn. Tamen samtempe tra diversaj eldonoj de la vortaro multaj regionaj terminoj malaperis pro la novaj kriterioj koncerne la enhavon de vortaroj (Mendoza Abreu 2004: 99).

4. La lingva sinteno

Unu el la aspektoj tre ligitaj al la stereotipoj pri lingvaj variantoj koncernas la lingvaj sintenojn, kies difinon proponas Moreno Fernández (2009: 178):

La lingva sinteno estas manifestiĝo de la socia sinteno de individuoj, distingiĝanta per fokuso kaj referenco specife al lingvo kaj ties uzo en la socio, [...] parolante pri “lingvo” ni inkludas iun ajn specon de lingva varianto: sintenoj al diversaj stiloj, diversaj sociolektoj, diversaj dialektoj aŭ malsamaj naturaj lingvoj.

La fenomeno de lingvaj sintenoj koncernas esence kredojn kaj opiniojn, kiuj referencas same al la kompreno de la lingvo kiel ankaŭ al la percepto de la rilato inter lingvo kaj socio. En malsamaj situacioj la stimuloj kaŭzas sintenon, kiu povas difini la konduton de individuo. Ĉi-kaze la stimuloj koncernas la lingvan medion, specife la skriban aŭ parolan lingvon, estante temo de individua pripensado kaj pozitiva aŭ negativa valorigo (Moreno Fernández 2009). La plej rimarkinda trajto de tiaj sintenoj estas ilia komplekseco, ĉar ili ampleksas malsamajn vidpunktojn. Krome, oni konsideras, ke sintenoj ne estas denaskaj, sed lernitaj, ĉar ilia akiro okazas per propraj spertoj kaj kunvivado en iu specifa medio.

Sintenoj rilate lingvon efektivigas je ĉiuj niveloj: ortografio, interpunkcio, vortprovizo, gramatiko, akĉento kaj prononco. Eĉ la parolrapido kaŭzas malsamajn reagojn. Kompreneble sintenoj inkluzivas diversajn lingvojn, iliajn variantojn aŭ dialektojn. Ĝenerale negativaj sintenoj ampleksas la tuton de iu lingvo aŭ lingva varianto kaj ne nur unu el ĝiaj sferoj (Garrett 2010). Aldonendas, ke iuj el la fundamentaj lingvaj sintenoj kreiĝas kune kun la aliro al la eduksisitemo. Konsekvence, same gepatroj

kiel instruistoj iom influas la disvolviĝon de sintenoj. La procezo okazas intence aŭ senkonscie. Ĉi-kaze la rolo de gepatroj estas eĉ pli signifa, ĉar ili povas esprimi sian aprobon aŭ malkonsenton rilate al la sintenoj de siaj infanoj. Krome, dum la kreiĝo de sintenoj substrekenda estas la influo de la amaskomunikiloj.

Laŭ González Martínez (2008), la koncepto de sinteno ampleksas diversajn viziojn. Unuflanke elstaras lingva konscio, t.e. la percepto de la lingva sistemo mem kaj ankaŭ konscio pri la rilatoj establitaj inter malsamaj lingvoj. Tamen fundamentan rolon ludas ankaŭ la demando pri prestiĝo, socikulturaj, ekonomiaj aŭ eĉ politikaj aferoj, kiuj influas lingvouzantojn.

5. Sintenoj rilate al la andaluza kaj ties perceptado

Rilate la andaluzan, de pluraj jaroj funkcias multaj mitoj, kiuj ampleksas kaj ĝiajn parolantojn kaj la lingvovarianton mem. Laŭ Carbonero Cano (2003: 123), “ekestis la ideo, ke paroli la andaluzan povas influi la komunikan klarecon kaj krei mesaĝojn ne tute kompreneblajn. Tiel do, bona komunikanto rezignu pri fonetika andaluzismo kaj prononcu kun kastilia klareco”. Temas pri malĝusta vidpunkto pri la andaluza varianto, ĉar la kapablo komuniki en taŭga kaj komprenita maniero ne ŝuldiĝas al specifa geografia areo, sed al la lingvaj kapabloj de ĉiu homo. Sendube, granda nombro da edukitaj andaluzaj parolantoj en profesiaj medioj elstaras pro sia prononco proksima al la nordkastilia normo, dank’ al kio ili evitas ĉiuspecajn erarojn aŭ malklerajn uzojn konservante samtempe la ĉefajn andaluzajn trajtojn en sia parolado kaj, tiel, la andaluzan identecon.

En 2010, la mito pri nekomprenebleco laute eĥis en la hispana politika medio. Antaŭ la madridaj urbaj antaŭbalotoj, tiuurba deputito flanke de PP⁹ de Madrido, Juan Soler, en propra blogo diskonigis sian opinion pri la akĉento de la ministrino pri sanprotekto, Trinidad Jiménez, devenanta el Malago. Liaj vortoj vekis akran diskuton en la ĉefaj amaskomunikiloj en Hispanio:

La vicparolanto de la PP en la Madrida Asembleo, Juan Soler, konsideras, ke la kandidato al la unua loko en la balotlistoj de PSOE¹⁰ por la Prezidenteco de la Komunumo, Trinidad Jiménez, estas “poltrona kandidato” por la regiono, ĉar al ŝi mankas “la fono kaj pacienco de Madrido kaj ŝia akĉento igas ŝin pli taŭga por Dos Hermanas aŭ Vélez-Málaga”.¹¹ (El Mundo 2010)

Tamen, la sekvan tagon la deputito decidis halti la akran polemikon koncerne lian komentarion kaj pardonpetis Trinidad Jiménez esprimante sian grandan intereson

⁹ Temas pri *Partido Popular* (‘Popola Partio’).

¹⁰ Temas pri *Partido Socialista Obrero Español*, esperante: *Hispana Laborista Socialista Partio*; nuntempe estas unu el la plej gravaj politikaj partioj en Hispanio, ekde jaroj la ĉefa adversa politikforto de PP.

¹¹ Temas pri du provincaj urboj de Andaluzio.

pri Andaluzio. Ĉiukaze la konduto de Juan Soler klare montras, ke la elparolo de andaluzoj estas akceptebla nur ene de ilia propra komunumo kaj ĝia manifestado en la Madrida Aŭtonoma Komunumo estis – en la opinio de la PP-deputito – maltaŭga.

Alia riproĉo rilate al la andaluza, kiu aldoniĝas al stereotipoj pri tiu ĉi lingvovarianto, estas ĝia identigo kiel vulgara parolo. Laŭ Carbonero Cano (2003), lingvo – estante sistemo de signoj – funkcias kiel instrumento en ĉiu parolantokomunumo kaj tial oni ne povas argumenti, ke ekzistas pli bona komunikilo ol aliaj. Tamen li aldonas, ke necesas, ke ĉiu lingvo havu la ekzemplan modelon. Sekve, kompare kun “oficiala hispana” (nome la kastilia varianto), aliaj lingvaj variantoj uzataj en Hispanio akiris la statuson de “eraraj” lingvospecoj. Tamen la transformo de lingvoj kaj ilia fragmentiĝo je aliaj variantoj montras, ke ili vivas. Sekve geografia (t.e. teritoria) aparteno ne speguliĝas en la taŭga, erara aŭ vulgara komunikmaniero de ĝiaj parolantoj (León-Castro Gómez 2016: 1585).

Kiel oni jam menciis, el historia perspektivo la andaluza rezultis el evoluo de la hispana, do iuj socilingvistikaj studoj indikas, ke ekzistas “populara konsidero, ke la andaluza estas malbone parolata hispana aŭ malĝusta maniero paroli la hispanan” (Carbonero Cano 2003: 127). Ne nur en Hispanio regis la konvinko, ke la lingvovarianto parolata en la ĉefurbo, kie troviĝis la reĝa kortego, estas la ekzempla lingvomodelo. Tiel, kompare kun “oficiala kastilia”, aliaj variantoj ne estis konsiderataj ĝustaj. Sed tio ja signifas konsideri la trajtojn de unu lingvovarianto laŭ la perspektivo de alia; tamen unu lingvovarianto ne povas “logike kongrui kun la alia en ĉiuj siaj trajtoj, ĉar ĝi havas siajn proprajn” (Carbonero Cano 2003: 128). Aliflanke, evoluo estas esenca karakterizaĵo de lingvoj, klara manifestacio, ke ili vivas kaj ŝanĝiĝas, do oni ĝin ne komprenu kiel koruptadon. Nuntempe oni ne difinas la hispanan kiel “malbone parolatan latinon” pro la nura fakto, ke ĝi ankaŭ aperis evoluiginte el pli frua lingvo. Evidente, en la kazo de nekomprenebleco, la demando koncerne la “bonan parolon” estas ofte traktata malĝuste, ĉar ĝi estas ligita al la aparteno al iu geografia areo, anstataŭ esti asociata kun la parolantoj mem, kiuj – sendepende de sia devenloko – kapablas konstrui koheran, taŭge kunligitan diskurson, kiu havas taŭgajn strukturojn kaj vortprovizon.

Menciindas, ke ĝis la 1956-a jaro, la Reĝa Hispana Akademio konsideris *seseo* kiel vulgaran trajton, malgraŭ la fakto, ke la fenomeno koncernas 90% de parolantoj de la hispana, same latinamerikanojn kiel loĝantojn de la Kanariaj Insuloj kaj grandan parton de andaluzoj. Krome, oni memoru pri tio, ke la tiel nomata ekzempla hispana antaŭe estis parolata en Kastilio la Malnova. Fakte, ekde kiam la hispana lingvo naskiĝis en Burgos, dum jarcentoj la lingvaj normoj diktis Valladolid, Madrido, Leono, Salamanko aŭ Toledo. Tamen, kiel klarigas Francisko Torres Montes:

[...] La modelo de klera hispana lingvo ne plu estas ie; ĝi estas ĉe la parolantoj, kiuj havas la plej bonan lingvan kompetentecon: estu ili peruanoj, gvatemalanoj aŭ hispanoj. (...) La Akademio purigas, difinas kaj zorgas pri la splendo,¹² sed

¹² Origine: *La Academia limpia, fija y da esplendor*.

tiuj, kiuj havas la lastan vorton, estas la parolantoj kaj, inter ili, la plej bonaj parolantoj. Ĉiu nova fenomeno aperas kiel vulgarismo, sed se ĝi disvastiĝas kaj sukcesas, ĝi fariĝas normo (Ideal 2009).

Se temas pri andaluzoj mem, ili

[...] konscias pri tio, ke ilia lingvo estas evidente la hispana, sed ankaŭ pri tio, ke ili parolas ĝin laŭ maniero(j) kiu(j) (j) havas tiom markitajn trajtojn, ke ili estas ĝenerale identigitaj kaj rekonataj facile kaj tuj. [...] La andaluzajn variantojn¹³ oni traktu kiel aron da trajtoj, ĉefe prononcilataj, geografie kaj socikulture neegale distribuitaj kaj interkruciĝantaj unu kun la alia. (Cano Aguilar k. al. 2011: 18)

Dum la lastaj jaroj aperis bezono inter andaluzoj kontraŭbatali erarajn stereotipojn pri sia lando. Ĉiam pli, andaluzoj klopodas klarigi la stereotipojn rilate al ilia parolmaniero kaj esprimi siajn sentojn per paroladoj, filmoj aŭ skribitaj artikoloj emfazante sian devenon.

La blogo *Identidad Andaluza* (‘Andaluza Identeco’) kiel ĝia nomo indikas, estas dediĉita al temoj rilatantaj al la situacio de andaluzoj. En unu el la blogartikoloj, oni klopodas proksimigi al la legantoj la lingvan realaĵon de la andaluza. En la teksto oni legas, ke la andaluza havas la statuson de ridinda lingvo, ligita al malalta eduka nivelo. La parolmaniero de andaluzoj estas perceptata kiel malbone parolata kastilia, dum iliajn parolantojn oni perceptatas kiel amuzaj.

La ĉarmo/gracio/amuzeco¹⁴ rilatas al la sekva mito, kiu koncernas same andaluzojn mem kiel ankaŭ ilian parolmanieron. La kredo, ke ĉiuj andaluzoj estas amuzaj kaj humurplenaj, estas tre troigita, precipe en la amaskomunikiloj, kiuj influas la disvastiĝon de temoj rilataj al ĉi tiu lingva varianto (León-Castro Gómez 2016). La primokado de la andaluza elparolo estas grava afero, ĉar “inter ĉiuj stereotipoj pri andaluzoj, malmultaj estas tiom ĝenaj kiel tiuj rilatantaj al ilia parolmaniero [ĉar] tiuj ĉi tiom amuzaj stereotipoj pri andaluza elparolo, povas kaŝi vastan fenomenon de lingva rasismo, senkonscia aŭ intenca, kiu etendiĝas de nordo suden” (Caraballo 2014).

Oni donu la atenton ankaŭ al la eduksistemo. De la unuaj jaroj de lernado de la hispana, andaluzaj infanoj konscias pri la diferencoj en la lingva sistemo, kiun ili uzas kompare kun la kastilia normo reganta en tutlandaj amaskomunikiloj. Komence ili ne perceptas sian lingvon kiel malsaman rilate al la hispana aŭ kiel ĝian dialekton; ili simple rimarkas la malsaman elparolon. Kun la paso de la tempo, ili konstatas, ke ilia lingva varianto estas sub la premo de “pura” kastilia hispana lingvo, kio povas kaŭzi situaciojn de stigmatizado de la andaluza alkondukante al komplekso de malplivaloreco, malsupereco. Tomás Gutier (2006: 124) atentigas pri tio, ke

¹³ Origine: *hablas andaluzas*

¹⁴ Ĉiujn tiujn signifojn enhavas la hispana vorto *gracia*.

andaluza disglosio¹⁵ apartenas al la tiel nomata ortografia tipo, tio estas, la loĝantaro parolas en unu lingvo (andaluza) ricevante sian edukadon kaj skribante en alia (hispana). Ĉi tiu situacio kaŭzas multajn lingvajn problemojn, malhelpante la lernoprocezon, kio rezultigas malaltan edukkvaliton, kreas fortan malsuper-ecan komplekson kaj kaŭzas ke pli ol duono de andaluzaj lernejoj finas siajn studojn ne akirinte plenan regon de la skribokapablo.

Tamen estas grave, ke andaluzoj komprenu, ke paroli laŭ la propra maniero ne malaltigas ilian socian statuson. La lingva diverseco en la hispanlingva mondo estas tiom varia, ke neniu el la uzataj variantoj estas malĝusta aŭ misa. Tio, kio evidente ŝanĝiĝas estas la elparolmaniero; tamen elparoli malsame neniel ĝenas la vortoprovizon aŭ la lingvan riĉecon.

Konklude, la blogo *Identidad Andaluza* prezentas iel ekstreman vidpunkton pri la percepto de la andaluza lingvovarianto. Laŭ ĝiaj vortoj, la hispana instrusistemo klopodas distancigi gelnantojn de ilia lingva identeco, ĉi-kaze la andaluza identeco, ĉar ĝi fokusiĝas pri la historio de la hispana lingvo kaj ĝia trejnado. Krome en la blogo oni riproĉas kaj politikistojn kaj andaluzojn pro manko de volo plifortigi la prestiĝon de la andaluza lingvovarianto, kio povus alkondi al konsiderado de la andaluza kiel lingvon. Tamen oni aldonu, ke la blogartikoloj estis verkitaj en 2007, kaj en la lastaj dekelkaj jaroj okazis diversspecaj ŝanĝoj influantaj la lingvan identecon de Andaluzio kaj la sintenojn de ĝiaj loĝantoj.

Multe pli kompleksan vidpunkton pri la lingva situacio de andaluzoj prezentas Manuel Rodríguez Illana, universitata eksperto pri institucia komunikado kaj politika merkato, en la revuo *Pensamiento Andaluz* ('Andaluza Penso'). Laŭ li, la situacio de subordineco kaj subvaloro de la lingvo uzata en la regiono kaŭzas la aperon de memmalamo inter ĝiaj parolantoj, t.e. fenomenon disvastigitan tra la tuta teritorio de Andaluzio, kiun la aŭtoro nomas *endo-andalofobio*. (Rodríguez Illana 2017). La radiko de la problemo troviĝas en la konkero de la lando de la andaluzoj fare de la nordaj reĝolandoj de la Ibera Duoninsulo. Ĉi tiu evento influis la uzon de la normigita lingvo en suda Hispanio, samtempe ekskludante lingvojn, kiuj ne havis la statuson de normigitaj lingvoj. Laŭ la aŭtoro, la nuna situacio de la andaluza estas ligita al la sento de la nekapablo regi sian propran landon, iam truditan al la andaluzoj. Laŭ Rodríguez Illana, dum multaj jaroj Andaluzio troviĝis en ia infaneca stato kaj estis administrata de eksteraj mastrumantoj.

6. Konkludoj

La celo de ĉi tiu studo estis doni la atenton al diversaj lingvaj sintenoj rilate al la andaluza varianto de la hispana lingvo. Malgraŭ tio, ke tiu ĉi varianto estas konsiderata kiel unu el la plej riĉa je specifaj trajtoj, precipe fonetikaj, ĝi daŭre estas malestimata pro

¹⁵ Oni referencas al perturbo neŭrorilata de la artikulacio de fonemoj, pro anatomiaj kaj/aŭ fiziologiaj ŝanĝoj de artikulaciorganoj, kiuj malhelpas la lingvoproduktadon ĉe homoj.

granda nombro da stereotipoj kaj antaŭjuĝoj al ĝi rilatantaj. Sendube, la menciita manko de prestiĝo estas proksime ligita al la malproksimeco disde la norma kastilia hispana kaj kaŭzas la atribuan al la andaluza de malpli alta statuso inter ceteraj lingvovariantoj de la hispana uzataj en Hispanio. La malsimileco kun la norma lingvo elstaras ĉefe en la elparolo de andaluzoj; pro siaj specifaj fonetikaj trajtoj tiu ĉi lingvovarianto povas ŝajni eĉ nekomprenebla por aliaj parolantoj de la hispana. Kritikantoj de la andaluza akuzas ĝin, interalie, pri malplenumo de lingvaj normoj establitaj de la Reĝa Hispana Akademio, kio siavice kaŭzas, ke ĝi estas perceptata kiel varianto, en kiu oni parolas mapli klare, kontraste al la norma hispana.

Ekzistas diversaj klarigoj pri la origino de la stereotipoj rilataj al la andaluza varianto. Sendube, la kresko de turismo kaj disvolviĝo de amaskomunikiloj en la 60-aj jaroj de la pasinta jarcento kaŭzis disvastigon de stereotipa imago reliefiganta la pigrecon kaj humuron de andaluzoj. Same, la distingo inter okcidenta kaj orienta andaluza estas faktoro tre grava ligita al la valoro en la lingva medio de la lando. Pro pli proksima proksimeco al norma hispana kaj signifa historia konsidero, la okcidenta andaluza ĝuas signifan prestiĝon kontraste al la orienta subvariante. Sekve, la okcidenta andaluza elstaras en regionaj amaskomunikiloj.

Komence de la 21-a jarcento oni notis inter andaluzoj pli fortan bezonon kontraŭbatali erarajn stereotipojn pri ilia regiono kaj ties lingvovariante. Andaluzoj montras tre pozitivan sintenon al sia lingva variante kaj klopodas altigi ĝian statuson inter la ceteraj lingvovariantoj en Hispanio rifuzante la malsuperan komplekson al ili atribuitan. En Hispanio kunekzistas granda nombro da dialektoj kaj lingvaj variantoj de la hispana, tamen neniu el ili estas erara, misa aŭ netaŭga, ĉar ne ekzistas lingvovariantoj superaj al la aliaj, sed nur tiuj, kiuj ĝuas malpli da prestiĝo. Lingvoj estas vivantaj sistemoj, kiu senĉese evoluas kaj ŝanĝiĝas, dank' al kio aperas novaj lingvovariantoj. Ili ĉiuj, servante al konkretaj parolantokomunumoj, meritas la saman traktadon en la lingva medio. La samo okazas kun la andaluza. Sendube, oni ne apliku la kategorion de gramatika praveco al la andaluza prononco; farante tion oni fortigas la stereotipon pri "malpura" versio de la hispana. Kvankam estas grave rekoni la gravecon de la norma lingvo, kiu ja kunigas parolantojn, la ekzisto de aliaj lingvoj en la duoninsulo estas distinga trajto de Hispanio kaj iu ajn aludo al ŝajna lingva malsupereco ne havas sciencajn bazojn.

La andaluza variante portas sur si ian socian stigmaton motivitan de eksterlingvaj kialoj kiel la lingva politiko de la lando, antaŭjuĝoj kaj stereotipoj, historiaj kaj kulturaj faktoroj aŭ manko de lingva konscio. Tamen, ĉerpante argumentojn interalie el sciencaj esploroj, hispanaj lingvovariantoj historie malpli prestiĝaj komencas ĝui pli egalecan statuson, kiun sendube ili meritas. Krome, dank' al kreskanta konscio pri etnaj kaj kulturaj diferencoj, la heredaĵo kaj lingva variante de andaluzoj akiras pli grandan socian valoron. Same kreskas la memfido kaj fiero de la parolantoj de la andaluza variante, kio plifortigas ilian lingvan identecon.

Sendube, la andaluza lingvovariante, pro sia komplekseco kaj sistema riĉeco, daŭre logas la atenton de lingvistoj kaj esploristoj de aliaj sciencaj kampoj. Malgraŭ

sufiĉe multnombraj studoj ĝisnune realigitaj, ekzistas multaj esplorindaj demandoj. Oni esperas, ke la progreso de la studoj pri la andaluza lingvovarianto permesos revalorigi ĝian statuson kaj substreki ĝian apartan rolon en la lingva medio de Hispanio.

Bibliografio

- Cano Aguilar, Rafael, Narbona Jiménez, Antonio & Morillo-Velarde Pérez, Ramón 2011: *El español hablado en Andalucía* 'Hiszpański mówiony w Andaluzji'. Sevilla: Fundación José Manuel Lara
- Caraballo, Javier 2014: Andaluz y culto, raro, raro... 'Andaluzyjczyk i wykształcony, dziwne to, dziwne...'. https://blogs.elconfidencial.com/espana/matacan/2014-09-04/andaluz-y-culto-raro-raro_185352
- Carbonero Cano, Pedro 2003: *Estudios de sociolingüística andaluza* 'Badania nad socjolingwistyką andaluzyjską'. Sevilla: Universidad de Sevilla
- Cenname, Anne 2016: Rasgos lingüísticos andaluces en las jarchas romances 'Andaluzyjskie cechy językowe w jarchas romańskich'. En: *VIIIª Hunta / Reunión / Meeting de escritores-as en andalú* 2016: 39. DOI: 10.13140/RG.2.1.3353.1769
- Díaz Bravo, Rocío 2006: Aportación al estudio del léxico andaluz 'Wkład w badania leksyki andaluzyjskiej'. En: *Actas del XXXV Simposio Internacional de la Sociedad Española de Lingüística*. 379–399.
- El Mundo 2010. <https://www.elmundo.es/elmundo/2010/08/18/madrid/1282156044.html>
- Fernández Pérez, Milagros 1999: *Introducción a la lingüística: dimensiones del lenguaje y vías de estudio* 'Wstęp do językoznawstwa: wymiary języka i kierunki badań'. Barcelona: Editorial Ariel
- Garrett, Peter 2010: *Attitudes to Language*. Cambridge: Cambridge University Press
- Godoy Rodríguez, María del Carmen 2008: ¿Qué es el andaluz? 'Czym jest andaluzyjski'. En: *Actas IVª Hunta d'ehkriteoh en andalú / Reunión de escritores-as en andaluz / 4th Meeting of Andalusian Writers* 2008: 65
- González Martínez, Juan 2008: Metodología para el estudio de las actitudes lingüísticas 'Metodologia badań postaw językowych'. En: *Actas del XXXVII Simposio Internacional de la Sociedad Española de Lingüística (SEL)*. <https://core.ac.uk/download/pdf/324051726.pdf>
- Gutier, Tomás 2006: *En defensa de la lengua andaluza* 'W obronie języka andaluzyjskiego'. Córdoba: Almuzara
- Herreras, José Carlos 2010: Políticas de normalización lingüística en la España democrática 'Polityka normatywizacji językowej w demokratycznej Hiszpanii'. En: *Actas del XVI Congreso de la Asociación Internacional de Hispanistas: Nuevos caminos del hispanismo*, 20
- Ideal 2009: <https://www.ideal.es/granada/20090115/cultura/polemica-eha-servia-20090115.html>
- Junta de Andalucía s. d.: *Bilingüismo y diglosia* 'Dwujęzyczność i dyglosja'. http://agrega.junta-deandalucia.es/repositorio/12022013/e4/es-an_2013021213_9101930/ODE-2357ea80-3aa4-3245-a61a-442e9fad36c/11_bilinguismo_y_diglosia.html
- León-Castro Gómez, Marta 2016: La presencia del andaluz en los medios de comunicación 'Obecność andaluzyjskiego w środkach masowego przekazu'. En: *Actas del I Congreso Internacional Comunicación y pensamiento*. 1583–1600.

- Mendoza Abreu, Josefa María 2004: Andalucismos y DRAE: su consideración en la clase de vocabulario ‘Andalucyzymy i DRAE: ich rozpatrywanie na zajęciach o słowniku’. En: *Puertas a la lectura*, (17). 98–109.
- Mondéjar, José 2011: Las hablas andaluzas: teoría, campos de investigación y textos ‘Gwary andaluzyjskie: teoria, obszary badawcze i teksty’. En: P. Carrasco Cantos, F. Torres Montes (red.) *Lengua, historia y sociedad en Andalucía*. Iberoamericana: Vervuert 2011: 17–122.
- Montrul, Silvina 2012: *El bilingüismo en el mundo hispanohablante* ‘Dwujęzyczność w świecie hiszpańskojęzycznym’ Hoboken: John Wiley & Sons
- Moreno Fernández, Francisco 2009: *Principios de sociolingüística y sociología del lenguaje* ‘Założenia socjolingwistyki i socjologii języka’. Barcelona: Ariel
- Penny, Ralph 2006: *Gramática histórica del español* ‘Gramatyka historyczna hiszpańskiego’. Barcelona: Ariel Lingüística.
- Pons Rodríguez, Lola 2001: Sobre la definición de „andalucismo léxico”: el “Diccionario de autoridades” ‘O definiowaniu „andaluzycyzmu leksykalnego”: “Diccionario de autoridades”’. En: *Interlingüística* 11: 309–313.
- Rodríguez Illana, Manuel 2017: “¡Niño, habla bien!”: Reflexiones sobre la colonización lingüística en el sistema educativo andaluz. ‘„Dziecko, mów poprawnie!”: refleksje nad kolonizacją językową w andaluzyjskim systemie edukacji. <http://pensamientoandaluz.org/index.php/m-rodriguez/118-nino-habla-bien-reflexiones-sobre-la-colonizacion-lingueistica-en-el-sistema-educativo-andaluz.html>

Language policy in contemporary Iran: The case of Assyrian and Mazandarani

Resumo. Lingvopolitiko en nuntempa Irano – kazo de Asirianoj kaj Mazandaranoj
Ĉi tiu studo analizas lingvajn aspektojn koncerne kristanajn minoritatojn de Asirianoj kaj ŝijaismaj Mazandaranoj en multkultura kaj multlingva Islama Respubliko de Irano. Tiom fragila pluretna ŝtato kia estas nuntempa Irano kaŭzas ke la centraj aŭtoritatoj speciale atentis pri konservo de landa unueco kaj pri antaŭenigo de unu komuna identeco, kiu povus esti konstruita same sur la „irana patriotismo” kiel sur la „ŝijaisma ummo” – komunumo de kredantoj. Ŝlosila elemento de ĉiu identeco estas la lingvo – tial la Konstitucio diras, ke persa lingvo estas promociita kiel ununura oficiala lingvo de Irano, kaj araba kiel lingvo de Islamo, kiu spirite kunligas popolon. Lingvopolitiko devas konsideri atendojn de la civito kun duobla aŭ diversspeca identeco, kiel Asirianoj, kiuj sentas sin kiel Irananoj, sed ankaŭ estas fieraj pro tio ke ili estas kristanoj, Asirianoj uzantaj asirian lingvon. Kiel ankaŭ atendojn de loĝantoj de Mazandarano, iam sendependa duklando, kiuj sentas sin Irananoj, sed estas Islamanoj fieraj de sia loka lingvo. Daŭras debato pri la statuso de gepatra lingvo kaj de ĝia instruado en lernejoj kuntekste de ambiguaj juraj normoj.

Abstract. This paper examines linguistic issues with regard to the Christian Assyrian and Shia Mazandarani minorities in the multicultural and multilingual Islamic Republic of Iran. Such a fragile multi-ethnic state makes the central authorities in Tehran pay special attention to maintaining the country’s unity and promoting one common identity which may be built both on ‘Iranian patriotism’ and the ‘Shia Islamic *umma*’ – the community of the faithful. The key element of each identity is the language – thus, as it has been stated in the supreme law of the land, Persian is promoted as the official tongue of the Iranian nation and Arabic as the language of Islam which unites the nation spiritually. Such a linguistic policy must, however, take also into account the expectations of peoples with double or multiple identities such as Assyrians who feel they are Iranians but also are proud to be Christians, Assyrians and users of the Assyrian language; as well as the expectations of residents of Mazandarani, once an independent principality, who feel they are Iranian and are Muslims but take pride in their local language. A dispute has arisen about mother tongue status and instruction at schools as a result of ambiguous provisions in the law.

1. Introduction

Iran is a country of great linguistic diversity. Apart from the official Persian language, local communities use their vernaculars in various non-official contexts. The use of a language, apart from practical aspects related to communication is one of the most visible manifestations of identity, often a double or multiple identity. As

Iranians, inhabitants of Iran speak Persian, study Persian at school, and take pride while reading elaborate works by Ferdowsi, Sadi or Mowlana or singing the national anthem before the kick-off of an international football match. They need to master Persian to graduate from school or get a good job. However, apart from being Iranians they also call themselves Mazandaranians, or Assyrians, or any of dozens of other regional or local ethnic groups. Most of them also speak their own local languages although Persian enjoys an unchallenged position as the only official language of the state, supported strongly by Iran's legal, political, and educational structures.

1.1. The Language question in the Constitution of the Islamic Republic of Iran

General guidelines concerning minority languages such as Assyrian and Mazandarani in Iran are embedded in the supreme law of the land, the Constitution of the Islamic Republic of Iran. Article 15, chapter two of the Iranian Constitution reads: 'The official language and script of Iran, the lingua franca of its people, is Persian. Official documents, correspondence, and texts, as well as textbooks, must be in this language and script. However, the use of regional and ethnic languages in the press and mass media, as well as for teaching of their literature in schools, is allowed in addition to Persian' (Rasaenia 1998).

On the one hand, the most privileged position is granted to the Persian language as the lingua franca of the nation, the only recognised language in government offices and the most useful language; on the other hand, as far as regional and ethnic languages are concerned, the Constitution has a rather liberal approach, permitting their usage in the media and teaching their respective literatures in schools. Such a clear imbalance of power may lead to gradual Persianisation or even the death of some minority languages in Iran. The question remains if this is the case for Mazandarani or Assyrian.

1.2. A linguistic melting pot

The linguistic composition of Iran is impressive and comprised of languages belonging to the Indo-European family, such as Persian, Kurdish, Armenian, Gilaki, Mazandarani, Baluchi, Pashto and Talysh to name but the most prominent, as well as the Turkic languages represented by Azeri, Turkmen, and Qashqai, followed by Arabic and Assyrian from the Semitic family, Georgian representing the Caucasian family and, finally, Brahui, a language of the Dravidian family.

The Iranian government favours Persian as the only official language due to a fear of separatism. Indeed, a look at the geographical distribution of minority language speaking groups shows that they are chiefly located along the frontiers of the country. At its border with Turkmenistan, Turkmen speakers predominate, in the coastal provinces of Mazandaran and Gilan Mazandarani and Gilaki users constitute the majority. Then,

moving westwards along the frontier with the three Caucasian republics and Turkey, the Turkish language (also referred to as Azeri) is most popular, with a strong centre in Tabriz. Areas bordering Iraq are mostly Kurdish speaking, though in the province of Ahvaz Arabic prevails. In addition to these, on both sides of the Iranian – Pakistani border speakers of Baluchi reside. Consequently, from the point of view of the Iranian authorities the policy of promoting one official language as a tool for safeguarding the nation's unity may be justified.

Those who fear Iran's fragmentation point to a lesson Iranians learned a few months after the end of World War Two. In December 1945, members of the Democratic Party of Iranian Kurdistan seized the opportunity and undertook action to establish a Kurdish Republic in Iran. Having captured the town of Mahabad, they declared an independent Kurdish Republic in January of the following year, electing Muhammad Qazi as president. Similar steps were taken by Azeri Turks, who under the leadership of Jafar Pishevari founded an autonomous People's Government in Tabriz.

As the northern territories of Iran were under Soviet control, the reaction of Moscow was of critical importance; Iran's territorial integrity was in the hands of foreign superpowers, and the country was a pawn in their *great game*. The north-western territories became the arena of one of the first skirmishes of the Cold War. However, the Soviets pressed by their Western previous allies, now foes, following an agreement signed with the Iranian government, withdrew from their occupation zone, which meant the end of support for Kurds and Turks in the area. The separatist governments fell and their leaders were punished. After a trial, President Qazi was sentenced to death for high treason. Pishevari managed to flee to the Soviet Union. Although the territorial integrity of Iran was eventually secured, Iranians were taught a lesson on how fragile the unity of a multi-ethnic and multilingual state may be, as its stability often depends on the whims of foreign powers.

To sum up, all citizens of Iran may speak their local languages at home, however in all official cases must use Persian. The policy of the government is to strengthen their Iranian identity, promote the sole language used in official contexts and not interfere in vernacular use at home. To put it in other words, Persian unlike other languages enjoys more rights.

2. Theoretical framework

The concept of language rights in the context of language policy was elaborated by Patten (2009) building on Kloss (1977). He distinguished between three grades of minority language rights such as toleration, accommodation, and promotion-oriented rights. The first occurs when the minority language is left to the private sphere, not supported but not facing discrimination either. The second refers to situations in which one official language predominates in areas of public life, such as courts, and special accommodations are offered to those speakers of minority languages who are not

proficient in the official language. Thus, in the interest of general human rights, such as the right to a fair trial, linguistic assistance is offered. Finally, promotion-oriented rights are connected to the allocation of government funds as an element of a general plan to promote the use of a language or languages used by minorities.

Iran does not go beyond basic toleration with regards to minority languages. It conducts a forceful policy of promoting Persian everywhere explicitly, through institutional practices law-making, the circulation of documents and other measures.

Patten also provides a critical review of good and bad reasons for choosing institutional monolingualism. While a country may risk the development of chauvinism and some ethno-linguistic groups may dominate others, the overall advantages outweigh the disadvantages. Concerns related to separatism have already been discussed. Another advantage of a one-language policy, apart from strengthening the nation's unity lies in the sphere of economy and logistics. The cost of the obligatory translation of official documents into minority languages can be staggering and its implementation requires the creation of a sophisticated bureaucratic apparatus. Moreover, when all linguistic minorities in the country share a common lingua franca they have equal access to education and jobs opportunities, can meaningfully take part in political life, contribute to common good on a national level and avoid ghettoization. However, their languages become useless in the aforementioned spheres and risk marginalization.

2.1. Minority language death as a result of a policy of monolingualism

A dead language is defined as a language that is no longer used by an ethnic group or one that currently has only a dispersed social base of users. A frequently invoked example of a dead language is Latin used in the Catholic Church, which fulfils both conditions (Susskin 1990). This study raises the question of whether two particular minority languages of Iran, Mazandaranian and Assyrian, fall into the category of dead tongues because of their limited usefulness in the field of education and jobs. Both are well documented in their written and spoken forms. However, are they likely to succumb to language death if their present-day users abandon them and do not pass them on to the next generation as a result of the policy of toleration.

2.2. Field work methodology

An empirical study was conducted. Because of Covid19, I was forced to abandon my original plan of interviewing users of Mazandaranian and Assyrian face-to-face and resort to thematic groups on the internet. In addition, I selected a group of 'primary informants' who I knew well, representatives of both communities who filled in the language attitude questionnaire and then passed it on to friends of theirs. The interviewees did not have to disclose their names thus could feel comfortable and say what they

really feel rather than stating something they feel a person of high prestige should say. This way I could avoid the so-called observer's paradox described by Labov (1972, p. 209). As a result I received replies from 58 Assyrians and 154 Mazandaranians falling into sixteen categories, depending on their age, sex, education/profession and place of residence (urban/ rural) as can be seen in Table 1.

M- Mazandarani A- Assyrian	Male, university education	Female, university education	Male, basic education	Female, basic education
Rural > 50 years old	A2,M5	A-,M5	A4, M9	A2, M5
Urban > 50 years old	A12, M24	A5, M18	A5, M5	A3, M4
Rural < 50 years old	A4, M11	A2, M1	A2, M15	A2, M6
Urban < 50 years old	A8, M3	A4, M16	A1, M15	A2, M12

Table 1. Number of Assyrians (A) and Mazandaranians (M) who filled in the language attitude questionnaire divided by categories.

The questionnaire in the Persian language was composed of the following elements:

- I. Gender: Male /Female,
- II. Education: primary/ secondary/ university student/ university graduate,
- III. Profession: student/ farmer/ entrepreneur/ teacher/ doctor/ other,
- IV. Place of residence: urban/ rural

The contents of the questionnaire for Assyrian speakers were as follows:

1. Where did you learn Assyrian?
 - 1.1. at home, from parents, grandparents,
 - 1.2. from children – classmates in kindergarten/ school, in the playground,
 - 1.3. from people in the street, bazaar,
 - 1.4. formal learning in class, how many hours a week, describe the class: how many students in class, teacher, language of instruction,
 - 1.5. reading texts on your own and listening to the radio? watching television (satellite)?
2. Usefulness of the Assyrian language – do you think that nowadays Assyrian is useful?
 - 2.1. in family context, talking to parents? grandparents? children?
 - 2.2. in social context, talking to friends? joking? (Assyrian jokes can hardly be translated into Persian) singing? informal meetings?
 - 2.3. as a language of instruction while learning/teaching? (which subjects: maths? physics? literature? religion?)
 - 2.4. working environment: talking to customers? talking to colleagues at work? making plans, arrangements? any context you can earn money using Assyrian?

- 2.5. language of prayer or religious context?
- 2.6. official context, talking to clerks/ officers in public institutions?
3. Actual use of Assyrian in the contexts presented above
4. Do you feel there are more opportunities to speak Assyrian nowadays than there were five years ago?
5. Do you:
 - 5.1. watch TV in Assyrian (satellite from Iran? abroad?)?
 - 5.2. listen to Assyrian radio?
 - 5.3. read Assyrian newspapers? magazines (paper or online)?
 - 5.4. read Assyrian books (paper or online)?
6. Do you participate in activities of any Assyrian organisations, societies, associations? Are they active?
7. How is the Assyrian Member of Parliament elected?
8. What, in your opinion, will be the future of the Assyrian language in Iran? Explain your answer.

Identical questions (without point 8. directed specifically to Assyrians only) were asked of Mazandarani speakers. As the aim of this paper is to present preliminary findings only, pending further fieldwork, the answers will be discussed in qualitative rather than quantitative terms.

3. Languages losing their speakers

The process of abandoning their vernacular has been noticed by Mazandarani themselves as well as being confirmed by linguists. In Minoo Shahidi published outcomes of her research (2006) and concluded that “Mazandarani is in the process of shift and the demise of this language is very probable”. To determine if her predictions are correct, a follow up to her studies is necessary. To examine if this process also applies to other minority languages in Iran I extended the scope of research to include Assyrian.

3.1. The uniqueness of the Assyrian community in Iran

Assyrians are proud of their former empire, which for centuries dominated the Middle East, until taken over by the Persians under Cyrus the Great. One respondent said that Cyrus, as the prophet Isaiah wrote, was anointed to do so by God Himself (Is, 1;1-8) and only because of Assyrians accepted it. Cyrus was a liberal ruler who let Assyrians worship their gods as long as they swore allegiance and paid taxes; what is more, he used their technical and architectural skills for his ambitious construction projects, reportedly adopting the Assyrian language as a *lingua franca* for his multilingual and multicultural state. The genocide perpetrated against the Assyrian community on

the Urmia plain in north-western Iran at the turn of the 19th and 20th centuries – was the result of a “great game” played by the world superpowers, immoral ideologies, and the weakness of Iran’s statehood. Analysing the factors determining the unique development of the Christian Assyrian community residing chiefly in Urmia within Islamic Persia, researchers point to missionaries arriving from America, France, Great Britain, and Russia permitted only to operate among non-Muslims. Hence, competing missions created schools, printing houses, hospitals and provided a modern education to local Assyrians – including women, which was a sensation on a national scale – ensuring a civilizational leap, prosperity, openness to the West and prestige, a “Persian Paradise” was created as described in the memories of the Assyrians.

3.1.1. Fears of Assyrians

A Christian island in a Muslim ocean, living side by side with Kurds and Azeri Turks, since 1979 their population in Iran has dwindled from 100,000 to 20,000 while the total population of Iranian citizens has risen from 37 to over 80 million people (Naby 2006). Even if their language, well documented since the mid-19th century, dies out in Iran, it may be saved by the diaspora living mainly in the USA, Australia, and Scandinavia. Fears remain after the sudden collapse and almost total destruction of the Assyrian community in Urmia during World War I (Khosroeva 2008). The genocide was spawned by the awakening of extreme nationalism, religious fanaticism (calls for ‘jihad’) and led to praise of seizure of property and the extermination of “sub-humans” (Yonan 1996). It was cynically orchestrated and carried out through death marches (Morgenthau 1918).

3.1.2. Comments made by Assyrians

Assyrians learnt their vernacular mostly at home from parents, grandparents, then mastered it during classes at school and in church, reading texts on their own and listening to the radio and watching television. They feel the opportunities to speak Assyrian nowadays are the same as they were five years ago. They watch TV in Assyrian, use the Internet, listen to the radio, read Assyrian magazines, read Assyrian books, both paper and online and have access to Assyrian libraries. Most of them participate in elections choosing the single Assyrian Member of the Majlis (Iranian Parliament) but they do not elect any Muslim MPs.

When it comes to the future of the Assyrian language in Iran, Assyrians take pride in the fact that they are heirs to the civilisation that was ‘the beginning of all beginnings’. It was their ancestors who created the first laws, the first architecture, the first urbanisation and many other firsts. This sense of pride, apart from their language and the Christianity that they practice constitute the markers of identity

of a relatively small nation residing between the western bank of Urmia Lake and the eastern slopes of the Hakkari Mountains along the border between Turkey and Iran. They believe the number of the speakers will not diminish, as Assyrians love their picturesque homeland, which is blessed with a mild climate full of gardens, vineyards, and they pass on this love along with their language to their children, who attend formal language classes at school and church. They have a strong sense of pride and an emotional bond with their homeland as a 'Persian paradise' (Skladanowa 1995, p. 121). To understand their feelings, one young Assyrian woman respondent recommended that I read the memoirs of Miriam Yohannan forced to flee her home in Salmas at the outbreak of World War One. Having found refuge in Tbilisi she could have lived there in safety enjoying the simple pleasures of everyday life. Yet, she missed her homeland so much that against all odds she returned and rebuilt her completely destroyed house from scratch. She then lived there until another calamity turned up – the Turkish invasion which resulted in the decimation of Assyrian population in the region (Yauvre 1998).

3.2. Mazandaranians and their language

Mazandaran has always been unique, distinct from other provinces of Iran. Located on the southern coast of the Caspian Sea, it is separated from the rest of the country by the massive Alborz mountain range. It has much rainfall, green forests cut with streams rich in water and soil suitable for farming. It was an excellent location for permanent settlements going back to the stone age, about 75.000 years ago. The land provided them with an abundance of food and shelter from armed invasion. Even if an enemy dared to attack, local communities were able to wage guerrilla warfare hiding in caves and the forested mountains. This gave rise to numerous myths and stories told among peoples in other parts of Iran about unbeatable, most probably supernatural creatures – the *Divs* – living in Mazandaran who fight using both ambush tactics and magic.

3.2.1. Mazandaran as a concept in the minds of Iranians

This popular belief about Mazandaran's special status within Persia and the Mazandarani people as being exceptional is reflected in the *Shahnameh*, which in Persian means "The Book of Kings", the greatest Persian national epic by Ferdowsi, relating the traditional history of Iran from the creation of the world to the fall of the Sassanid dynasty.

The Book of Kings is the Iranians' greatest epos, containing myths and stories vital to Iranian identity. It occupies a special place in the minds of all Persian speaking peoples, including those living outside of the present-day borders of Iran, such as those in

Afghanistan and Tajikistan. It contains numerous references to Mazandaran instilling the concept of an extremely beautiful and mysterious land in the minds of its readers.

Mazandaran is one of the chief locations of the *Shahnameh*, the realm of *Divs*. It is such a terrifying province that no ruler of Persia had ever attempted to conquer it. No Shah, except the impulsive, irrational Kay Kāvus who once having heard a poem recited by a *Div* depicting incredible wonders of Mazandaran gathered his army and made for the province. All his retinue opposed the idea reminding Kay Kāvus that even his great ancestors would not risk such a venture. As they had anticipated, the king's army was easily defeated in the battle by the Mazandaranian *Divs* who apart from their enormous strength were also famous for their magic. Kay Kāvus was imprisoned and blinded by the *Divs*. Somehow he managed to write a message and received help from Rostam, 'an Iranian Hercules'. This is how the epic story of Rostam's seven labours (*haft kar*) began. In the end he succeeds in his mission not only defeating the demons but also bringing back the king's eyesight by means of 'the White *Div*'s liver treatment'. This is but a brief account in prose of an amazing epos, written in highly sophisticated language, a masterpiece of Persian literature which can hardly be rendered in translations into other languages or fully appreciated in any language but Persian.

Nevertheless, the *Shahnameh* story itself and especially numerous references to Mazandaran as a land of wonders, exceptional beauty, desired by neighbouring rulers inspired the minds of Mazandaranian minstrels who retold fragments of it, in a relaxed way, in their vernacular. Thanks to field work carried out by researchers such as Habib Borjian (2004), who recorded *Shahnameh*-based stories told by a retired Mazandaranian farmer Hossein Saddati in a secluded village of Kord-e-kheyl, Mazandaranians received a precious specimen of the fading local tradition of live, story-telling during long winter nights, which now has unfortunately given way to modern mass media. The greatest epos of Persia was translated or rather retold by Saddati in an ingenious way.

Personally, as a Mazandaranian, I find Saddati's account of the aforementioned story as fascinating as the original. Moreover, the minstrel added numerous details, especially concerning local topography, e.g. Rostam fights the demons in the neighbouring villages of Veresk and Firuzkuh, which Ferdowsi did not mention in his original. He also points to a specific rock in the outskirts of his village where the *divs* used to hide and enlivens the story with some specific humour, describing Rostam encountering *divs* drinking vodka and eating people like snacks.

Borjian (2004) writes: "Of the living Iranian dialects, Mazandarani boasts the longest written tradition, roughly matching that of Modern Persian". This status was achieved in the long reign of independent and semi-independent provincial rulers.

3.2.2. Mazandaranian respondent comments

Most respondents say they acquired their vernacular language casually. Older and rural members of the community learned it at home from parents, grandparents, not at

school as there was no formal training provided, or on the playground. Most pointed to ‘people in the street, bazaar’.

A majority of respondents stated that nowadays they found Mazandaranian useful in a family context, i.e. when talking to parents, grandparents, however less frequently to children. When talking to friends, they find joking in Mazandaranian hilarious and love singing traditional songs during informal gatherings. Mazandaranian is regarded as more suitable for rural residents. At schools boys and girls from both towns and villages prefer Persian while the language of instruction used by teachers is almost always Persian. Mazandaranian is rarely used in a work environment while talking to customers or colleagues at work; however, there are a few exceptions such as bazaars where farmers come to sell their products, a friendly chat in Mazandaranian may lower the price of vegetables purchased. The same principle may work in the case of taxi drivers. Mazandaranians, predominantly Shiites, use Arabic as a language of prayer in religious contexts.

The most visible instance of the deterioration of Mazandaranian concerns its lexicon. Respondents point out the fact that they themselves tend to replace Mazandarani words with Persian equivalents either because they have forgotten them or in order to sound more formal. This phenomenon has a profound impact on children who do not study correct language patterns due to the lack of formal education but acquire a corrupted version from careless speakers around them. An interesting discovery was the fact that the lexical shift evoked by the imbalance between Persian and Mazandaranian has triggered syntactic changes. This concerns the replacement of purely Mazandarani words with their Persian equivalents in noun phrases; in Mazandarani adjectives precede nouns, however, adjectives adopted from Persian adhere to the syntactic rules of Persian and follow the nouns they modify.

Finally, the most refined opinions summarising linguistic reality in Mazandaran in the summer of 2020 concerning the future of the Mazandaranian language in Iran. One respondent wrote: “Imagine two trees growing side by side, however one is neglected by the gardener the other much taken care of; what happens is a year-by-year, gradual process of overshadowing the weaker one until it finally dies out.”

Another respondent contributed: “The peaceful coexistence of the two languages in Mazandaran is but an illusion. We are witnessing the process of gradual language cannibalism: Persian devouring Mazandaranian.”

4. Conclusion

This study has outlined differences in the attitudes of Mazandaranians and Assyrians concerning their minority languages, subjected to the official policy of Persianization in Iran. Assyrian is omnipresent in religious contexts, services and prayers are said in the language of Jesus. Mazandaranian, on the other hand, is generally not used in religious domains due to Arabic supremacy in the Muslim realm, however in villages

Mazandarani is occasionally used while recollecting the martyrdom of imams, during celebrations such as *ta'ziye*.

As a written language, Assyrian is well documented and used in the community. An Assyrian weekly, for example, is distributed in Urmia. It also serves as the means of communication with the Assyrian diaspora. For Mazandarani, however, the written language practically does not exist in everyday life, despite the fact that it is a subject of interest to linguists who collect and discuss manuscripts from past centuries. Unlike Assyrian there is no Mazandarani-speaking diaspora outside of Iran and emigrants from Mazandaran communicate using Persian.

A tendency to switch to Persian within urban and educated groups was observed since using the Mazandarani language or even having a Mazandarani accent and intonation while speaking Persian are associated with backwardness and such opinions were recorded in this survey. Assyrian respondents, on the other hand, declared it was their honour bound duty to master and protect the ancient language of their ancestors.

Nevertheless, similarities have been recorded as well. Firstly, both languages are not languages of instruction at schools. Although Assyrian is taught as a separate subject, general academic knowledge is conveyed through Persian. Secondly, both languages are losing their speakers in Iran (however, no Assyrian respondents have stopped using their language and the phenomenon of dwindling numbers in Iran is due to emigration; while in Mazandaran the quality of the language is deteriorating due to the lack of formal instruction at school as well as their choice to abandon it in favour of Persian.

Finally, both communities value their respective languages in the family domain, with the exception of some young Mazandarani women who discourage their children from using the vernacular at home for fear of losing a proper, in their opinion, Persian accent or intonation. Neither of the two languages is perceived as useful at work, with the exception of some doctors in remote rural areas of Mazandaran who speak Mazandarani to win the trust of the local population, which is an instance of integrative motivation.

Bibliography

- Borjān, Habib 2004: Māzandarān: Language and people (the state of research). In: *Iran & the Caucasus* 8/2: 289–328.
- Khosroeva, Anahit 2008: The Assyrian genocide in the Ottoman Empire and adjacent territories. In: R. G. Hovannisian (ed.): *The Armenian genocide: cultural and ethical legacies*. New Brunswick, New Jersey: Transaction Publishers
- Kloss, Heins 1977: *The American bilingual tradition*. Rowley, Massachusetts: Newbury House
- Labov, William 1972: *Sociolinguistic patterns*. Philadelphia: University of Pennsylvania
- Morgenthau, Henry 1918: *Ambassador Morgenthau's story*. Garden City, New York: [Doubleday, Page & Company](#)
- Naby, Eden 2006: Ishtar: Documenting the crisis in the Assyrian Iranian community. In: *Middle East review of international affairs* 10/4: 92–102.

- Patten, Alan 2009: Survey article: The justification of minority language rights. In: *The Journal of political philosophy* 17/1: 102–128.
- Rasaenia 1998: *The constitution of the Islamic republic of Iran*. Tehran: Saman Publications
- Shahidi, Minoo 2008: *A sociolinguistic study of language shift in Mazandarani*. Uppsala: Uppsala University
- Składanowa, Maria 1995: *Kultura perska (Persian culture)*. Wrocław: Zakład Narodowy imienia Ossolińskich
- Susskin, Marian 1990: *Paninterlingwa: Powszechny język międzynarodowy (Paninterlingwa: The universal international language)*. Warszawa: Państwowe Wydawnictwo Naukowe
- Yauvre, Yacoub, Baaba, Youel A. & Yohannan, Miriam 1998: *An Assyrian odyssey covering the journey of Kasha Yacoub Yauvre and his wife Mourassa from Urmia to the court of Queen Victoria 1879-1888 and The exodus of the Assyrians from their ancestral home 1918*. Alamo, California: Youel A. Baaba Library
- Yonan, Gabriele 1996: *Lest we perish: A forgotten holocaust: the extermination of the Christian Assyrians in Turkey and Persia*. Assyrian International News Agency

Justaj lingvorajtoj: Socia kontrakto kaj konstitucia ekonomiko

Abstract. Just language rights: Social contract and constitutional economics

Language rights are the result of language policy. Every policy measure, for example bilingual street signs in cities, can be analyzed as a public project. Such a policy measure is efficient if the utility of the measure for the beneficiaries exceeds or is equal to the costs of provision. On the other hand, equity is defined by the condition that each individual have the same right as every other individual to use their chosen language in any situation. Due to too high costs, this is often impossible, and one has to find a compromise between efficiency and equity. A just policy is defined as such a compromise reached according to some generally acceptable criteria. In this essay, we analyze this trade off through the methodology of constitutional economics. After a brief discussion of the application of these methods to language policy, we illustrate the analysis with some examples. We ask what is the just decision in the case of bilingual street signs and about the construction of a theater for minority language performances. We show that depending upon the size of a minority and of the costs of the policy we can divide the analysis into three types. Two types lead to clear statements about the justice of the proposed policy, and one type relates the definition of a just policy to the preferences of individuals for risk taking.

Resumo. Lingvorajtoj por malplimulto rezultas de lingvopolitiko. Ĉiu ero de lingvopolitiko, ekzemple dulingvaj stratŝildoj en iu urbo, povas esti analizata kiel publika projekto. Tia politikero estas efika, se la utilo de la mezuro por la profitantoj de ĝi superas aŭ egalas al la kostoj de ĝia realigo. Egalvaloreco aliflanke signifas ke ĉiu homo havu la saman rajton uzi sian elektitan lingvon en iu ajn situacio kiel ĉiu alia individuo. Tio pro tro altaj kostoj ofte ne eblas, kaj oni devas trovi kompromison inter efikeco kaj egaleco. Justa politiko estas difinita kiel tia kompromiso farita laŭ kelkaj ĝenerale akceptitaj kriterioj.

En tiu ĉi artikolo ni analizas tiun kompromison uzante la metodojn de konstitucia ekonomiko. Post mallonga revuo de tiuj metodoj aplikataj al lingvopolitiko ni ilustras la analizon per kelkaj ekzemploj. Ni demandas, kio estas justa decido pri dulingvaj stratŝildoj kaj pri konstruado de teatro por minoritata lingvo. Ni montras, ke depende de la grandeco de la malplimulto kaj de la kostoj de la politiko ni povas disdividi la analizon en tri tipojn. Du tipoj kondukas al klara eldiro pri justeco de la proponita politiko, kaj unu tipo rilatigas la difinon de justa politiko al la preferoj de la individuoj rilate riskon.

1. Enkonduko

En lingvopolitiko, kiel en ĉiuj aliaj politikkampoj necesas fari kompromisojn. Imagu, ke en urbo oni parolas aron da malsimilaj lingvoj. Se ni volus trakti ĉiun homon egale, ni devus montri stratŝildojn en ĉiuj lingvoj parolataj en la urbo, ĉiu alia signifus mal-saman traktadon de homo, kies lingvo estas uzita sur stratŝildoj, kaj homo, kies lingvo

mankas. Uzi ĉiujn lingvojn tamen povus kaŭzi tre altajn kostojn. Do, praktike ofte ne eblas la egaleca solvo. Oni devas fari kompromison inter egaleca kaj praktike farebla politiko. Por analizi tian kompromison la ekonomikisto posedas kelkajn ilojn. Unuflanke oni havas la koncepton de efikeco, komparante utilon kaj kostojn (vidu Wickström, 2015 kaj Wickström, 2016). Aliflanke estas la konflikto inter efikeco kaj egaleco, kiu kondukas al variaj konceptoj de justeco (kp. Wickström, Templin kaj Gazzola, 2018a.)

En la plej multaj politikkampoj oni trovas tiun kontraŭecon inter efikeco kaj egaleco. Bona metaforo por kompreni la bazan problemon estas kompari la rimedojn de la socio al kuko dividenda inter la socianoj. Tiam ni havas tian kontraŭecon, se egale dividita kuko pro la dividado fariĝas pli malgranda ol komence malegale dividita kuko. Tio normale dependas de ŝanĝiĝintaj instigoj pro la redistribuado. Se la ŝtato per imposto forprenas parton de la salajro de riĉuloj por doni al malriĉuloj, nek la riĉulo, nek la malriĉulo plu havas tiom fortajn instigojn labori kiel antaŭe kaj pli malmulte estos produktita; do la produktado entute malkreskos. Ĉiuj volas pli da rimedoj, sed multaj ankaŭ ŝatas disdividon pli proksiman al egaleco. Tiuj du deziroj kontraŭas unu la alian. Ni do devas decidi, ĉu plia alproksimigo al egaleco estas pli grava ol la kostoj en formo de malpli da rimedoj por aliaj celoj, kiujn la alproksimigo al egaleco kaŭzas. Tio estas, ni devas iel fiksi valoron de la proksimeco al egaleco kaj kompari tiun valoron kun la kostoj en la formo de malpli da rimedoj. La socia problemo tiam estas elekti, kiom proksime al egaleco la disdivido estu en justa socio.

Similaj situacioj povas okazi en la lingvopolitiko en statika analizo. Doni la samajn rajtojn rilate iliajn lingvojn al parolantoj de diversaj lingvoj povas kaŭzi netajn kostojn al la socio se la nombro de parolantoj de kelkaj lingvoj ne estas sufiĉe granda. Do, ni havas la elekton inter pli da rimedoj por aliaj celoj ol lingvopolitiko kaj lingva malegaleco unuflanke kaj malpli da rimedoj kaj lingva egaleco aliflanke. La metaforo tamen ne estas perfekta, ĉar la nombro da parolantoj de malplimulta lingvo kaj ĝia uzo en la socio ofte kritike dependas de la lingvopolitiko, kaj mallongtempe bona politiko povus longtempe havi nedezirindajn rezultojn por la pluvivado de minoritata lingvo. Do, optimuma lingvopolitiko povas esti alia mallongtempe kaj longtempe. En tiu ĉi artikolo ni tamen koncentriĝos sur la mallongtempa statika analizo, neglektante la dinamikajn aspektojn¹.

1.1. Justeco

En la literaturo ekzistas multaj aliroj al justeco². Oni unue povas demandi, ĉu la preferoj de la koncernatoj ludu rolon en la difino de justeco. En religia dogmo de justeco la difino ofte estas alskribita al dia revelacio, kaj la preferoj de la afektitaj homoj ne necese gravas.

¹ La saman problemon oni povas havi en pli ĝenerala analizo. Malegale dividita kuko povas konduki al pli granda kuko venontperiode pro la instigoj kaŭzitaj de la malegaleco.

² Por bona panoramo de justeco rilate lingvorajtojn la leganto estas direktita al Alcalde (2018).

En moderna scienca aliro al la problemo, la demando ofte estas, kiomgrade la preferoj de la koncernatoj gravu. Ofte uzata klasifiko troviĝas en fama artikolo de Patten (2009). Elirante el la diferenco inter toleremaj kaj promociaj rajtoj de Kloss (1977) li difinas tri klasojn kun tri subklasoj de unu klaso de minoritataj rajtoj:

1. toleremo
2. normo kaj koncesio
3. promociaj rajtoj
 - (a) situacidependaj rajtoj
 - (b) travivorajtoj
 - (c) individua justeco

Iom simpligita toleremo signifas, ke oni ne malpermesu aŭ malhelpu la uzon de iu lingvo en la privata sfero. Normo kaj koncesio difinas normlingvon, kaj akceptas la uzon de alia lingvo en situacioj, en kiuj homo ne scipovas uzi la normlingvon, ekzemple en jura proceso³. La promociaj rajtoj signifas, ke la ŝtato aktive subtenas la uzon de iuj lingvoj, sendepende de tiu, ĉu la koncernaj individuoj regas aliajn lingvojn aŭ ne. Ni povas diri, ke situacidependaj kaj travivaj rajtoj estas kolektivaj rajtoj, kaj ke individua justeco estas individua rajto. La situacidependo celas protekti ekzistantajn komunumojn de malapero aŭ absorbo en la plimulta kulturo per garantio de sufiĉaj sociaj institucioj por normala socia vivo, kiom longe la komunumo ekzistas. La travivorajto adicie volas garantii la pluan vivon de minoritata komunumo, eĉ se la minoritato estas bone integrita parto de la plimulta komunumo.

La individua justeco koncernas la eblecon de individuo antaŭenigi sian lingvon en socio, kie ĝian statuson estas tre malalta. Tio proksimigas la analizon al ekonomikaj vidpunktoj; oni ne havas la saman ŝancon antaŭenigi sian lingvon, kiel ano de la plimulto pro la konduto de la plimultanoj⁴. Oni povas diri, ke ĉiuj individuoj havu ŝancoegalecon⁵.

Tamen, kio estas egaleco ne necese estas klare. Ĝenerale la demando estas, pri kiuj ecoj de la persono la individuo mem respondecas. Liberecano⁶ dirus, ke homo naskiĝita kun bela voĉo, kiu provizas la individuon per altegaj salajroj kiel operkantiston, tute rajtas je je tiuj enspezoj, ĉar li rajtas je siaj denaskaj profitdonaj rimedoj (humankapitalo). Neniu do havu la rajton redistribui parton de la enspezoj al homoj sen tiom da profitdona denaska humankapitalo. Aliaj filozofoj – liberalaj – dirus, ke la bela voĉo estas tute ŝanca dono, al kiu la individuo ne havas bazajn rajtojn⁷. Tia homo do devas pagi kompensojn al la homoj kun malpli profitdonaj denaskaj rimedoj. Oni kompreneble povas simile argumenti per malaj rimedoj. Liberecano povus argumenti, ke blindulo ne havu rajtojn je kompensagoj pro sia

³ La multaj laboraĵoj de Ginsburgh kaj aliaj, ekzemple Ginsburgh, Ortuño Ortín kaj Weber (2005) estas proksimaj al tiu ideo. Vidu ankaŭ Gazzola (2014).

⁴ Ekonomikistoj parolas pri eksternaĵoj; vidu ekzemple Wickström, Templin kaj Gazzola (2018b).

⁵ Por superrigardo de ekonomikaj teorioj pri justeco vidu Wickström (1988).

⁶ Komparu ekzemple la argumentojn de Nozick (1974).

⁷ Rawls (1971) argumentus tiel.

blindeco⁸, kaj liberala filozofa diras, ke la blindeco estas „akcidento“ de vivo pri kiu la homo ne respondecas, kaj pro tio la blindulo devas esti kompensita.

Apliki tion al lingvopolitiko, oni povas argumenti ke la gepatra lingvo estas parto de la personeco. El la vidpunkto de libereco la socio ne rajtas konsideri la lingvon de persono kiel kaŭzo por kompenspagoj kaj redistribuado de la rimedoj de la socio. Aliflanke, liberala filozofa diras ke la individuo ne mem elektis sian gepatran lingvon kaj pro tio ne mem respondecas pri malavantaĝa situacio pro membreco en malplimulto. Do, la socio havas devon garanti la samrajtecon de membroj de minoritato kun tio de plimultano.

En tiu ĉi artikolo la elirpunkto por difini justecon estas la lasta: membro de malplimulto posedas bazan rajton esti kompensata por ĉiuj sociaj malavantaĝoj pro sia minoritaneco, kaj individuaj preferoj devas gvidi la determinon de la lingvopolitiko.

1.2. Socia kontrakto

Kiu hodiaŭ nomiĝas konstitucia ekonomiko havas siajn radikojn en la teorio de socia kontrakto. Tio estas bona ilo por konkretigi la difinon de justeco en la fino de la antaŭa sekcio. La ideo estas, ke oni elektu la instituciojn de la socio en „origina“ situacio sen scii kian rolon oni ludos en la socio kaj en tia situacio faros socian kontrakton precizigante la sociajn instituciojn. Oni elektos malantaŭ „vualo de nescio“ – tiel oni estas neŭtra en la elekto. La ideo jam ekzistis ĉe la helenaj filozofoj (ekzemple Platono, 395 a.K.E. [1888, 1980]). Ĉi tie Kritono venas al la enkarcerigita Sokrateso kaj ofertas al li vojaĝon al libereco for de Ateno. Sokrateso tamen rifuzas, dirante, ke tio estus tute malmorala, ĉar li antaŭ ol scii, ke oni kondamnos lin al morto, elektis vivi en Ateno pro tio, ke Ateno estas la plej bona al li konata socio. Farante tion, li konis ĉiujn eblajn sortojn kaj konsiderante ilin faris la decidon. Tiu decido estas same bona ankaŭ nun, malgraŭ la fakto, ke li malbonŝance estas mortkondamnita. Malbonŝanco ne povas influi principe bonan decidon. Li do trinkos la venenon.

La samajn ideojn oni trovas ĉe, inter aliaj, Hobbes (1651), Rousseau (1762) kaj Kant (1797). En pli modernaj tempoj ĝi troviĝas ĉe Rawls (1971) (uzante la terminon „vualo de nescio“), Buchanan kaj Tullock (1962) kaj Buchanan (1987). Ekde ili ekonomikistoj parolas pri subkampo de ekonomiko, t. n. konstitucia ekonomiko, por trakti tiajn problemojn. En tiu ĉi kontribuo ni klopodos apliki tian analizon al la provizo de lingvorajtoj.

Kiel skribite, efikeco estas unu el la plej centraj konceptoj en ekonomika analizo. Ĝi baziĝas sur la koncepto de unuanimaj decidoj. Se neniu homo koncernata de iu decido kontraŭas la decidon kaj almenaŭ unu persono subtenas ĝin, oni diras, ke la decido estas „Pareta“⁹ plibonigo aŭ efikecplialtiga. La konstitucia ekonomiko klopodas

⁸ Oni tamen povus argumenti, ke la blindulo havu la samajn rajtojn kiel ĉiuj aliaj homoj; do, ekzemple, la rajton stiri aŭton. Por ke la blindulo ne uzu tiun rajton, la resto de la socio devas aĉeti ĝin de li.

⁹ Nomita laŭ la itala ekonomikisto kaj sociologo Wilfried Fritz Pareto.

adopti tiun koncepton al situacioj kun distribuaj konfliktoj uzante simplan penseksperimenton. Oni simple anonimigas sociajn postenojn de ĉiuj homoj de la socio kaj lasas la homojn elekti inter malsamaj socioj kun malsamaj distribuoj de postenoj sen scii, kiun postenon ili okupos en la elektita socio. Ili nur scias, ke ili troviĝos en unu de la sociaj postenoj kun la sama verŝajno kiel en aliaj postenoj. Oni diras, ke ili decidas malantaŭ vualo de nescio.

Oni povas por klarigi la problemon uzi fruktodonan metaforon, en kiu oni vidas la elekton de la institucioj de la socio kiel loterion. Ĉiuj sociaj postenoj, kies valoro dependas de la sociaj institucioj, estas eblaj individuaj rezultoj de la loterio, ĉiu kun la sama verŝajno. Homo, elektante loterion, rigardos kaj la grandecon de la atenda valoro de la rezultoj kaj la devion de la individuaj valoroj de la rezultoj ĉirkaŭ la atenda valoro. Normala homo deziras kaj altan atendon kaj, se riskomalema, malgrandan devion. Do, kiuj sociaj institucioj elektiĝas, dependas de la riskomalemo de la individuoj. Ĉar ĉiu persono tiel havas preferojn inter la malsamaj sociaj institucioj, eblas diri, ĉu la ŝanĝo de unu aro da institucioj al alia estas efika aŭ ne.

1.3. La strukturo de la kontribuo

En la resto de la artikolo ni aplikos tiun diskuton al la problemo de enkonduko de lingvorajtoj. Unue en sekcio 2 ni enkondukas iom formalan strukturon, kiu necesas por klara kaj traktebla analizo. Ni difinos niajn konceptojn kaj la rilatojn inter ili. Sekcio 3 traktas la ideojn malantaŭ la konstitucia ekonomiko, donante tradician fonon de la metodo kaj kelkajn bazajn observojn. En sekcio 4 la teorio estas aplikata al simpla lingvopolitika problemo: ĉu montri dulingvajn stratoŝildojn kaj ĉu konstrui teatron por la minoritata lingvo. La artikolo finiĝas en sekcio 5 kun kelkaj rimarkoj pri la analizo kaj pli ĝenerala politiko.

2. Modelstrukturo

Por simpligi la aferon ni koncentriĝas pri la plej gravaj variabloj de la problemo. Tiel la analizo fariĝas pli travidebla kaj povas kristaliĝi laŭ la gravaj rilatoj inter la konceptoj. Se oni komprenas la grandajn liniojn, estas poste facile kompletigi la analizon kun realismaj detaloj, se tio estas bezonata.

Ni difinas politikeron kiel la plej malgrandan unuon de lingvopolitiko. Ĝi estas la rezulto de politika decido kaj povas esti ekzemple leĝo, ke certaj specifaj publikaj dokumentoj aperu en iu minoritata lingvo, ke oni havu la rajton uzi sian preferitan lingvon en kortumo, ke stratoŝildoj estu dulingvaj ktp. Lingvopolitiko do estas aro da tiaj eroj. Por taksu lingvopolitikon necesas taksu ĉiujn politikerojn. Kiel ekzemplon ni uzos duingvajn stratoŝildojn kaj la konstruadon de teatro, sed oni povas imagi iun ajn lingvopolitikeron, kiel oficialajn dokumentojn en multaj lingvoj aŭ la rajton ricevi

responidon de la aŭtoritatoj en preferata lingvo ktp. La grava afero estas, ke la provizo de politikero kostas iom kaj havas valoron por la parolantoj de la lingvo subtenita.

2.1. Kostoj

La kostoj por provizi certan politikeron estas principe mezureblaj. En la realo povas esti malfacile mezuri ilin, sed tio estas praktika problemo. Ĝenerale la kostoj dependas kaj de la nombro da profitantoj kaj de la grandeco de la areo, kie la fruktoj de la politiko estas disponeblaj. En la kazo de stratŝildoj la kostoj nur dependas de la areo, sed ne de la nombro da profitantoj. La kostoj de oficialaj dokumentoj en iu ajn lingvo estas fiksjaj; ili nek dependas de la grandeco de la lando, nek de la nombro da profitantoj. La rajto ricevi responidon al retmesaĝo en via preferata lingvo aliflanke dependas de la nombro da profitantoj, sed ne de la grandeco de la loĝareo de ili. Lernejoj en minoritata lingvo kaŭzas kostojn, kiuj dependas de ambaŭ kriterioj.

Ni uzos la literon c por indiki la kostojn de iu politikero, kiuj ĝenerale dependas de n , la nombro da profitantoj, kaj de a , la areo de la regiono, kie la politiko estas realigita: $c = f(n, a)$. Do, se ekzemple ni komparas du malsimile vastajn teritoriojn, la kostoj de dulingvaj stratŝildoj malsimilas, sed ne la kostoj de oficialaj anoncoj per radio en du lingvoj. Tiuj dependecoj de la kostoj kompreneble gravas por la elekto de optimuma politiko, kiu ne necese estas la sama en du malsamaj dulingvaj teritorioj¹⁰.

Ankaŭ gravas, kiu pagas la kostojn de la politikero. Por faciligi nian analizon ni supozos ke la politiko estas financata per ĝeneralaj enspezoj de la teritorio analizata. Se la nombro da loĝantoj estas N_0 , la popersona imposto t por pagi la politikon estas $t = c/N_0$. La imposto do dependas de la grandeco de la tuta enloĝantaro en la teritorio. Kompreneble oni povas imagi pli komplikajn impostregulon, ekzemple dependantan de la enspezoj de la impostpaganto. Tiukaze ankaŭ la distribuo de enspezoj inter la enloĝantoj gravus en la analizo. La principo malantaŭ la analizo tamen ne ŝanĝiĝus. Pro pli simpla prezentado ni do supozas, ke la impostoj estas egale dividitaj.

Ni povas konkludi, ke ĝenerale la kostoj de politikero, kiuj trafas individuon, dependas de minimume tri faktoroj: la grandeco de la minoritato (n), la grandeco de la teritorio (a) kaj la grandeco de la tuta enloĝantaro (N_0).

2.2. Utilo aŭ pagemo

En merkato la prezo de varo estas samtempe la minimuma valorigo, kiun individuo alfiksas al la varo, se oni aĉetas ĝin. Oni ankaŭ parolas pri la „postulo“ en la merkato, kiu estas la sumo, kiun homoj pretas pagi por provizo de plia kvanto de varoj. Se ni parolas pri politikero, ekzemple dulingvaj stratŝildoj, la situacio estas iom pli komplika.

¹⁰ Komparu ankaŭ la diskuton en Wickström (2021).

Ankaŭ ĉi tie ni devas serĉi la valoron de la ŝildoj al la individuoj, sed ni ne havas merkaton kun transakcioj por gvidi nin. Ni do principe devus demandi la homojn, kiom al ili valoras havi stratŝildojn en ilia lingvo. Tiu valorigo nomiĝas *pagemo*. Ĉi tie kompreneble la praktikaj problemoj grandegas. Eĉ se eblas pridemandi sufiĉe da homoj, ni ne povas scii, ĉu ili respondas honeste. Eble ili eĉ ne scias tian valoron, ĉar ili ne havas spertojn pri la enkonduko de tiaj stratŝildoj.

En la realo do tiu valoro estas fiksita tra la politika sistemo kaj organizitaj (intereso) grupoj. Por nia analizo ni simple devas supozi, ke tia valorigo de la politikero estas iel politike fiksita kaj konata en la buroo, kie oni faras la decidojn koncerne lingvopolitikon. La utilo, aŭ pagemo, de individuo i estas skribita u^i kaj la averaĝa valoro, aŭ pagemo, de la profitantoj de la politiko estas indikita per u . Se la nombro da profitantoj estas n , la malneta pagemo de la politiko do estas nu . Ni do havas du faktorojn, kiuj gravas por la lingvopolitiko, la averaĝan pagemon (u) kaj la grandecon de la profitantaro de la politiko – la minoritato (n). La lasta ankaŭ influas la kostojn, ni do havas unu plian faktoron (u).

Ĝenerale ni povas konkludi, ke racia decido pri la enkonduko de politikero, kiu kaŭzas kostojn en grandeco $c(n, a)$, devas (minimume) dependi de kvar faktoroj: la grandeco de la minoritato (n), la grandeco de la teritorio (a), la averaĝa pagemo de la membroj de la minoritato (u) kaj la grandeco de la tuta enloĝantaro (N_0).

2.3. Efikeco

La realigo de politikero estas efika, se la sumo de pagemoj de de la profitantoj de la politiko superas la kostojn de la politikero (aŭ egalas al ili). Formale ni povas skribi tiun kiel:

$$nu \geq c \tag{2.1}$$

La neta valoro aŭ implicita enspezo de la politikero por individuo i do estas:

$$u^i - t \tag{2.2}$$

Ĉar la sumo de la impostoj super ĉiuj homoj en la socio egalas al c kaj la sumo de ĉies pagemoj estas nu , ni vidas, ke la politikero estas efika se la sumo de la implicitaj enspezoj superas nulon (aŭ egalas al nulo).

La efikeco de politikero kaŭzante kostojn en la alteco de $c(n, a)$ do dependas de la grandeco de la minoritato (n), la grandeco de la teritorio (a) kaj la averaĝa pagemo de la membroj de la minoritato (u), sed ne de la grandeco de la tuta enloĝantaro (N_0)¹¹.

¹¹ Pro tiu estas klare, ke procenta regulo ne povas gvidi la decidon, ĉu politikero estas efika, vidu Wickström (2019).

Se en urbo vivas mil homoj, kiuj preferas esperantlingvajn stratŝildojn kaj unu persono, kiu volas la ŝildojn en volapuko, kaj la kostoj de stratŝildoj estas sufiĉe, sed ne tro, altaj, estas efike provizi stratŝildojn en esperanto sed ne en volapuko, ĉar pro la granda nombro da parolantoj la malneta pagemo de la esperantoparolantoj superas la kostojn sed pro nur unu volapukparolanto la malneta pagemo por ŝildoj en volapuko malsuperas la kostojn de la ŝildoj.

2.4. Egalvaloreco

Por trakti lingvorajtojn ni enkondukas la terminon „egalvaloreco“. Egaleco signifus, ke ĉiu havu la rajton uzi iun specifan lingvon, ekzemple ĉiuj en la socio rajtas uzi la polan por kontakti la registaron. Tion tamen ne kaptas nian koncepton de egalrajteco, ĉar afektas homon, kiu konas la polan malsimile al persono nescianta la polan. Lingva egalrajteco laŭ nia difino signifas, ke ambaŭ personoj havu la saman aliron al informoj de la registaro sendepende de siaj lingvaj preferoj. Egalvaloraj rajtoj do signifas, ke ĉiuj homoj havu la samajn rajtojn rilate sian preferitan lingvon. Por simpleco ni en la sekvo skribos „egaleco“ kun la kompreno, ke tio estas en la senco de egalvaloreco.

Se en urbo vivas mil personoj preferantaj esperanton kaj unu persono preferanta volapukon kaj la stratŝildoj estas en esperanto, egalvaloreco postulas, ke la ŝildoj ankaŭ estu en volapuko.

2.5. Justeco

Kiel ni vidis en la ekzemplo de la urbo kun 1001 enloĝantoj, efikeco kaj egalvaloreco povas kontraŭi unu la alian. En tiu kazo ni devas trovi taŭgan kriterion por la ebla enkonduko de stratŝildoj en volapuko. Tiam taŭgan kriterion ni difinas kiel justan kriterion. Estas klare, ke por tre malalta kosto c , pli malgranda ol la pagemo de la parolanto de volapuko, oni metu volapukan tekston sur la ŝildoj. La interesa demando estas, je kiu alteco de la kostoj oni decidu, ke estas juste ne plu uzi volapukon. Tio estas la centra problemo de tiu ĉi artikolo, kaj en la sekva sekcio 3, ni analizos tiun problemon teorie kaj en sekcio 4 helpe de malgranda ekzemplo.

3. Konstitucia ekonomiko: ekvilibriĝo inter efikeco kaj egalvaloreco

Por plie apliki la ideon de efikeco aŭ unuanimaj decidoj al problemoj kun konfliktaj interesoj oni ekde antikvaj tempoj aplikis la ideon de neŭtrala observanto. La homoj estas petataj eniri la postenon de homoj sur la alia flanko de konflikto, kaj tiam fari decidojn nesciante, ĉu ili estas si mem aŭ iu alia persono. Nesciante la postenon en onta socio oni povas aŭ elekti la distribuon de rimedoj en tiu socio aŭ la regulojn, la konsti-

tucion, de la socio, kaj la reguloj rezultigas distribuojn de rimedoj. Farante la elekton de institucia fono oni do konsideras ĉiujn eblajn postenojn, en kiuj oni povas troviĝi¹².

3.1. Socio kiel loterio

Por apliki kaj formaligi la ideon de socia kontrakto al la analizo de lingvorajtoj uzeblas la analogio de loterioj. La socio kun certaj institucioj estas vidata kiel loterio kaj la rezulto de la loterio estas posteno en la socio. Se la socio havas N_0 enloĝantojn, ekzistas N_0 eblaj postenoj, unu por ĉiu persono. La supozo estas, ke malantaŭ la vualo de nescio ĉiu homo rigardas ĉiun postenon kiel same verŝajna post la malfermo de la vualo. Do, la verŝajno „gajni“ iun ajn postenon, π , estas $1/N_0$. La individuo taksas la valoron de tia loterio surbaze de la distribuo de neta valoro de la malsamaj postenoj. Tio estas, homo malantaŭ la vualo vidas vicon da utilvaloroj, kiujn ŝi aŭ li povas gajni, ĉiu kun probablo $1/N_0$, kaj taksas tiun loterion.

Kun aliaj institucioj la distribuo de utilo iĝas alia, kaj ni havas alian loterion, kiun taksas la homoj malantaŭ la vualo.

3.2. Eblaj decidokriterioj

Taksinte ĉiujn eblajn aranĝojn de la socio, la homoj malantaŭ la vualo povas decidi preferordon inter la eblaj instituciaj aranĝoj kaj asigni al ĉiu aranĝo pagemon. En ekonomika teorio oni ofte postulas, ke la elekto inter loterioj baziĝu sur la atendo, tio estas la averaĝa valoro de ĉiuj postenoj, kaj sur la risko, kiu estas difinita per la disvastiĝo de la valoroj de la postenoj. Homo deziras kaj pli grandan atendon, kaj pli malgrandan riskon. Oni povas difini gradon da riskmalemo por priskribi, kiom alte persono taksas la kostojn de certa risko, kiujn oni devas subtrahi de la atendo, kiam oni taksas la loteriojn¹³.

4. Ekzemplo

Simpla ekzemplo povas montri, kiel apliki la teorion en la praktiko. Ekzistas du dulingvaj urboj. Ambaŭ havas plimultan loĝantaron de 90 000 personoj. En unu loĝas 15 000 personoj apartenantaj al lingva minoritato kaj en la alia 7 500 minoritatuloj.

¹² La problemo estas la sama, kiam oni skribas la statutojn de asocio. Vi ne scias, kiu fariĝos trezoristo aŭ prezidanto. Tial vi volas havi regulojn, kiuj limigas la eblajn agojn de la trezoristo kaj la prezidanto, malhelpante ilin forkuri kun la kaso al tropika paradizo.

¹³ Formale oni parolas pri utilo de la enspezoj, kaj la atendon de tiuj utilvaloroj maksimumigas la homoj, kiam ili selektas la socian aranĝon. Oni ankaŭ povas montri, ke la loteria interpreto estas la sola ebla, se teksadoj baziĝas sur atendo de utilvaloroj. Vidu Vickrey (1945) kaj Harsanyi (1955).

En ambaŭ urboj la stratŝildoj estas en la plimulta lingvo, kaj ambaŭ havas teatron, kiu ludas en la plimulta lingvo. Oni konsideras du lingvopolitikajn projektojn en ambaŭ urboj: aldoni la minoritatan lingvon al la stratŝildoj kaj konstrui teatron por la malplimulta lingvo. Apliki la stratŝildojn kostas 1 000 000 jare kaj konstrui kaj uzi la teatron 10 000 000 jare. Ĉiuj individuoj en la du urboj havas la samajn jarajn enspezojn, e . La pagemo, u , de ĉiu individuo por vidi la stratnomojn en sia propra lingvo estas 100, kaj la saman pagemon ĉiuj havas por la ebleco vidi teatraĵon en la propra lingvo. La ekzemplon oni povus konstrui tute ĝenerale kun ĝeneralaj kostostrukturoj kaj preferoj de la individuoj. La elekto de stratŝildoj kaj teatro kun la koncernaj kostoj kaj du urboj ni nur faris por montri la tri eblajn implikojn por lingvopolitiko. Kun aliaj elektoj de politikeroj ni eble ne havus ĉiujn tri situaciojn.

urbo	nombro da plimultanoj	nombro da malplimultanoj	pagemo de teatro kaj stratŝildoj	kostoj de teatro	kostoj de stratŝildoj
	N	n	u	c_t	c_s
I	90 000	15 000	100	10 000 000	1 000 000
II	90 000	7 500	100	10 000 000	1 000 000

Tabelo 4.1. Parametroj de la ekzemplo

Ni do havas la parametrojn en tabelo 4.1.

Se la kostoj estas egale distribuitaj, la popersona imposto fariĝas $t_s^I = 1\,000\,000/105\,000 \doteq 9,52$, $t_t^I = 10\,000\,000/105\,000 \doteq 95,2$ por la stratŝildoj kaj la teatro respektive en urbo I. En urbo II ili fariĝas $t_t^{II} = 1\,000\,000/97\,500 \doteq 10,26$, $t_s^{II} = 10\,000\,000/97\,500 \doteq 102,6$.

Ni unue analizas la provizon de dulingvaj stratŝildoj kaj serĉas la implicitajn enspezojn de individuoj en la du grupoj. Se la stratŝildoj estas nur en la plimulta lingvo, la implicita enspezo de minoritato estas e . Se la stratŝildoj estas dulingvaj, ĝi estas $e + u - t_s^I = e + 90,48$ en urbo I kaj $e + u - t_s^{II} = e + 89,74$ en urbo II, ĉar la uzo de ties lingvo por la homo havas la valoron u , kaj ĉiu devas pagi sian parton de la imposto. Por plimultano la stratŝildoj ĉiam estas en la preferata lingvo, kiu donas implicitan valoron u . La implicitaj enspezoj kaze de unulingvaj ŝildoj do estas $e + u = e + 100$ en ambaŭ urboj, sed kaze de dulingvaj ŝildoj ili estas $e + u - t^I = e + 90,48$ kaj $e + u - t^{II} = e + 89,74$ respektive. Ni kolektis tiun informon en tabeloj 4.2 kaj 4.3. En la tabeloj ankaŭ troviĝas la frakcioj de la du grupoj en la urboj, $\pi_m^I = 15\,000/105\,000 = 1/7$, $\pi_p^I = 90\,000/105\,000 = 6/7$ kaj $\pi_m^{II} = 7\,500/97\,500 = 1/13$, $\pi_p^{II} = 90\,000/97\,500 = 12/13$.

Persono malantaŭ la vualo ne scianta sian postenon kiel membro de la malplimulto aŭ de la plimulto, en urbo I taksas la probablecojn al $1/7$ kaj $6/7$ respektive. Kiel malplimultano la situacio estas pli bona en la egala socio, s_1 , kaj kiel plimultano en

la malegala socio, s_0 . En la malegala organizado de la socio sen stratŝildoj en la minoritata lingvo, s_0 , la atendaj netaj implicitaj enspezoj fariĝas $e/7 + 6(e + 100)/7 = e + 85,71$ kaj en la egala organizado kun stratŝildoj en ambaŭ lingvoj, s_1 , ĝi fariĝas $e + 90,48$. Normala homo malŝatas riskon; tiu aspekto indikas preferon por s_1 , kiu estas senriska, la samaj implicitaj enspezoj sendepende de membreco en la plimulto aŭ malplimulto. Samtempe oni deziras altan averaĝon, parton de granda „kuko“. En urbo I ankaŭ tio estas argumento por s_1 . Ambaŭ aplikendaj argumentoj do kondukas al s_1 , kaj en urbo I certe s_1 elektiĝas kiel la justa socio. La politikero estu efektivigita. Ni ankaŭ notas, ke tio estas la elekto laŭ la diferenca principo de Rawls (1971); oni elektu la alternativon, kiu donas la plej altan utilon al la homo kun la plej malgranda utilo ($e + 90,48 > e$).

	frakcio de loĝantaro	netaj enspezoj en malegala socio	netaj enspezoj en egala socio
malplimulto	1/7	e	$e + 90,48$
plimulto	6/7	$e + 100$	$e + 90,48$
averaĝo		$e + 85,71$	$e + 90,48$

Tabelo 4.2. Decido pri stratŝildoj en urbo I

	frakcio de loĝantaro	netaj enspezoj en malegala socio	netaj enspezoj en egala socio
malplimulto	1/13	e	$e + 89,74$
plimulto	12/13	$e + 100$	$e + 89,74$
averaĝo		$e + 92,31$	$e + 89,74$

Tabelo 4.3. Decido pri stratŝildoj en urbo II

Ni notas, ke s_1 estas efika elekto, ĉar $nu > c$. Oni facile povas montri, ke efikeco de la politikero implikas, ke ĝia efektivigo estas justa, vidu Wickström kaj Gazzola (2020). Kaze de urbo II en tabelo 4.3 la situacio iom ŝanĝiĝas. Kiel antaŭe malplimultano havas pli bonan situacion en la egala socio s_1 kaj la plimultano en la malegala socio s_0 . La malplimulto estas pli malgranda, kaj malantaŭ la vualo la risiko fariĝi ano de ĝi estas pli malgranda ol en urbo I. Pro tio la averaĝaj implicitaj enspezoj pli grandas en s_0 . Do, elektante malantaŭ la vualo la individuoj nun havas konflikton inter malgranda – fakte neniu – risiko en s_1 sed kun malgranda „kuko“ unuflanke kaj aliflanke pli granda „kuko“ en s_0 sed la risiko perdi kaj ricevi pli malgrandan parton ol en s_1 . Kiun organizadon de la socio oni elektas, dependas de la riskmalemo de la individuoj. En kazo de tre alta malemo kontraŭ risiko elektiĝas s_1 – egaleco. Se risiko malgravas, elektiĝas s_0 – efikeco. En urbo II la efika organizo

estas s_0 sen minoritataj rajtoj, ĉar $nu < c$. En tiu kazo egaleco kostas iom en la formo de reduktitaj averaĝaj enspezoj. Se tiuj kostoj superas aŭ malsuperas la valoron de egaleco, dependas de la riskmalemon malantaŭ la vualo. Ne uzante la metaforon, oni povas anstataŭi riskmalemon per la egalecemo de la politikisto. Ni ankaŭ notu, ke tre granda egalecemo korespondas al la diferenca principo, kiu elektas s_1 ($e + 89,74 > e$). Tamen, se la egalecemo estas pli malgranda, s_0 estas la elekto.

La problemo de la teatro estas simila al tiu de la stratŝildoj. Ni trovas la implicitajn enspezojn de la individuoj en la du grupoj. Se nur ekzistas teatro en la plimulta lingvo, la implicita enspezo de minoritatano estas e . Kun la dua teatro, ĝi estas $e + u - t_t^I = e + 4,8$ en urbo I kaj $e + u - t_t^{II} = e - 2,6$ en urbo II. Por plimultano teatro ĉiam ekzistas en ties lingvo, kiu donas al la homo implicitan valoron u . La implicitaj enspezoj kaze de nur unu teatro do estas $e + u = e + 100$ en ambaŭ urboj, sed kaze de du teatroj ili estas $e + u - t_t^I = e + 4,8$ kaj $e + u - t_t^{II} = e - 2,6$ respektive. Tiuj nombroj estas kolektitaj en tabeloj 4.4 kaj 4.5.

Nun la kostoj c , estas pli grandaj kaj neniam estas efike konstrui la teatron, sed la egalecargumento restas. En urbo I ni denove havas la konflikton inter efikeco, ne konstruado de la teatro, s_0 , kaj egaleco, konstruado de la teatro, s_1 . El la vidpunkto malantaŭ la vualo s_0 promesas pli grandan atendon, aŭ averaĝajn enspezojn, sed je risko de perdo, se oni fariĝas parto de la malplimulto. Kontraste, s_1 estas senriska kun malaltaj averaĝaj enspezoj. Kiun institucion strukturon oni elektas, denove dependas de la riskmalemo de la homoj malantaŭ la vualo. Kun tre granda riskmalemo en la metaforo, tio estas tre granda emo al egaleco en la reala mondo, oni elektas s_1 . Tio korespondas al la diferenca principo ($e + 4,8 > e$).

	frakcio de loĝantaro	netaj enspezoj en malegala socio	netaj enspezoj en egala socio
	π	s_0	s_1
malplimulto	1/7	e	$e + 4,8$
plimulto	6/7	$e + 100$	$e + 4,8$
averaĝo		$e + 85,71$	$e + 4,8$

Tabelo 4.4. Decido pri teatroj en urbo I

En urbo II la tuta loĝantaro estas pli malgranda kaj la popersona imposto por financi la teatron iom pli granda. Ĝi superas la pagemon de la minoritanoj kaj por anoj de ambaŭ grupoj la implicitaj enspezoj en la malegala situacio estas pli altaj ol en la egala situacio. Ĉiuj unuanime elektas s_0 . La efika situacio estas denove kiel en nia unua ekzemplo la justa situacio. Nur nun ĝi estas la malegala organizo de la socio. Denove la diferenca principo estas aplikebla, ĉar $e > e - 2,6$. Oni povas montri, ke la malegala socio estas justa sendepende de la riskmalemo, se la tuta enloĝantaro

estas tro malgranda aŭ se la kostoj estas tro altaj rilate al la pagemo de la profitantoj. La kondiĉo por tio estas $N + n < c/u$.

	frakcio de loĝantaro	netaj enspezoj en malegala socio	netaj enspezoj en egala socio
	π	s_0	s_1
malplimulto	1/13	e	$e - 2,6$
plimulto	12/13	$e + 100$	$e - 2,6$
averaĝo		$e + 92,31$	$e - 2,6$

Tabelo 4.5. Decido pri teatroj en urbo II

5. Konkludoj

Uzante la metaforon de la socio kiel loterio baze de la koncepto de socia kontrakto, ni difinis justan socion kiel socion elektitan malantaŭ vualo de nescio; pli facile dirite: oni metas la homojn en la ŝuojn de aliaj por fari elekton pri distribuado. Nia malgranda ekzemplo montris, ke tri tipoj de rezultoj eblas:

1. se la malplimulto estas sufiĉe granda kaj ankaŭ la pagemo sufiĉe granda rilate la kostojn de politikero (formale: se $n \geq c/u$), la justa rezulto estas ankaŭ efika kaj egala. Tio estas, oni donu la saman rajton al malplimulto, kiel al plimulto.
2. se la tuta loĝantaro estas tro malgranda kaj la kostoj de politikero estas tro grandaj rilate la pagemon de la profitantoj (formale: se $N + n \leq c/u$), la justa rezulto estas ankaŭ efika sed malegala. Tio estas, oni ne donu la saman rajton al malplimulto, kiel al plimulto. Diskriminacio estas fakte justa.
3. en la aliaj kazoj, ambaŭ decidoj – enkonduko aŭ neenkonduko de politikero – povas esti justaj, sed ne necese efikaj. Ĉu oni enkonduku la politikeron aŭ ne dependas de kiel forta la emo por egaleco – en la metaforo: la riskmalemo – estas. Se ĝi estas sufiĉe forta, egaleco kaj neefikeco estas justa situacio; se ĝi estas sufiĉe malforta, malegaleco kaj efikeco estas justa elekto.

Oni povas kvantigi la riskmalemon kaj – observante la realan distribuon de lingvorajtoj kaj la lingvopolitikon en malsimilaj landoj – uzi la pensmodelon por trovi la valoron de la riskmalemo, kiu eksplikas la observitan politikon. Tiu valoro uzeblas kiel indikilo de la nivelo de lingva justeco en la koncerna lando, vidu Wickström kaj Gazzola (2020).

Kiel notite ekzistas multaj aliaj aliroj al lingva justeco. La avantaĝo de la elekto de tiu ĉi artikolo estas, ke ĝi kongruas kun aliaj analizoj de publika politiko. Ĝi ebligas trovi senchavan politikon dependantan de la kostoj de la politiko kaj de la preferoj de la homoj afektitaj. Same ĝi enkondukas preferojn por distribuado kiel

klaran trarigardeblan koncepton. Tiel ĝi rilatas la instrumentojn de lingvopolitiko al filozofiaj konceptoj. Iasence oni scias, kion oni faras. La konceptoj ne devenas de *ad hoc* konsideroj, sed de pli vasta pensosistemo.

Dankesprimio

Mi dankas al Federico Gobbo pro multaj konstruktivaj sugestoj, kiuj klare helpis plibonigi la artikolon.

Literaturo

- Alcalde, Javier 2018: Linguistic justice: An interdisciplinary overview of the literature. En: *Language policy and linguistic justice: Economic, philosophical and sociolinguistic approaches*. Eldonis Michele Gazzola, Torsten Templin kaj Bengt Arne Wickström. Heidelberg: Springer. Ĉapitro 2: 65–149.
- Buchanan, James M. 1987: The constitution of economic policy. En: *American Economic Review* 77: 243–250.
- Buchanan, James M. kaj Gordon Tullock 1962: *The calculus of consent*. Ann Arbor: The University of Michigan Press.
- Gazzola, Michele 2014: Lingva justeco: kiel taksu ĝin? La ekzemplo de Eŭropa Unio. En: *Internacia Kongreso Universitato, 67a sesio*. Eldonis José Antonio Vergara. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio: 74–89.
- Ginsburgh, Victor A., Ignacio Ortuño Ortín kaj Shlomo Weber 2005: Disenfranchisement in linguistically diverse societies. The case of the European Union. En: *Journal of the European Economic Association* 3: 946–965.
- Harsanyi, John C. 1955: Cardinal welfare, individualistic ethics, and interpersonal comparison of utility. En: *Journal of Political Economy* 63: 309–321.
- Hobbes, Thomas 1651: *Leviathan or the matter, forme and power of a commonwealth ecclesiasticall and civil*. London: Andrew Crooke.
- Kant, Immanuel 1797: *Metaphysische Anfangsgründe der Rechtslehre*. Königsberg: Friedrich Nicolovius.
- Kloss, Heinz 1977: *The American bilingual tradition*. Rowley (MA): Newbury House.
- Nozick, Robert 1974: *Anarchy, state, and utopia*. New York: Basic Books.
- Patten, Alan 2009: Survey article: The justification of minority language rights. En: *Journal of Political Philosophy* 17.1: 102–128.
- Platono [Πλάτων] 395 a.K.E. [1888, 1980]: *Κρίτων*. Eldonis J. Adam. Cambridge: Cambridge University Press. [Originale eldonita kiel: *Κρίτων*, ca. 395 a.K.E.]
- Rawls, John 1971: *A theory of justice*. Cambridge: Harvard University Press.
- Rousseau, Jean-Jacques 1762: *Du contract social; ou, principes du droit politique*. Amsterdam: Marc Michel Rey.
- Vickrey, William 1945: Measuring marginal utility by reactions to risk. En: *Econometrica* 13: 319–333.

- Wickström, Bengt-Arne 1988: Ekonomiaj teorioj pri justeco. En: *Scienca revuo* 39: 3–16.
- 2015: Language rights: Efficiency, justice, implementation. En: *Transylvanian Society / Erdélyi Társadalom* 13.3: 69–83.
- 2016: Language rights: A welfare-economics approach. En: *The Palgrave handbook of economics and language*. Eldonis Victor A. Ginsburgh kaj Shlomo Weber. Houndmills: Palgrave Macmillan. Ĉapitro 22: 659–688.
- 2019: The percentage rule for minority language rights: Inadequate or discriminatory. En: *Język. Komunikacja. Informacja*. 14: 72–84.
- 2021: Dynamics, costs, and the survival of minorities: Optimal language policies for increasing the vitality of minority languages. En: *Minorités linguistiques et société / Linguistic Minorities and Society* 16: aperonta.
- Wickström, Bengt Arne kaj Michele Gazzola 2020: *Official recognition of minority languages and linguistic justice: A welfare-economics based indicator*. Esplorrapporto 20 5. Belfast: REAL – Esplorgrupo „Ekonomiko kaj lingvo“.
- Wickström, Bengt-Arne, Torsten Templin kaj Michele Gazzola 2018: An economics approach to language policy and linguistic justice. En: *Language policy and linguistic justice: Economic, philosophical and sociolinguistic approaches*. Eldonis Michele Gazzola, Torsten Templin kaj Bengt-Arne Wickström. Heidelberg: Springer. Ĉapitro 1: 3–64.
La ĉi-supre priskribitaj faktoj ne estas simple utopiaj ebloj, kiuj povus ekzisti en ideala mondo, sed ili estas realaĵoj, kiujn pluraj gelemnantoj travivis kaj travivas en nia lernejo kaj kiuj poste alfrontos la vivon kun tiuj interkulturaj bagaĝoj, kiuj ebligas al ili esti respondecaj, konsciencplenaj civitanoj por plibonigi nian mondon. La interkultureco estas tre laŭmoda vorto nuntempe, sed bedaŭrinde, kiel ankaŭ multaj sciencistoj jam konstatis ĝin, ĉiuj parolas pri ĝi, sed ankoraŭ neniu vidis funkcion ĝin je la kontentiĝo de la majoritato... Tio, kion mi povas deziri kaj konsili al ĉiuj estas, ke profitu vi mem el la interkulturaj valoroj, kiujn Esperanto kaj la diversaj esperantaj eventoj donas al ni, ke per unu sola lingvo ni povas aliri tiom da diversaj kulturoj, tiom da valoroj, tiom da interesaj faktoj de nia bunta mondo, kaj profitigu el ili ankaŭ la infanojn, junulojn, ĉar estus tre grava afero, se ili povus komenci sian plenkreskan vivon sciante jam pli ol kiom ni sciis je ilia aĝo.



Bibliografio

- Abdallah-Pretceille, Martine 1992: *Quelle école pour quelle intégration?* ‘Kiu lernejo por kiu integriĝo?’ Paris: Hachette
- 1999: *L’éducation interculturelle* ‘La interkultura edukado’. Paris: PUF
- Akkari, Abdeljalil 2009: *Introduction aux approches interculturelles en éducation* ‘Enkonduko al la interkulturaj aliroj en edukado’. Genève: Carnets des sciences de l’éducation de l’Université de Genève

- Camilleri, Carmel 1985: *Anthropologie culturelle et éducation* 'Kultura antropologio kaj edukado'. Paris, Lausanne: UNESCO, Delachaux & Niestlé
- Chabrun, Catherine 2015: *Entrer en pédagogie Freinet* 'Eniri en la Freinet-pedagogion'. Paris: Éditions Libertalia
- Doutreloux Albert, 1990: Une confrontation de sociétés 'Konfrontado de socioj'. En: Bastenier & F. Dassetto (Ed.). *Immigrations et nouveaux pluralismes*. 'Enmigrado kaj novaj pluralismoj'. Bruxelles: Editions Universitaires et DeBoeck Université. 56–57.
- Ecole de La Grande Ourse 1983-2020: En bref – Comment ça marche? – Actualité* 'Malonge – Kiel ĝi funkcias? – Aktualajoj'. <http://www.grande-ourse.ch/>
- Freinet, Célestin 2017: Une éducation du travail 'Edukado al laboro'. En: *Le Nouvel Educateur* 234. Paris: Çava-Expressions. 51–53.
- Freire, Paulo 1971: *L'éducation, pratique de la liberté* 'La edukado, liberec-praktikado'. Paris: Cerf
- Go, Nicolas 2009: La Méthode naturelle de Freinet 'La natura metodo de Freinet'. En: *Le Nouvel Educateur* 193. Paris: ExpressionsII. 28–35.
- Loewen, Nathan 2013: *La pédagogie interculturelle* 'La interkultura pedagogio'. En: M. Giguère (red.): *Pédagogie Collégiale*. Vol.26, No 3. Montréal: AQPC. 29–34.
- Meunier, Olivier 2007: *Approches interculturelles en éducation. Étude comparative internationale* 'Interkulturaj aliroj en la edukado. Internacia komparativa studo'. Lyon: INRP. Ministère
- Molnár Mónika 2017a: Freinet-pedagogio – Parto I: La teorio de la praktiko – Aŭ: kial preferindus malpli da teorio. En: *IPR* 2017/3: 27–31.
- 2017b: Freinet-pedagogio – Parto II: La teorio pri multifaceta praktiko – El la teknikoj de la Freinet-pedagogio. En: *IPR* 2017/4: 17–21.
- 2018a: Freinet-pedagogio – Parto III: La praktiko de la teorio – La Freinet-pedagogio en vera lernejo. En: *IPR* 2018/1: 4–12.
- 2018b: A Freinet-pedagógia a nyelvtanulás tükrében 'La rilato inter la Freinet-pedagogio kaj la lingvolernado'. En: Karlovitz, János Tibor (red): *Elmélet és gyakorlat a neveléstudományok és szakmódszertanok köréből*. Komárno: International Research Institute. 133–140.
- 2020: Muziko en la lingvoinstruado. En: Kováts, Katalin (red) 2020: *Manlibro pri instruado de Esperanto*. Partizanskie, Roterdamo, Hago: E@I, ILEI, Fondaĵo Edukado.net. 110–113.
- Pagé, Michel 1993: *Courants d'idées actuels en éducation des clientèles scolaires multiethniques* 'Aktualaj ideo-direktoj en la edukado de multetnaj lerneĵaj klientoj'. Québec: Conseil supérieur de l'éducation.

Plurlingveca kapitalo de la socioj kaj ties bildo en Eŭropo kontraste al monopoligaj praktikoj en edukado de fremdaj lingvoj je mezlerneja nivelo

Abstract. Plurilingual capital of society and its state in Europe versus monopolization practices in foreign language teaching in medium level education

A new concept of plurilingual capital of society has been introduced inspired by the theories of Bourdieu. It clarifies the concept and relations to similar ideas, e.g., to distinguish between foreign languages as auxiliary or merely cultural languages. The methodology elaborated made it possible to quantify measures and comparisons of different models of foreign language teaching in medium level education. The results demonstrate that although the teaching of foreign languages is considered as an important educational goal, the real offer concentrates on only one or two dominant and at most three or four secondary languages. These practices dramatically contrast with EU declarations. They are unable to raise the low plurilingual capital of societies or to foster deeper intercultural communication in Europe, which is proud of its cultural and linguistic diversity. The balanced model presented here would considerably raise this capital without challenging an individual to learn more languages than at present.

Resumo. Nova koncepto de plurlingveca kapitalo de la socio estas enkondukita inspirita de la teorioj pri la kultura kapitalo de Bourdieu. Sekvas klarigoj de la koncepto kaj ĝiaj rilatoj kun parencaj, sed malsamaj nocioj, i.a. por distingi inter fremda lingvo kiel helplingvo kaj kiel nur kultura lingvo.

Ellaborita metodologio kvante mezuri kaj kompari modelojn de instruado de fremdaj lingvoj en eŭropaj mezlernejoj malkovras signifajn trajtojn de nuna edukpolitiko. Evidentiĝas, ke kvankam edukado de fremdaj lingvoj estas rekonata en Eŭropo kiel grava eduktasko, tamen la oferto koncentriĝas je nur 1-2 lingvoj kiel dominaj kaj maksimume 3-4 evidente duarangaj. Tiuj praktikoj draste kontraŭas tuteŭropajn deklarojn, ĉar neniel povas plialtigi malaltan plurlingvecan kapitalon de la socioj, nek subteni profunde interkulturan komunikadon en Eŭropo tiom fiera pri sia kultura diverseco. Proponata balancita modelo videble plialtigus tiun kapitalon sen ŝarĝi individuojn lerni pli da lingvoj ol nun.

1. Enkonduko

Kompreno de Aliulo kaj respekto al Aliulo, kiu funkcias ĉiutage en sia lingvo kaj estas enradikiĝinta en sia kulturo dependas de la scipovo de la lingvo de Aliulo sufiĉa por povi enpenetradi lian kulturon. Sociskale tio esprimiĝas per la nombro de la socioj havantaj tiujn lingvoscipovojn. Ja pere de sufiĉe multaj individuoj

orientiĝantaj tiamaniere en Alies kulturo okazas – pere de mekanismoj de kultura difuzo kaj transfero – plialtigo de tiu respekto tutsocie, ankaŭ inter tiuj kiuj la respektivan lingvon ne regas.

La studo celas unuavice formuli novan koncepton, t.e. tiun de *plurlingveca kapitalo de la socio* kiel unu el la kulturaj subkapitaloj. Scipovo de fremdaj lingvoj kaj ĝiaj ligoj kun aliaj kulturoj kaj efektive interkultura komunikado estas kvalite kompleksa kaj diversaspekta problemaro, do fundamenta por la esplorado de plurlingveca kapitalo de la socio. Necesas minimume ĝin skizi analizante tiun kompleksecon, ĉar la koncepto mem kiel kultura subkapitalo de la socio ne nur de individuo ne estis ĝis nun science formulita kaj traktata.

Por kompreni la koncepton de plurlingveca kapitalo da la socio kaj ties signifo, necesas kapti kompleksan karakteron de fremdlingvaj scipovoj kaj ties signifo por la individuo en etnolingve ĉiam pli miksaj socioj. Tio postulas pliprofunde rigardi diversajn sociajn rolojn kaj situaciojn (kuntekstojn) de scipovo de lingvoj far individuo kaj far la socio kiel tuto, precipe rilate diversecon de la kulturoj kaj ebloj enpenetri ilin. Traktas tion la sekcioj 2 kaj 3.

Baze de tiu koncepto sekvas, duavice, metodologia propono de rimedoj mezuri la fenomenon kaj, triavice, prezento kaj analizo de la nuna situacio en eŭropaj landoj laŭ tiu metodologio. Por komenci la esplorojn, kiel studekzemplan mi uzis datumojn koncernantajn instruadon de fremdaj lingvoj je mezlerneja edukŝtupo, kiu grandparte respondecas pri la lingvosocioj.

Apliko de la formulita koncepto kaj metodologio konklude prezentas bildon kies komuna trajto en opaj landoj estas monopoleco de la instruado de la angla kaj eventuale 1-2 malpli oftaj lingvoj, kio videble kaj mezureble malhelpas pligrandigon de la plurlingveca kapitalo de la respektivaj socioj kaj limigas pli profundan diverskulturan komunikadon inter Eŭropanoj. El la modeloj kaj analizo evidentiĝas la hiato inter deklarataj desupre noblaj celoj de instruado de fremdaj lingvoj kun la realo. Pro tio estas ankaŭ skizita teoria modelo de la distribuo de lernantoj de diversaj lingvoj kiu havus potencialon pligrandigi tiun kapitalon de la socio kiel plifortigi la interkulturan komunikadon sen ŝarĝi individuojn per lernado de multe pli da lingvoj ol aktuale.

2. Bazaj konceptoj kaj nocioj

2.1. Kulturo kaj komunikado

Por eviti eventualajn miskomprenojn en interpretado de ĉefaj nocioj influantaj la formuladon de la koncepto de plurlingveca kapitalo de la socio jen difinoj de kelkaj el inter ili kiel mi uzas ilin:

Fremdlingva komunikado – komunikado inter individuoj pere de la lingvo kiu ne estas la unua (ĉefa, primara) por almenaŭ unu el inter ili.

Interkultura komunikado laŭ individua dimensio – komunikado inter individuoj portantaj malsamajn kulturojn, sed reciproke konatiĝintaj kun la kultura kunteksto de la esprimoj kaj esprimmanieroj de komunika partnero.

Interkultura komunikado laŭ socia dimensio – komunikado inter socioj portantaj malsamajn kulturojn pere de individuoj, kiuj kapablas komunikiĝi je la nivelo de bona reciproka kultura lerteco (orientiĝo en alies kulturo).

Laŭ tiuj difinoj interkultura komunikado neniel egalas al fremdlingva komunikado. Interkultura komunikado inter individuoj estas konceptata multe malpli vaste ol la fremdlingva komunikado. Ĝi postulas ne nur relative altan lertecon en la uzata lingvo sed ankaŭ reciprokan orientiĝon en la kulturoj de la komunikantoj kiujn la uzata lingvo portas.

Ekzemple komunikado en esperanto inter Hungarino kaj Polo ne scipovantaj reciproke siajn lingvojn – estas fremdlingva komunikado sed ne interkultura (hungara – pola) komunikado, ilia komunikado ne inkludas liberan aplikadon de konotaĵoj el propraj kulturoj nek specifajn socikulturajn esprimmanierojn (ekz. Ziĝba 2008). Tiu-speca komunikado enhavas nur specifajn konotaĵojn kaj esprimmanierojn de la uzata pera lingvo (esperanto ĉi-kaze). Okazas, do, maksimume interŝanĝo de informoj pri la kulturoj de ambaŭ, plej ofte eĉ ne tiom – la komunikado havas utilecan orientiĝon, ne kulturenpenetran.

Konsekvence, scipovo de sama fremda lingvo per la komunikantoj helpas, sed ne garantias eblecon de interkultura komunikado en la supra senco. En tiu senco interkultura komunikado inter individuoj estas reale maksimume nur unudirekta. Koncernas nur tiun kulturon kiun la uzata lingvo portas. Bone tion ilustras komunikado kun etnaj minoritatoj, ekzemple situacio de romaa (cigana) kulturo. Reprezentantoj de majoritata lingvo kaj kulturo ne povas enpenetri romaan kulturon sen relative bona scipovo de romaa lingvo dum inverse jes. Do, por Romao scipovanta bone la lingvon dominantan en respektiva socio interkultura komunikado okazas kaj koncernas la dominantan kulturon dum por la komunikanta partnero – reciproka procezo ne okazas.

Pro tio gravas la distingo inter individua kaj socia dimensio de interkultura komunikado. En socia dimensio gravan rolon havas procezoj similaj al kultura difuzo aŭ kultura transfero komprenataj tamen malpli profunde: kiel perado de kulturaj interŝanĝoj far homoj scipovantaj aliajn kulturojn. Por ke tio okazu en rimarkebla socia skalo ne sufiĉas profesiaj tradukistoj kaj filologoj, nepras certa proporcio de homoj relative lertaj en la lingvo kaj kulturo alia ol la dominanta, nepras sociaj portantoj de alia kulturo. Bona ekzemplo estas la franca inter eŭropaj aristokratoj kaj bone edukitaj personoj antaŭ jarcentoj. Sekve, interkultura komunikado laŭ socia dimensio ne estas tiomgrade postulema kiel laŭ la individua dimensio, en ĝi povas partopreni pli da socioj, kondiĉe ke por la koncerna kulturo la necesan sojlon atingas sufiĉe da perantoj.

2.2. Interkultura komunikado – vasteco de la nocio

La difinoj de la interkultura komunikado en la antaŭa sekcio postulas reciprokan orientiĝon pri la malsamaj kulturoj de la komunikantoj aŭ minimume scivolon pli profunde ekkoni ilin. Oni do povas konsideri tiujn difinojn kiel interkulturan komunikadon en malvasta senco.

Laŭ alia, vasta senco interkulturaran komunikadon sufiĉas koncepti kiel renkontiĝon de homoj el malsamaj kulturoj, en la kunteksto, en kiu la komunikantoj ne uzas dum tiu komunikado saman gepatran (ĉefan) lingvon. En tiu vasta senco de la nocio aperas tamen diversaj netipaj kazoj kaj dilemoj, ekzemple:

1. komunikado de anglalingva usonano el Novjorko kun novzelandano el la vilaĝo en Suda Insulo – ĉu ni ekskludu ĝin el niaj konsideroj malgraŭ sama gepatra lingvo, sed aliaj ĉiutagaj kulturoj?
2. infanoj el svisa kantono Friburgo en komunumo Courtepin – loĝas tie germanlingvaj kaj franclingvaj infanoj frekventantaj la saman lernejon, sed klasojn alilingvajn – ĉu ili portas aliajn kulturojn, kiomgrade aliajn?
3. denaskaj esperanto-parolantoj el diversaj landoj – de la malsamaj kulturoj en kiuj ili vivas – ĉu ili komuniĝas interkulture?
4. parolantoj de la sama lingvo en la sama teritorio – apartenantaj al diversaj sociaj klasoj aŭ en diversaj epokoj – ĉu ili portas saman kulturon?

Por iom helpi konsideri tiuspecajn kazojn, mi proponas premisi, ke la kultura distanco ne gravas, gravas ke la kultura malsameco estas sentata de la komunikantoj kiuj estas scivolaj kompreni specifajojn de la malsama kulturo pere de sia komunikpartnero.

Mi aplikas la nocion pri interkultura komunikado en la malpli vasta, kulturorientita senco. La pli vasta ne taŭgas.

2.3. Kulturaj kapitaloj sekvante la teoriojn de Bourdieu

Elirante de la teorioj de la sociologo de kulturo Pierre Bourdieu (Bourdieu 1985, 1987, Bukowska 2013):

Kapitalo – kumulataj, heredataj, reproduktataj kaj evoluigataj rimedoj de la individuoj aŭ grupoj kreante avantaĝon por la posedanto.

Kultura kapitalo – rimedoj kiel sintenoj, ideoj, scioj, kapabloj kaj kompetentoj kiujn la individuo ekposedas partoprenante vivon en la socio (do en la procezoj de sociigo kaj edukado) kaj la posedataj kulturaj produktoj (se la individuo kapablas ilin utiligi).

Kultura kapitalo estas rigardata kaj en la individua kaj en la socia (grupa) dimensioj. Aktuale la teorioj iniciatitaj kaj skizitaj de Bourdieu enradikiĝis en sociologiaj esploroj kaj studoj kaj estas vaste utiligataj en ĉi-rilataj sciencaj analizoj. Por pli pre-

cizaj konsideroj kaj depende de esplorkampoj oni distingas kulturajn subkapitalojn, ekzemple intelektan, lingvan, multilingvan, artan.

Baze de tiuj konceptoj mi aplikas jenajn kulturajn subkapitalojn:

Plurlingveca kapitalo de la individuo – kultura subkapitalo koncernanta avantaĝon por la individuo pro lia kapablo direkte lingve komunikiĝi en lingvoj de diversaj kulturoj aŭ etnoj. Ekzemple, se la plurlingvecan kapitalon de la individuo lerte komunikiĝanta en nur unu, sia gepatra lingvo ni taksos kiel 1, tiam la pritakso kreskas depende de la nombro de la konataj lingvoj kaj lerteco ĝin uzi.

Plurlingveca kapitalo de la socio – kultura subkapitalo koncernanta avantaĝon por la socio kiun kreas ties membroj kapablaj direkte lingve komunikiĝi en lingvoj de kulturoj aŭ etnoj aliaj ol la dominanta en la socio.

Tiun kapitalon determinas kaj la nombro de unuopaj lingvoj (plurlingveco) kaj la sumo de proporcioj de la individuoj ilin uzantaj rilate la tutan (plenkreskan) loĝantaron. Ekzemple, la plurlingveca kapitalo de la socio en kiu 100% scipovas nur unu fremdan lingvon (je pli ol 1% de la loĝantaro) estas multe malpli alta ol en la kazo de 5 lingvoj po 20%.

Diskuto pri la rolo de lingvo en interkultura komunikado ne povas eviti la konsiderojn pri la rilatoj inter lingvo, pensado kaj kulturo. La temo estas ampleksa, ĉar la rilatoj inter ili estas profundaj kaj reciprokaj. La artikolo ne enprofundiĝas en tiujn konsiderojn. Estas tamen interese rimarki la konsekvencojn de tiuj rilatoj al la kazo de plurlingva individuo aŭ plurlingva socio. Ekzemple, ĉu plurlingvano perceptas la realecon plurmaniere? Ĉu tiu persono kapablas pensi plurmaniere, sed uzante konkretan lingvon restas nur en ties pensmaniero kaj kulturo (do, ke la uzata lingvo limigas, blokas lian pensadon)? Ĉu ankaŭ en aliaj lingvoj kiujn li aŭ ŝi konas? Ĉu tia plurlingvano havas pli riĉan kulturalan kapitalon, kiomgrade? Ĉu en lia aŭ ŝia kazo la koncepto pri parolanta homo (*homo loquens*) ne iĝas pli adekvata, ne pozicias lin alie? Simile pri la socia dimensio de plurlingveco.

2.4. Klasifikado de lingvoj en la komunikado

La rolo de lingvoj kaj ties scipovo en la komunikado aspektas diverse por la individuo kaj por la socio. Sube la prezentado de ambaŭ modeloj kiel mi uzas ilin.

Diagramo 1. Lingvoj – individua dimensio

Hejmaj (parolataj hejme en ĉiutaga komunikado)	Bazaj lingvoj Ĉefa (primara) lingvo (la plej flue regata el inter ili)
Lernejoj (instruado de ne- lingvaj fakoj)	
Profesiaj (uzataj en laborloko – dum min. 30% de la tempo)	

Diagramo 2. Lingvoj – socia dimensio

Administraj (la individuo uzas en kontaktoj kun la loka publika administrado)	De enmigrintoj (la individuo uzas kiel enmigrinto aŭ ties posteulo)	Minoritatoj
De regionaj aŭ disaj etnoj (la individuo uzas apartenante al respektiva etnogrupo)		
Aliaj (malofta praktikado – memstara kompetento- nivelo)	Okazaj lingvoj	Alilandanoj
	Helplingvoj (lernataj kun la celo de utilecorientita lingvokomunikado)	
	Nur-kulturaj fremdlingvoj (lernataj kun la celo enprofundiĝi en la kulturon de ties portantoj)	

Kelkaj aldonaj klarigoj:

Bazaj lingvoj – tiuj kiujn la individuo bone regas kaj praktike preskaŭ ĉiutage uzas. En la praktiko plejofte estas nur unu baza lingvo – la sama hejme kaj ekstere. En tiu kazo kaj ĉiuj aliaj, kiel ekzemple: iu lingvo hejme, alia ol la hejma en la lernejo aŭ laborloko – unu lingvo iĝas ĉiam la ĉefa (primara) en la koncerna vivosfero (uzkampo), tiu aktuale plej ofte tie praktikatas. Ĝi ne nepre devas esti la patrino aŭ patra lingvo.

Okazaj lingvoj – lingvoj regataj je minimume memstara lingvolerteco uzataj tamen sporade.

Helplingvoj kaj nur-kulturaj lingvoj – distingo inter ambaŭ gravas por nunaj celoj. La distinga kriterio estas la celo de la lernado. Helplingvon oni lernas kaj instuas por komuniki kun alilingvanoj pro utilec-orientitaj bezonoj. Por iĝi helplingvo, ĝin devas kapabli uzi praktike relative vasta grupo da homoj kies primaraj lingvoj malsamas. Enpenetro en la kulturon kiun tiu ligvo portas ne ĉefrolas aŭ ne estas atentata, kvankam ebla. Ekzemple tiun rolon en multetna Granda Litovia Princlando dum jarcentoj unue havis la rutena kaj poste la pola lingvo. Kontraste, nur-kulturan femdlingvon oni lernas kun la ĉefa celo enpenetri la kulturon de ties portantoj. Ĝia uzado kiel pontolingvo fremda por kulturoj de la komunikantoj ne estas celata, sed povas rare okazi.

Lingvoj de minoritatoj – ilia socia statuso estas specifa. Dum la portantoj de tiuj lingvoj plej ofte estas konatiĝintaj kun aŭ celas orientiĝi en la socie dominantaj lingvo kaj kulturo la inversa procezo ne okazas. Portantoj de la dominantaj lingvoj nur escepte pretas lerni tiajn lingvojn.

3. Signifo de plurlingveca kapitalo de eŭropaj socioj

3.1. Gvidaj tezoj

- (1) *Kultivado kaj pli abunda utiligado de la kultura kaj socia diverseco de Eŭropo postulas i.a. plurlingvecon de eŭropaj socioj.*

La plurlingveco de la socio estu komprenata kiel ekzisto de pluraj grupoj de loĝantoj en unuopaj landoj – krom la profesiaj tradukistoj kaj filologoj – kiuj kapablas direkte lingve komuniki kun kulturoj aŭ etnoj aliaj ol la dominantaj(j) en la socio. Posedon de tiuspeca kapablo kaj rimedoj pere de la socio – mi konceptas kiel ties **plurlingvecan kapitalon**.

- (2) *Kultivado de plurlingveco de la socioj kaj ties kapitalo estas en Eŭropo malatentataj, kvankam ĝuste ĝi estas ilo por la kulturenhava komunikado inter la Eŭropanoj.*

La plurlingveco de la individuo estas de jardekoj signifa por la eŭropa lingva edukpolitiko, kiu ekzemple jene reflektiĝas en la Eŭropa Lingva Portfolio (Council of Europe 2011), kiu celas “... favorigi kulturan kaj lingvan diversecon, propagi interkulturan lernadon kaj kompetenton, helpi la lernanton partopreni en kultura diveseco de Eŭropo”

Tamen la plurlingveca kapitalo de la socio estas komplete nevidebla en eŭropaj edukpolitikaj dokumentoj, analizoj, studoj. Imagu, la situacion, en kiu ĉiu plenkreska Eŭropano parolus eĉ 2-3 fremdajn lingvojn samajn en ĉiu lando. Ĉu tio favorigas „kulturan kaj lingvan diversecon”? Ĉu tio garantias „partoprenon en kultura diverseco de Eŭropo” uzanta pli ol 30 diversajn lingvojn ĉiuj portantaj alian kulturon? Kiel reale

atingi tian diversecon? Ĉu pere de instruado de la samaj 2-3 fremdlingvoj tra Eŭropo? Kiom da lingvoj havas sencon reale ekmaŝtri far averaĝa Eŭropano?

Konklude, plurlingveco de la individuo helpas, sed ne garantias plurlingvecan kapitalon de eŭropaj socioj. Do, sen plurlingveco de la socio la supre deklarataj celoj ne estas atingeblaj. Mi celas demonstri, ke ĉefe socia plurlingveco estu atentata por ke la supraj celoj pri la diverseco de samrajte traktataj kulturoj ne restu ĉefe belaj, eŭfemismaj sloganoj.

3.2. Multkultureco de la socio *versus* plurlingveco de la socio

Por eviti miskomprenojn jen kelkaj klarigoj pri la diferencoj inter multkultureco kaj plurlingveco.

Multkultureco – kutime estas konceptata laŭ du modeloj: kunekzistado kaj kultivado de diversaj kulturoj en la sama teritorio (ekz. ŝtato) sen (unua modelo) aŭ kun (dua modelo) la postulo de integriĝo kun la dominanta kulturo. En ambaŭ kazoj multikultureco estas riragdata nur laŭ la socia ne individua dimensio.

Multkultureco de la socio neniel egalas al plurlingveco de la socio. Ili estas du apartaj, nekompareblaj fenomenoj:

- multkultureco de la socio – estas direktata internen en la socio, estas konceptata kiel kunekzistado de diversaj kulturoj enkadre de la socio aŭ kiel politiko rilate diversecon de la kulturoj ene de la ŝtato;
- plurlingveco de la socio – estas direktata eksteren de la socio, estas kiel fenestro per kiu la socio rigardas eksteren kaj la ekstero havas ŝancon enrigardi internen.

Dum la multkultureco estas respektata kiel grava, la plurlingveco de la socio kaj ties kapitalo estas malatentataj, kvankam ĉefe la lasta estas rimedo por kulturenhava komunikado inter Eŭropanoj.

3.3. Miaj premisoj

Por klarigi kaj provi prui la starigitajn tezojn mi konscie aplikas la jenajn premisojn:

1. Sapir–Whorf hipotezo (Sapir 1970), laŭ kiu la lingvo influas la psikon kaj realec-percepton de la homo, estas trafa – konsekvence, diverseco en scipovo de aliaj lingvoj kaj tiel perceptataj “mondoj” pliriĉigas la kapitalon de la individuo kaj de la socio. Tamen trafaj estas ankaŭ aliaj konceptoj, ekz. pri la ĉefa rolo de la kulturo rilate lingvon kaj pensadon (Malinowski 1922, 1931) aŭ la ĉefa rolo de la parolanta homo (Łozowski 2014) – do tiuj rilatoj forte ligas lingvojn kaj kulturojn kun la koncepto de plurlingveca kapitalo de la socio, estas ties esencoj.

2. Kultura riĉeco kaj diverseco ebligas interdividi elementojn de la kulturoj kaj propagi reciprokan interkompreniĝon – ekz. la EU iniciato pri la Eŭropa Kapitalo de Kulturo.
3. Pli profunda kono de aliaj kulturoj ol la dominanta en la koncerna socio helpas evoluigi asertan toleremon por Aliulo – ĝi kontraŭstaras negativajn stereotipojn, kulturajn ŝokojn aŭ koliziojn de civilizacio.
4. Scipovo de aliaj lingvoj pere de mekanismoj similaj al kultura difuzo kaj kultura transfero pliriĉigas la tutan socion – ankaŭ tiujn kiuj ne konas la respektivan lingvon.
5. En la tutteriĝanta mondo homoj amase renkontas kulturen diversecon kaj ties konsekvencojn – ekz. enkadre de organizaj kulturoj en firmaoj, en universitatoj, dum eksterlandaj kontaktoj turismaj kaj komercaj.
Kontrolado de tiuj premisoj ne eniras la nunan temon, do ni traktu ilin kiel eliraj hipotezoj.

4. Metodologio de la mezurado de plurlingveca kapitalo de la socio

Se oni intencas analizi iun ekzistantan socikulturen fenomenon kaj priskribi ĝin nepras konsideri metodologion de ĝia mezurado. Estas klare, ke en la kazo de plurlingveca kapitalo de eŭropaj socioj gravas disponeblaj datumoj, ilia komparebleco kaj kredindeco. Por komenci analizojn de la temo, ĝis nun apenaŭ esplorata, mi decidis baziĝi je praktike instruataj femdaj lingvoj en mezlernejoj de la dua ŝtupo konata kiel ISCED-3 (ISCED, UNESCO 2011), ĉar:

- unue, edukado ĝis tiu nivelo, do ĝis maturiĝo de la lernantoj amase disponigas la socion kaj la individuojn pri la bazoj de ilia plurlingveca kapitalo;
- due, nur ĉe la fino de tiu edukŝtupo aperas fremdlingva lerteco je la nivelo minimume B2 (memstara alta laŭ CEFR 2011) permesanta konatiĝi kun la kulturo de ties portantoj;
- trie, ekzistas relative abunda statistika materialo kolektata de multaj jaroj per eŭropaj institucioj kiu estas komparebla inter ŝtatoj kaj jaroj.

Limigo de la analizo al tiu grupo kaj tiuj datumoj kompreneble ne respegulas adekvate la situacion en la tuta socio. Sufiĉas tamen por analizi eblajn modelojn prezenti la fenomenon kaj proponi instrumentojn por kvante kaj kvalite mezuri ĝin.

Mi plene konscias, ke por ricevi pli adekvatan bildon tra la tuta socio gravas praktika aplikado de fremdaj lingvoj pere de plenkreskuloj. Ili ja pliprofundigas siajn lingvokompetentojn je pli altaj ŝtupoj de edukado (universitatoj, kursoj) kaj praktike ilin dum sia profesia vivo. Tamen respektiva kredinda datumaro eŭropaskale ankoraŭ mankas.

La statistika materialo pri la distribuo de lernantoj lernantaj fremdajn lingvojn en mezlernejoj en 2018 devenas de la Eŭropa Jarlibro (EY 2019) kaj koncernas ne nur ŝtatojn de Eŭropa Unio sed ankaŭ aliajn landojn de Eŭropo. Por kompari la kredinde-

con de tiuj datumoj mi fine prezentas ankaŭ pli detalajn statistikojn laŭ polaj oficialaj datumbazoj (SIO 2018).

Statistikajn datumojn kaj la distribuojn eblas mezuri kaj modeligi. Tiucele mi aplikas du tipojn de mezuriloj:

- tipaj statistikaj mezuriloj de la distribuoj;
- specifaj mezuriloj kiuj pli adekvate respegulas la modelojn.

Rimarko: en la distribuo-modeloj estis konsiderataj nur lingvoj instruataj al pli ol 1% da lernantoj de la koncerna lando (ŝtato), ĉar statistike nur tiuj iel rolas. Tio signifas en la praktiko, ke ekzemple lingvoj de enmigrintoj en neniuj landoj povas esti statistike konsiderataj.

Tipaj statistikaj mezuriloj:

1. **diverseco** – nombro da lingvoj instruataj
2. **averaĝo** – averaĝa procentaĵo de tiuj lingvoj en la distribuo
3. **norma devio** – esprimas grupan devion de la averaĝo
4. **oblikveco** – indikas asimetron de la distribuo
5. **lingvoj per capita** – nombro da lingvoj averaĝe instruataj al lernanto.

La analizo de la rezultoj montris, ke tiuj mezuriloj ne kapablas klare diferencigi empiriajn modelojn de plurlingveco, pro tio mi enkondukis aliajn, specifajn mezurilojn.

4.1. Specifaj mezuriloj de plurlingveca kapitalo de la socio

Specifaj mezuriloj helpas kapti kiom gvidaj estas la pozicioj de la plej ofte lernataj lingvoj (monopoleco, duopoleco, triopoleco) en la distribuo kaj mezuri plurlingvecon kiel tia.

- 1) **monopoligo** – mezuras monopoleon de la 1-a lingvo en la distribuo = procentaĵo de 1-a lingvo / sumo de procentaĵoj de **ĉiuj** aliaj lingvoj
Komento: valoro $\geq 1,5$ – indikas monopoleon de la 1-a lingvo rilate ĉiujn aliajn
- 2) **duopoligo** – mezuras gvidan pozicion de du plej ofte instruataj lingvoj = suma procentaĵo de du gvidaj lingvoj / 2 / sumo de procentaĵoj de **ĉiuj** aliaj lingvoj
Komento: se ne monopolo kaj duopoligo $> 2,0$ – indikas duopoleon de du gvidaj lingvoj
- 3) **distanco 1-2** – helpas alimaniere mezuri monopoleon de 1-a lingvo en la distribuo = procentaĵo de 1-a lingvo – procentaĵo de 2-a lingvo
Komento: se distanco 1-2: ≥ 25 procentpunktoj kaj distanco 2-3: < 25 procentpunktoj – indikas monopoleon
- 4) **distanco 2-3** – helpas alimaniere mezuri duopoleon de du plej ofte instruataj lingvoj = procentaĵo de la 2-a lingvo – procentaĵo de 3-a lingvo
Komento: se distanco 2-3: ≥ 25 procentpunktoj – indikas duopoleon
- 5) **distanco 3-4** – mezuras triopoleon = procentaĵo de 3-a lingvo – procentaĵo de 4-a lingvo

Komento: se distanco 3-4: > 25 procentpunktoj – indikas triopolon

6) grado de **absoluta plurlingveco:**

$$Pa = N * \sum_{n=1}^N L_n = N * \text{lingvoj-per-capita}$$

7) grado de **pezita plurlingveco:**

$$Pw = N * \sum_{n=1}^N \left(\sum_{i=1}^K \alpha_k L_{n,k} \right)$$

kie:

- N – nombro da lingvoj kun $\geq P$ da lernantoj (P – aplikita sojlo P=1%)
 - tiu faktoro substrekas diversecon da la instrutaj lingvoj, ekz:
N=1, L=100% \rightarrow Pa = 1; N=2, L₁=50%, L₂=50% \rightarrow Pa = 2
- K – nombro da atingeblaj lingvaj lertecniveleoj
- L_n – frakcio da lernejanaj lernantaj lingvon n je iu ajn lerneja ŝtupo
- L_{n,k} – frakcio da lernejanaj lernantaj lingvon n je la nivelo k
- α_k – koeficiento indikanta la atingatan lingvan kompetencon.

4.2. Mezurado de lingvolerteco

Por mezuri pezitan plurlingvecon necesas apliki koeficientojn respegalantajn opajn lertecniveleojn. Ne trovante iujn oficialajn indikilojn validajn tuteŭrope mi decidis bazi je deklarataj nombroj da instruhoroj por celata lingvonivelo antaŭvidataj en la oficialaj programoj de lingvoinstrudao en Pollando (MEN 2017). Jen la detaloj kaj deduktitaj proksimumaj estimadoj. Por la nivelo B2 mi aplikis valoron de la koeficiento $\alpha_k = 1$.

Diagramo 3. Estimado de koeficientoj de lingvolerteco.


k	nivelo	horoj	B2 = 1	α_k
1	A1	120	0,11	0,13
2	A2	240	0,22	0,25
3	A2+	360	0,33	0,40
4	B1	800	0,73	0,75
5	B2	1100	1,00	1,00
6	C1	1400	1,27	1,25
7	C2	1700	1,55	1,50

Fonto: Jerzy Leyk

5. Modeloj de fremdlingva edukado je mezlerneja nivelo en eŭropaj landoj


La designitaj sube modeloj baziĝas je datumbazoj eŭropaj (Eurostat 2019) kaj polaj (pri Pollando SIO 2018). Grupigitaj estas por demonstri specifajn trajtojn depende de la kazoj.

Diagramo 4. Komparo de PL kun LU – lando kun 3 administraj lingvoj




PL – duopolo, LU – triopolo

Diagramo 5. PL kompare kun AT, FR, IT – landoj de lingvoj plej ofte instruataj kiel fremdaj




FR – duopolo, AT, IT – monopolo

Diagramo 6. PL kompare kun SE, FI – elektitaj Skandinavaj landoj




SE – monopolito, FI – duopolo

Diagramo 7. PL kompare kun LI, MT – flankaj landoj de EU




LI, MT – monopolito

Diagramo 8. PL kompare kun HU – proporcio al la sumo de ĉiuj lingvoj (=100%)




PL, HU – duopolo

Diagramo 9. Komparo de PL kun polaj absolutaj kaj pezitaj datumbazoj



PL absol. – duopolo, pezite – monopolo

Diagramo 10. Komparo de PL kun pezitaj: PL kaj la celinda balancita modelo por Eŭropo



BALANS – sen n-polo
 Fonto de ĉiuj modeloj: Jerzy Leyk

Komentoj pri kelaj specifaj trajtoj de la modeloj:

1. PL + LU: PL – duopolo, dominas ENG – modelo tre ofta en Eŭropo; LU – sola kazo de triopolo, ENG en tria pozicio, maksimuma nombro de fremdaj lingvoj per lernanto = 2,44.
2. AT, FR, IT – landoj kies lingvo apartenas al plejofte instruataj en Eŭropo: malpli da fremdlingvoj instruataj (4-5), kompare: en UK nur 0,6 per lernanto.
3. SE, FI – elektitaj skandinaviaj landoj: SE – ekstreme forta monopolo de ENG; FI – duopolo de ENG kaj SVE (escepta rolo de la sveda kiel regiona).
4. LI, MT – flankaj landoj de EU, gravas lingvoj de najbara lando (RUS/ITA): LI – monopolo de ENG, nur 4 fremdaj lingvoj; MT – monopolo de ENG 100% instruata.
5. PL, HU – kalkulkataj proporcie al la tuta lernantaro – preskaŭ identaj modeloj
6. PL – diversmetode: eta diferenco inter datumbazoj eŭropa kaj pola (do relative granda kredindeco); pezite per lingvolerteco iĝas monopolo de ENG, GER ege perdas gravecon.
7. BALANS – proponata celinda balancita modelo por Eŭropo (inkludas lingvolertecan): bazas je 3 balancitaj helplingvoj (lernantaro po $\geq 30\%$) + 9 nur-kulturaj (po $\geq 5\%$) + aliaj (sume 15%); rekonebla manko de iu ajn n-polo de helplingvoj (distanco 3-4 $< 25\%$).

5.1. Plurlingvecaj statistikaj mezurvaloroj

Tabelo 1. Detalaj valoroj de uzataj mezuriloj koncernantaj designitajn modelojn (propra).

Mezuriloj	EY - PL	EY - LU	EY - AT	EY - FR	EY - IT	EY - SE	EY - FI	EY - LI	EY - MT	EY - HU	PL SIO	PL A1-C2	BALANS
N - nombro da lingvoj	6	4	5	5	4	6	6	4	5	6	6	6	12
averaĝo	28,2%	60,8%	27,4%	36,1%	35,0%	31,2%	41,6%	30,4%	29,7%	16,6%	32,4%	17,5%	17,9%
norma devio	38,2%	40,1%	40,5%	41,9%	39,7%	39,6%	47,6%	39,7%	40,5%	24,1%	40,9%	32,1%	16,3%
statistika oblikveco	1,35	-1,86	2,13	1,01	1,86	1,93	0,62	1,63	1,93	1,49	1,15	2,18	1,48
monopoligo	1,24	0,42	2,57	1,18	2,03	1,65	0,81	2,54	1,91	1,46	0,99	3,40	0,31
duopoligo	3,85	1,14	2,63	3,21	2,64	2,05	2,98	6,23	2,55	5,16	5,86	12,08	0,35
lingvoj <i>per capita</i>	1,70	2,44	1,38	1,83	1,40	1,61	2,19	1,23	1,52	1,33	1,96	1,05	2,30
distanco 1-2	37,5%	4,6%	82,5%	39,4%	70,0%	71,0%	8,5%	62,4%	72,7%	27,6%	28,1%	61,5%	15,0%
distanco 2-3	48,4%	10,2%	6,1%	43,9%	10,6%	15,5%	80,9%	19,4%	13,5%	28,6%	59,5%	18,1%	5,0%
distanco 3-4	2,5%	71,0%	0,8%	9,6%	4,3%	2,6%	1,6%	4,0%	9,3%	0,9%	3,3%	0,0%	20,0%
Pa - plurlingv. absol.	10,2	9,7	6,9	9,1	5,6	9,6	13,1	4,9	7,6	8,0	11,8	-	-
Pw - plurlingv. pezita	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	6,3	27,6
modelo	duopolo	triopolo	monopolo	duopolo	monopolo	monopolo	duopolo	monopolo	monopolo	duopolo	duopolo	monopolo	balancita

Komentoj:

1. BALANS – proponata celinda modelo: plurlingveca indikilo tre alta, n-polecaj indikiloj radikale malaltaj (verda fono); **lingvoj *per capita* < ol en LU** (purpura).
2. PL – plurlingveca indikilo post inkludo de lingvolerteco falas je 40% (flava fono).
Konkludo: modeloj baziĝantaj je absolutaj nombroj sen konsideri atingatan lingvokompetenton plej verŝajne estas malmulte adekvataj al mezurado de vera plurlingveca kapitalo de la socio.
3. LI – plurlingveca indikilo (blua fono) – minimuma.

6. Pri kelkaj iluzioj – proponoj por Eŭropo

En la kunteksto de plurlingveca kapitalo de eŭropaj socioj gravas konsideri kelkajn konstatojn aŭ regantajn kredojn kiuj laŭ mia opinio estas iluziaj, do malhelpas ŝanĝojn.

1. Nuntempe bone edukitaj eŭropanoj regas bone pli da lingvoj ol antaŭ jardekoj – **ne estas vero** – individuoj nun preferas lertiĝi en nur unu–du lingvoj (Eurobarometer 2012).
2. Nuntempaj lingvopolitikoj en Eŭropo sociskale subtenas interkulturan diversecon – **ne estas vero** – sociskale efektiviga kreskanta koncentriĝo je 1, maksimume 3 lingvoj funkciaj kiel helplingvo kun rapida kresko de la angla en tiu rolo (Eurydice 2018).
3. En Eŭropo kreskas la elektado de diversaj helplingvoj – **ne estas vero** – reale la franca, germana, rusa perdas siajn antaŭajn poziciojn, estiĝas monopolo de la angla, do ankaŭ de ties kulturo (Eurydice 2018).
4. Individua scipovo de helplingvo plifaciligas interkulturan komunikadon de eŭropanoj – **ne estas vero** – helpas nur enpenetron en ĉi-lingvan kulturon, aliaj restas fermitaj; **estas tamen vero** ke individua scipovo de helplingvo plifaciligas utilecorientitajn kontaktojn.

5. Eŭropanoj subtenas egalrajtecon de fremdaj lingvoj – **ne estas vero – kontraŭdire** – rezulte de la enketado (Eurobarometer 2012) ili revas pri nur unu por Eŭropo.

Konsiderante la nuntempajn modelojn de instruado de fremdaj lingvoj ĝis la fino de mezlerneja edukado, ties konsekvencojn por la kultura interkomunikado en diverseca Eŭropo kaj la supre indikitajn iluziojn mi prezentis proponon pri la edukmodeloj de fremdlingva instruado (BALANS) celantan reale plialtigi la plurlingvecan kapitalon de eŭropaj socioj.

7. Finaj konkludoj

La artikolo celis atentigi pri la **mankoj en interkulture orientitaj edukpolitikoj** rilate pli justan, reale pli diversecan lingvoinstruadon de Eŭropanoj. Konkludoj estis formulitaj baze de **vasta empiria materialo** uzante detale kaj **precize formulitan metodologion kaj mezurilojn**. Tiamaniere **la tezojn starigitajn komence de la artikolo mi esperas sufiĉe bone klarigitajn kaj pruvitajn**.

Mi prezentis nur komencajn studojn pri la plurlingveca kapitalo de la socioj, koncentriĝis je metodologio efektive mezuri tiun kapitalon limigante tamen la esplorojn nur al mezlerneja edukado de fremdaj lingvoj. Aliaj aspektoj kaj sferoj ĉi rilate estas esplorindaj, ekzemple rilate al plenkreskuloj, tradukistoj kaj instruistoj, kultura difuzo kaj transfero, psikaj kaj sociaj reagoj al lingva kaj kultura diverseco, longdaŭraj tendencoj.

Mi ne pretendas indiki kia estu la edukpolitiko en fremdlingva instruado, sed nur demonstri kia estas nunmomente en Eŭropo la bildo en tiu sfero laŭ la vidpunkto de plurlingveca kapitalo de la socio kaj la formulita metodologio.

Evidentĝas klare, ke el la perspektivo de asertita kultura diverseco la ekzistanta tendenco al monopoleco de unu aŭ eĉ 2-3 helplingvoj, kiuj ajn ili estu, ne helpas plialtigi la plurlingvecan kapitalon de la socio, ĉar diversaj etnokulturoj multas en Eŭropo.

Bibliografio

- Bukowska X., Jewdokimow M., Markowska B., Winiarski P. 2013: *Kapitał kulturowy w działaniu, Studium światów społecznych Białowieży*. Warszawa: Collegium Civitas, https://www.civitas.edu.pl/pub/publikacje_cc
- Bourdieu, P. 1985: The Forms of Capital. En: J. Richardson (red.): *Handbook of Theory and Research for the Sociology of Education*. New York: Greenwood
- 1987: What Makes a Social Class? On the Theoretical and Practical Existence of Groups. En: *Berkeley Journal of Sociology* 32
- Łozowski, P. 2014: Język a kultura w programie etnolingwistyki kognitywnej Jerzego Bartmińskiego. Między Sapirem a Malinowskim. En: *Etnolingwistyka* 26. <https://journals.umcs.pl/et/article/view/177>

- Malinowski, B. 1922: *Argonauts of the Western Pacific*. London: Routledge & Kegan Paul
— 1931: Culture. En: *Encyclopedia of the Social Sciences* 4. Macmillan
- Sapir, E. 1970: Language. En: Harold Hungerford & Jay L. Robinson & James Sledd (eds.):
English Linguistics. An Introductory Reader. Glenview: Scott
- Zięba, A. 2008: Język a kultura. Komunikacja werbalna w wybranych polskich, brytyjskich
i amerykańskich programach telewizyjnych (Language and culture. Verbal communication
in selected Polish, British and American TV programmes). En: *Investigationes Linguis-
ticae* XVI.

Institucyj fontoj

- CEFR 2011: Common Reference Levels: Global scale. En: *Common European Framework
of Reference for Languages (CEFR)* <https://www.coe.int/en/web>
- Council of Europe 2011: *European Language Portfolio (ELP)* <https://rm.coe.int/CoERMPublicCommonSearchServices>
- Eurobarometer 2012: Europeans and their languages Report. En: *Special Eurobarometer 386*.
European Commission <https://ec.europa.eu/commfrontoffice/publicopinion/archives>
- EY 2019: Pupils by education level and modern foreign language studied – absolute numbers
and % of pupils by language studied (educ_uoe_lang01). En: *Eurostat Regional Yearbook
2019*, Database <https://ec.europa.eu/eurostat/data/database>
- Eurydice 2018: *Key Data on Teaching Languages at School in Europe – 2017 Edition*. EACEA:
Eurydice <http://www.eurydice.si/publikacje>
- ISCED, UNESCO 2011 [http://uis.unesco.org/sites/default/files/documents/international-
standard-classification-of-education-isced-2011-en.pdf](http://uis.unesco.org/sites/default/files/documents/international-standard-classification-of-education-isced-2011-en.pdf)
- MEN 2017: *Rozporządzenie o ramowych planach nauczania*. Warszawa: Ministerstwo Edu-
kacji Narodowej <http://prawo.sejm.gov.pl/isap.nsf>
- SIO 2018: Języki obce wg województw – wg stanu na 30 września 2018 r. En: *System Informacji
Oświatowej*. Centrum Informatyczne Edukacji [https://cie.men.gov.pl/sio-strona-glowna/
dane-statystyczne/jezyki-obce-dane-statystyczne](https://cie.men.gov.pl/sio-strona-glowna/dane-statystyczne/jezyki-obce-dane-statystyczne)

5

Sign languages

Gestolingvoj

Języki migowe

Sign Languages and Intercultural Communication: The Challenges of Deaf-Hearing Interactions in Multilingual Settings

Resumo. Gestolingvoj kaj interkultura komunikado: defioj de la interagoj Surdulo – aŭdanto en plurlingva situacio

Okazis malmultaj diskutoj pri la situacio de gestolingvoj en interlingvistiko. Kvankam tio estas komprenebla pro multaj kialoj, inter kiuj ne laste la relative malgranda nombro de uzantoj de diversaj gestolingvoj, tamen estas gravaj demandoj rilate al la komunikaj bezonoj de Surduloj en plurlingva situacio. La nuna studo esploras kelkajn specialajn barojn kiujn alfrontas la uzantoj de gestolingvoj, inkludante (i) la unikan psikologian situacion de Surduloj kiu malfaciligas aŭ entute malebligas al ili aliri la parolajn lingvojn, (ii) la grandan kvanton de disvastiĝintaj misinformoj pri la naturo de gestolingvoj en granda parto de la ĝenerala publiko, (iii) la grandan diversecon de gestolingvoj en la mondo, (iv) la mankon de scio pri multaj specialaj gestolingvoj, (v) la neceson rekoni la lingvajn homajn rajtojn de gestolingvo-uzantoj. La plimulto de tiuj ĉi baroj ekzistas en du flankoj – ilin spertas la Surduloj en siaj societoj ĉiutage, kaj tio plifortigas la kulturajn kaj lingvajn diferencojn inter Surduloj kaj aŭdantoj, sed ili ekzistas ankaŭ en pli profunda formo en interkulturaj kaj plurlingvaj situacioj.

Abstract. There has been relatively little discussion of the situation of sign languages in interlinguistics. Although this is understandable for a variety of reasons, not the least of which are the relatively small numbers of users of different sign languages, there are important issues at stake with respect to the communicative needs of the deaf in multilingual settings. In this paper, a number of the special barriers faced by users of sign languages will be explored, including (i) the unique physiological situation of the deaf, (ii) the presence of misinformation about the nature of sign languages, (iii) the extensive diversity of sign languages in the world, (iv) the lack of knowledge about many particular sign languages, and (v) the need for the recognition of the linguistic human rights of users of sign languages. Most of these barriers exist in two settings: they are faced by the deaf in their own societies on a daily basis, and reinforce the cultural and linguistic differences between deaf people and hearing people, but they also exist in an even more profound way in intercultural and multilingual settings.

1. Introduction

With a few noteworthy exceptions, such as Gestuno, International Sign, and Signed Esperanto, there has been little discussion of the situation of sign languages in interlinguistics. Although this is understandable for a variety of reasons, not the least of which are the relatively small numbers of users of different sign languages and the

ongoing marginalization of deaf people,¹ there are nevertheless both important practical and theoretical issues at stake with respect to sign languages in interlinguistics. In this paper, I would like to identify some of these issues, explain why they are significant, and offer a perspective on how they might be addressed.

The overwhelming majority of users of sign languages are deaf, and this helps to explain one major aspect of the challenge with which I am concerned here. In the general society, deafness is identified as a disability, and a deficit model is used to understand and respond to it. In other words, deafness is a condition that should be “cured” or at least remediated, and sign languages – like hearing aids, cochlear implants, and so on – are simply one way that this can be accomplished. Such a view almost inevitably leads to the view of sign languages as secondary to spoken languages. Although such a view of deafness and sign languages is undoubtedly the most common one, it is *not* the view that is taken by a substantial number of deaf people themselves, who self-identify as members of an historically dominated and oppressed community which is engaged in what is essentially a struggle with the hearing world about how the needs of deaf people in general, and deaf children in particular, should best be met. In American Sign Language (ASL),² this community is called the DEAF-WORLD,³ and it co-exists in marked contrast to the hearing world. In fact, to be more accurate, around the world there are multiple deaf communities, just as there are multiple sign languages, which share many common features with one another while at the same time remaining distinctive under the broad umbrellas of “sign language” and “deaf culture.”

¹ The deaf cultural and linguistic community is referred to in many different ways: it is called the “deaf community,” the “deaf culture,” “deafhood,” and, in ASL, using the sign DEAF-WORLD. In order to distinguish between individuals who are audiological deaf and those who were culturally and linguistically deaf, in the 1960s and 1970s it became common to adopt a distinction between *deaf* and *Deaf*: the former referring to *deafness* solely as an audiological condition, while the latter referring to *Deafness* as a linguistic and cultural condition. Although this is a valuable distinction, it is also an oversimplification of the considerable complexity of the deaf community. More recently, writers have tried to address this problem by using *d/Deafness*, indicating both groups. It is important to note that even this solution, though, is also problematic much of the time, since it reinforces the idea that there is an absolute difference between the DEAF-WORLD and the hearing world. Given these problems, I have, for the sake of both simplicity and accuracy, chosen to use simply the lower-case option here. I have also, however, left the usages in quotations as their authors chose to write them.

² Although the arguments presented here apply internationally, the examples are drawn primarily from ASL, the sign language with which I am personally most familiar.

³ I have followed the common practice of indicating a particular sign by writing its English gloss in capital letters and in a distinctive typeface (e.g., BOY). It should be noted that many signs require multiple English words to represent a single sign; in these instances, the words are connected to indicate that they are a single sign (as in I-ASK-YOU). The sign used here, DEAF-WORLD, is the one used in ASL to indicate the deaf cultural community.

2. The Recognition of Sign Language as Language

For most of human history, sign languages were dismissed as somehow not “real” languages; one of the definitional characteristics of human language was assumed to be that it was spoken, and hence that it utilized an aural-oral communicative modality. The use of a sign language was presumed to be not merely *different* with respect to the modalities it employed, but actually *inferior* in nature to spoken languages. Sign languages were widely believed to lack grammar, to be constituted by little more than gestures, pointing and occasionally supplemented by the use of manual alphabets. It was also widely believed that there was only one, essentially universal, sign language, which all deaf people used. The change in how sign language is viewed and understood is a remarkably recent one. Revolutionary in nature, it was begun by a single individual, William C. Stokoe (see Armstrong, Karchmer & Van Cleve, 2002). In 1960, when he was a young faculty member in the English Department at Gallaudet College, Stokoe published a short monograph entitled *Sign Language Structure* (Stokoe, 1993 [1960]). In that work, Stokoe made a radical proposition: the signing that he observed all around him, which we now call American Sign Language, was a fully structured, rule-governed language that should be addressed, studied and respected as would be any spoken language. Since then, there has been a veritable revolution in the linguistics of sign languages, with important research conducted in, and with implications for, virtually every area of linguistics (see, e.g., Baker, van den Bogaerde, & Crasborn, 2003; Baker, van den Bogaerde, Pfau & Schermer, 2016; Brentari, 2010; Johnston & Schembri, 2007; Lillo-Martin, 1991; Lucas, 2001, 2006; Lucas, Bayley & Valli, 2003; Neidle, Kegl, Maclaughlin, Bahan & Lee, 2000; Sutton-Spence & Woll, 1998; Valli, Lucas, Mulrooney & Villanueva, 2011).

3. The DEAF-WORLD

Concomitant with the recognition of sign languages was a growing acceptance of the DEAF-WORLD as a distinct cultural community. Using what was essentially an anthropological framework, scholars in Deaf Studies and related fields demonstrated that the DEAF-WORLD in different societies typically possessed:

- common, shared sign languages,
- literary and artistic traditions, both with respect to the visual arts and in literature, such as poetry and theatre in the sign language,
- shared in-group cultural and linguistic identities,
- culturally specific humor related to deafness and the relationships between the DEAF-WORLD and the hearing world,
- endogamous, or in-group, marital patterns,
- distinctive behavioral norms,

- cultural artifacts of various sorts,
- common and shared historical knowledge and mythologies, and networks of different kinds of in-group social organizations (see Holcomb, 2013; Lane, Hoffmeister & Bahan, 1996; Leigh, Andrews & Harris, 2018; Lindgren, Lindgren, DeLuca & Napoli, 2008; Padden & Humphries, 1988, 2005).

